Österreichische
Nationalbibliothek

# <<La>> laborista klaso kontraŭ la faŝismo

Autor: Dimitrov, Georgi, Kolčinskij, Viktor

**Ort: Kievo [u.a.]**

**Jahr: 1936**

Zitierlink: https://data.onb.ac.at/rep/1131962B
Signatur: 705679-A
ID: 1131962B

Umfang: Seiten 1 bis 188 (Komplettes Werk)
PDF erstellt am 11.01.2026 21:00


**Nutzungsbedingungen**:https://www.onb.ac.at/nutzung

**Hinweis:** Der Volltext wurde automatisch generiert und könnte aufgrund von OCR-Erkennungsfehlern Ungenauigkeiten oder fehlerhafte Zeichen enthalten.

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

705.679-A

ESP



ÖNB
+Z100252400

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
705679-A
Esp

G. DIMITROV

# LA LABORISTA KLASO KONTRAŬ LA FAŜISMO

UKRAINIA ELDONEJO DE NACI-MINORITOJ

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 7 von 188

Proletoj de la mondo, unuiĝu vin!

# LA LABORISTA KLASO KONTRAŬ LA FAŜISMO

UKRAINIA ELDONEJO DE NACI-MINORITOJ
KIEV 1936 ĤARKOV

705679-A. Esp

ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK WIEN

Eldonis Ukr. Eldonejo de Naci minoritoj lau mendo de Centra
kaj Ukrainia komitatoj de SEU.
Esperantigis V. Kolčinski.
Eldoneja redaktoro: Miškovski.
Tekn. gvidanto: G. Lavrentjev.

Presita en 8-a resp. poligrafia fabriko. Harkov.
Ukrglavlit. Nr. 5284. M. Nr. 433. Eldonkvanto 3000.

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

GEORGI DIMITROV

# LA OFENSIVO DE L'FAŜISMO KAJ LA TASKOJ DE L'KOMUNISTA INTERNACIO EN LA BATALO POR LA UNUECO DE LA LABORISTA KLASO KONTRAŬ LA FAŜISMO

RAPORTO AL LA VII-a MOND-KONGRESO DE L' KOMUNISTA INTERNACIO

Centra
yski.
tjev.
00.

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 11 von 188

# I. LA FAŜISMO KAJ LA LABORISTA KLASO

Kamaradoj!

Jam la sesa kongreso de l' Komunista Internacio avertis la internacian proletaron pri la maturiĝo de nova faŝisma ofensivo kaj alvokis al la batalo kontraŭ ĝi. La kongreso indikis ke „en pli-malpli disvolvita formo la faŝismaj tendencoj kaj la embrioj de faŝisma movado estas preskaŭ ĉie".

En la kondiĉoj de trafinta plej profunda ekonomia krizo, de kruda pliakriĝo de l' ĝenerala krizo de kapitalismo, de revoluciiĝo de l' laborulaj amasoj, la faŝismo transiris al larĝa ofensivo. La reganta burĝaro ĉiam pli serĉas savon en la faŝismo, celante la efektivigon de ekskluzivaj rabaj aktoj kontraŭ la laboruloj, preparadon de rabula, imperialista milito, atakon kontraŭ Sovet-Unio, la sklavigon kaj dividon de Ĉinio kaj sur la bazo de ĉio-tio la eviton de l' revolucio.

La imperialistaj rondoj provas transmeti la tutan pezon de la krizo sur la ŝultrojn de la laboruloj. Por tio ili bezonas la faŝismon.

Ili klopodas solvi la problemon de merkatoj je la kostoj de l'sklavigo de la malfortaj popoloj, pligrandigo de l 'kolonia jugo kaj nova redivido de la mondo per milito. Por tio ili bezonas la faŝismon.

Ili aspiras devanci[1] la alkreskon de l' fortoj de la revolucio per la frakaso de l' revolucia movado de l' laboristoj kaj kamparanoj kaj milita atako kontraŭ



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 12 von 188

SOVET-UNIO, la apogilo de l' mondproletaro. Por tio ili bezonas la faŝismon.

En pluraj landoj, aparte en Germanio, tiuj imperialistaj rondoj prosperis antaŭ la decida ekturno de l 'amasoj al la revolucio venkobati la proletaron kaj starigi faŝistan diktaturon.

Sed karakteriza por la venko de l' faŝismo estas ĝuste tiu cirkonstanco ke ĉi-venko unuflanke atestas pri la malforteco de l' proletaro, disorganizita kaj paralizita per la skismiga social-demokrata politiko de klasa kunlaboro kun la burĝaro, sed aliflanke ĝi esprimas la malfortecon de l' burĝaro mem, kiu sentas timon pri la realiĝo de l' batal-unueco de l' laborista klaso, timon pri la revolucio kaj ne estas plu kapabla reteni sian diktaturon super la amasoj per la malnovaj metodoj de burĝa demokratio kaj parlamentismo.

La venkon de l' faŝismo en Germanio, diris kamarado Stalin ĉe la deksepa kongreso de l' Tutunia komunista partio (de bolŝevikoj),

> „oni devas konsideri ne nur kiel simptomon de malforteco de l' laborista klaso kaj rezulto de l' perfidoj al la laborista klaso de l' social-demokratio, puriginta la vojon al la faŝismo. Oni devas ĝin konsideri ankaŭ kiel simptomon de malforteco de l' burĝaro, kiel simptomon de tio, ke la burĝaro plu ne havas la fortojn por regi per la malnovaj metodoj de parlamentismo kaj burĝa demokratio, pro kio ĝi estas devigita sin turni en la interna politiko al teroraj metodoj de regado, — kiel simptomon de tio, ke ĝi plu ne havas la fortojn por trovi elvojon el la nuna situacio sur la bazo de paca ekstera politiko, pro kio ĝi estas devigita sin turni al politiko de milito".



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

## LA KLASA KARAKTERO DE L' FAŜISMO.

La faŝismo ĉe la regado estas, kamaradoj, kiel ĝuste ĝin karakterizis la dektria plenkunsido de l' Ekzekutivo de l' Komunista Internacio, malkaŝa, terorisma diktaturo de l' plej reakciaj, plej ŝovinistaj, plej imperialistaj elementoj de l' financa kapitalo.

La plej reakcia vario de faŝismo estas la faŝismo de germana tipo. Ĝi arogante nomas sin naci-socialismo, havante nenion komunan kun socialismo. La hitlera faŝismo estas ne nur burĝa naciismo, sed ankaŭ sovaĝbesta ŝovinismo. Ĝi estas registara sistemo de politika banditismo, sistemo de provokoj kaj torturoj al la laborista klaso kaj la revoluciaj elementoj de l' kampularo, etburĝaro kaj intelektuaro. Ĝi estas mezepoka barbareco kaj besteco, ĝi estas senbrida agreso[2] kontraŭ aliaj popoloj kaj landoj.

La germana faŝismo elpaŝas kiel la frapa pugno de l' internacia kontraŭ-revolucio, kiel la ĉefa bruliganto de l' imperialista milito, kiel la iniciatanto de kruca militiro kontraŭ Sovet-Unio, la granda patrolando de l' laboruloj de l' tuta mondo.

La faŝismo, ĝi ne estas formo de ŝtata regado, kiu kvazaŭ „staras super la ambaŭ klasoj: la proletaro kaj la burĝaro", kiel asertis, ekzemple, Otto Bauer. Ĝi ne estas „revoltinta[3] etburĝaro, kiu kaptis la ŝtatan maŝinon", kiel deklaras la angla socialisto Brejlsford. Ne. La faŝismo, ĝi ne estas superklasa regado kaj ne la regado de l' etburĝaro aŭ de l' lumpenproletaro super la financa kapitalo. La faŝismo estas la regado de l' financa kapitalo mem. Ĝi estas organizo de terorista venĝopuno kontraŭ la laborista klaso kaj la revolucia parto de l' kampularo kaj intelektularo. La faŝismo en ekstera politiko estas



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 14 von 188

ŝovinismo de l' plej maldelikata formo, kulturanta zoologian malamon al la aliaj popoloj.

Necesas kun speciala forto akcenti tiun-ĉi veran karakteron de l' faŝismo ĉar la vualado per socia demagogio donis la eblecon al la faŝismo forkonduki en pluraj landoj la ekstervojiĝitajn per la krizo amasojn de l' etburĝaro kaj eĉ iujn partojn de l' plej postrestintaj tavoloj de l' proletaro, kiuj neniam sekvus la faŝismon se ili komprenus ĝian efektivan klasan karakteron, ĝian veran naturon.

La disvolvo de l' faŝismo kaj la faŝista diktaturo mem akceptas en diversaj landoj malsamajn formojn depende de l' historiaj, sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, de l' naciaj specifecoj kaj de l' internacia situacio de l' konsiderata lando. En iuj landoj, precipe tie, kie la faŝismo ne havas larĝan amasan bazon kaj kie la batalo de apartaj grupiĝoj en la tendaro de l' faŝista burĝaro mem estas sufiĉe forta, la faŝismo ne tuj kuraĝas likvidi la parlamenton kaj konservas por la aliaj burĝaj partioj kaj ankaŭ por la social-demokratio certan legalecon. En aliaj landoj, kie la reganta burĝaro timas proksiman eksplodon de l' revolucio, la faŝismo starigas sian nelimigitan politikan monopolon aŭ tuj, aŭ ĉiam pli fortigante la teroron kaj venĝbatadon kontraŭ ĉiuj konkurantaj partioj kaj grupiĝoj. Tio ne ekkludas la provojn de l' faŝismo en momento de speciala pliakriĝo de ĝia situacio plilarĝigi sian bazon kaj, ne aliigante sian klasan esencon, kombini malkaŝan terorisman diktaturon kun maldelikata falsigo de parlamentismo.

La alveno de l' faŝismo al la regado — ĝi ne estas ordinara anstataŭigo de unu burĝa registaro per alia, sed la ŝanĝo de unu ŝtata formo de klasa regado de l' burĝaro — la burĝa demokratio — per alia ties formo: malkaŝa terorisma diktaturo. La ig-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

noro de tiu-ĉi malsimileco estus serioza eraro. Sed ne malpli serioza kaj danĝera eraro estas la subtakso de tiu signifo, kiun havas por la starigo de l' faŝisma diktaturo la plifortigataj nun en la landoj de burĝa demokratio reakciaj aktoj de l' burĝaro, subpremantaj la demokratiajn liberecojn de l' laboruloj, falsigantaj kaj reduktantaj la rajtojn de l' parlamento, plifortigantaj la represiojn[4] kontraŭ la revolucia movado.

Oni ne povas, kamaradoj, imagi al si la alvenon de l' faŝismo al la regado tion simplisme kaj glate, kvazaŭ iu komitato de l' financa kapitalo decidas starigi je certa dato la faŝisman diktaturon. En efektivo la faŝismo venas kutime al la regado en reciproka, iufoje akra batalo kontraŭ la malnovaj burĝaj partioj aŭ kontraŭ certa parto de ili, en batalo eĉ en la faŝista tendaro mem, kiu iufoje atingas eĉ armitajn interpuŝiĝojn, kiel ni tion vidis en Germanio, Aŭstrio kaj aliaj landoj. Ĉio-tio, tamen, ne malplifortigas la signifon de tiu fakto, ke antaŭ la starigo de faŝisma diktaturo la burĝaj partioj kutime trapasas vicon da preparaj etapoj kaj efektivigas vicon da reakciaj entreprenoj helpantaj senpere al la alveno de l' faŝismo al la regado. Kiu ne batalos ĉe tiuj-ĉi preparaj etapoj kontraŭ la reakciaj entreprenoj de l' burĝaro kaj kontraŭ la alkreskanta faŝismo, *tiu ne estas kapabla malhelpi, tiu, male plifaciligas la venkon de l' faŝismo.*

La gvidantoj de l' social-demokratio ombrumis kaj kaŝis de l' amasoj la veran klasan karakteron de l' faŝismo kaj ne vokis al la batalo kontraŭ la plifortiĝintaj reakciaj entreprenoj de l' burĝaro. Ili portas grandan *historian respondecon* pro tio, ke en la decida momento de l' faŝisma ofensivo, konsiderinda parto de l' laborulaj amasoj en Germanio kaj pluraj aliaj faŝismaj landoj ne rekonis en la faŝismo la plej sangavidan financan rabulon, sian



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 16 von 188

plej kruelan malamikon, kaj ke tiuj-ĉi amasoj ne estis pretaj al la rebato.

En kio estas la fonto de l' influo de la faŝismo sur la amasojn? La faŝismo prosperis allogi la amasojn tial ke ĝi demagogie apelis al iliaj plej dolorigaj bezonoj kaj deziroj. La faŝismo ne nur pliflamigas la profunde enradikiĝintajn en la amasoj antaŭjuĝojn, sed ĝi ludas ankaŭ je la plej bonaj sentimentoj de l' amasoj, je ilia sento de justeco kaj iufoje eĉ je iliaj revoluciaj tradicioj. Kial la germanaj faŝistoj, tiuj lakeoj de l' grandburĝaro kaj ĝismortaj malamikoj de l' socialismo, sin ŝajnigas al la amasoj „socialistoj" kaj sian alvenon al la regado prezentas kiel „revolucio"? Tial ke ili celas ekspluati la kredon je revolucio, la aspiron al socialismo, kiuj vivas en la koroj de l' vastaj laborulaj amasoj de Germanio.

La faŝismo agas en la interesoj de ekstremaj imperialistoj, sed ĝi elpaŝas antaŭ la amasoj sub la masko de defendanto de l' malbontraktita nacio kaj apelas al la ofendita nacia sento, kiel, ekzemple, la germana faŝismo sekviginta post si la amasojn per la lozungo „kontraŭ Versajlo".

La faŝismo aspiras la plej senbridan ekspluatadon de l' amasoj, sed ĝi proksimiĝas al ili kun lerta kontraŭkapitalisma demagogio, ekspluatante la profundan malamon de l' laboruloj kontraŭ la rabeca burĝaro, la bankoj, la trustoj kaj financaj magnatoj, kaj elŝovante la plej allogajn por la politike-malmaturaj amasoj en la konsiderata momento lozungojn: en Germanio „la komuna bono estas supera al la privata", en Italio „nia ŝtato estas ne kapitalisma, sed korporacia", en Japanio „por Japanio sen ekspluatado", en Usono „por la divido de l' riĉoj" ktp.

La faŝismo fordonas la popolon por devoro[5] al la plej koruptaj elementoj, sed ĝi elpaŝas antaŭ ili kun



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 17 von 188

la postulo de „honesta kaj nekoruptebla registaro". Spekulante je la profunda seniluziiĝo de l' amasoj pri la registaroj de l' burĝa demokratio, la faŝismo hipokrite indignas kontraŭ la korupto (ekz., la aferoj Barmat kaj Sklarek en Germanio, la afero Staviski en Francio kaj pluraj aliaj).

La faŝismo transkaptas en la interesoj de l' plej reakciaj rondoj de l' burĝaro la disreviĝintajn amasojn, deirantajn de l' malnovaj burĝaj partioj. Sed ĝi imponas al tiuj-ĉi amasoj per la akratoneco de siaj atakoj kontraŭ la burĝaj registaroj, nepacigebleco de sia rilato al la malnovaj partioj de l' burĝaro.

Superante per siaj cinismo kaj mensogemo ĉiujn aliajn variojn de l' burĝa reakcio, la faŝismo akomodas sian demagogion al la naciaj specifecoj de ĉiu lando kaj eĉ al la specifecoj de diversaj sociaj tavoloj en la sama lando. Kaj la amasoj de l' etburĝaro, eĉ parto de l' laboristoj, venigitaj al senespero per la mizero, senlaboreco kaj la senrimedeco de sia ekzisto, estiĝas viktimoj de l' socia kaj ŝovinisma demagogio de l' faŝismo.

La faŝismo venas al la regado kiel partio de frapo kontraŭ la revolucia movado de l' proletaro, kontraŭ la fermentantaj popolaj amasoj, sed ĝi aspektigas sian alvenon al la regado kiel „revolucia" movado kontraŭ la burĝaro je la nomo de l' „tuta nacio" kaj por „la savo de l' nacio". Ni rememoru la „marŝon" de Mussolini al Romo, la „marŝon" de Pilsudski al Varsovio, la nacisocialistan „revolucion" de Hitler en Germanio k.t.p.

Sed kiujn ajn maskojn surmetu la faŝismo, en kiuj ajn formoj ĝi elpaŝu, per kiuj ajn vojoj ĝi venu al la regado, —

la faŝismo — ĝi estas la plej kruela ofensivo de l' kapitalo kontraŭ la laborulaj amasoj,



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 18 von 188

la faŝismo — ĝi estas senbrida ŝovinismo kaj konkercela milito,
la faŝismo — ĝi estas furioza reakcio kaj kontraŭrevolucio,
la faŝismo — ĝi estas la plej kruda malamiko de l' laborista klaso kaj de ĉiuj laboruloj!

## KION PORTAS AL LA AMASOJ LA VENKINTA FAŜISMO?

La faŝismo promesis al la laboristoj „justan salajron", sed en realo alportis ankoraŭ pli malaltan, mizerulan vivnivelon. Ĝi promesis al la senlaboruloj laboron, sed en realo alportis ankoraŭ pli pezajn suferojn de malsato, sklavecan devigan laboron. En realo ĝi transformas la laboristojn kaj la senlaborulojn je la plej senrajtaj pariaoj de l'kapitalisma socio, detruas iliajn sindikatojn, senigas ilin je la rajto pri strikoj kaj je laborista gazetaro, perforte enpelas ilin en la faŝistajn organizojn, disrabas la fondusojn de ilia socia asekuro, kaj la fabrikojn kaj uzinojn transformas je kazernoj, kie regas la senbrida arbitro de l'kapitalistoj.

La faŝismo promesis al la laborula junularo malfermi al ĝi larĝan vojon al brila estonto. En realo ĝi alportis amasajn maldungojn de l' junularo el la entreprenejoj, la labortendarojn kaj senĉesan militdresadon por konkera milito.

La faŝismo promesis al la oficistoj, la etaj ŝtatfunkciuloj, la intelektularo certigi ilian ekziston, nuligi la ĉiopovon de l'trustoj kaj la spekuladon de l'banka kapitalo. En realo ĝi alportis al ili ankoraŭ pli grandajn senesperon kaj malcertecon pri la morgaŭo, subordigas ilin al nova burokrataro el siaj plej fidelaj disĉiploj, kreas neel-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 19 von 188

porteblan diktaturon de l'trustoj, semas en neestintaj grandecoj korupton kaj diskomponiĝon.

La faŝismo promesis al la malriĉigita, mizeriĝinta kampularo la likvidon de l' ŝulda sklaveco, la nuligon de l' farmopago kaj eĉ la senpagan deposedigon de l' bienulaj teroj por la senteraj kaj malriĉiĝantaj kamparanoj. En realo ĝi kreas neekzistintan ankoraŭ sklavigon de l' laborula kamparanaro per la trustoj kaj la faŝista ŝtata aparato kaj venigas al ekstremaj limoj la ekspluatadon de l'bazaj amasoj de l'kampularo per la grandaj agrarioj[6], bankoj kaj uzuristoj.

„Germanio estos kamparana lando aŭ ĝi tute ne estos" — solene deklaris Hitler. Sed kion ricevis la kamparanoj en Germanio sub Hitler? Moratorion[7], kiu jam estas nuligita? Aŭ la leĝon pri la heredado de l' kamparana mastrumo, kiu rezultigas la elpremon de milionoj da kamparanaj gefiloj el la kamparo kaj ties transformon je mizeruloj? La kamplaboristoj estas transformitaj je duonservutuloj, malhavantaj eĉ la elementan rajton de libera transmoviĝo. La laborula kamparanaro malhavas la eblecon vendi ĉe la merkato la produktojn de sia ekonomio.

Kaj en Polio?

„La pola kamparano, — skribas la pola gazeto „Czas", — aplikas manierojn kaj rimedojn, praktikitajn, eble, nur en la mezepoko: li konservas la fajron en la forno kaj pruntas ĝin al la najbaro, la alumetojn li dividas je kelkaj partoj, pruntas unu al alia malpuran sapakvon, li postbrogas haringajn barelojn por ricevi salitan akvon. Tio estas ne fabloj, sed la reala situacio sur kamparo, pri kiu ĉiu povas konvinkiĝi".

Kaj tion skribas, kamaradoj, ne komunistoj, sed pola reakcia gazeto!

Sed tio estas tute ne ĉio.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 20 von 188

Ĉiutage en la koncentraj tendaroj de l'faŝista Germanio, en la keloj de l' „Gestapo“ (sekreta polico), en la polaj karceroj, en la bulgara kaj finna defenzivoj [8], en la beograda „Glavnjaĉa“, en la rumana „Siguranza“, sur la italiaj insuloj, la plej bonaj filoj de l' laborista klaso, revoluciaj kamparanoj, batalantoj por la belega estonto de l'homaro, suferas la plej abomenindajn perfortojn kaj fitraktojn, kompare kun kiuj palas la plej aĉaj faroj de l' cara defenzivo. La murdista germana faŝismo transformas je sangoza amaso edzojn je la ĉeesto de iliaj edzinoj, al patrinoj sendas en poŝtaj paketoj la cindron de l' murditaj filoj. La sterilizado estas transformita je politika batalilo. Al la kaptitaj antifaŝistoj en la torturejoj oni perforte injektas venenojn, rompas la brakojn, elbatas la okulojn, subpendigas, enpumpas akvon, desegnotranĉas sur la vivanta korpo la faŝistan svastikon.

Antaŭ mi estas la statistiko de IRH — de l'Internacia organizo de helpo al la batalantoj de l'revolucio — pri la murditoj, vunditoj, arestitoj, kripligitoj kaj turmentitoj en Germanio, Polio, Italio, Aŭstrio, Bulgario, Jugoslavio. En nura Germanio dum sia regado la naci-socialistoj mortigis pli ol 4200, arestis 317.800, vundis kaj suferige torturis 218.600 antifaŝistajn laboristojn, kamparanojn, oficistojn, intelektulojn — komunistojn, socialdemokratojn, membrojn de opoziciaj kristanaj organizoj. En Aŭstrio la „kristana“ faŝista registaro ekde la februaraj bataloj pasintjaraj mortigis 1900, vundis kaj kripligis 10000, arestis 40 mil revoluciajn laboristojn. Kaj tiu-ĉi listo, kamaradoj, tute ne estas kompleta.

Al mi estas malfacile trovi vortojn por esprimi la tutan indignon, ĉirkaŭkaptantan nin ĉe la la penso pri la suferoj, kiujn travivas nun la laboruloj en pluraj faŝistaj landoj. La nombroj kaj faktoj, kiujn ni



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

mencias, n e r e s p e g u l a s e ĉ l a c e n t o n a n p a r t o n de l'vera bildo pri tiu ekspluato kaj tiuj turmentoj de l' blankgvardiula teroro, plenpleniĝintaj la ĉiutagan vivon de l'laborista klaso en diversaj kapitalismaj landoj. Neniaj volumoj donos klaran imagon pri la nenombreblaj best-agoj de l'faŝismo al la laboruloj.

Kun profundaj emocio kaj malamo kontraŭ la faŝistaj ekzekutistoj ni klinas la standardojn de l' Komunista Internacio antaŭ la neforgesebla memoro pri John Scherr, Fite Schultze, Lüttgensen — en Germanio, Koloman Valis kaj Münichreiter—en Aŭstrio, Sallai kaj Fürst — en Hungario, Kofarĝiev, Lutibrodski kaj Vojkov — en Bulgario, antaŭ la memoro pri miloj kaj miloj da komunistaj, social-demokrataj kaj senpartiaj laboristoj, kamparanoj, reprezentantoj de l'progresema intelektularo, fordonintaj sian vivon en la batalo kontraŭ la faŝismo.

Ni salutas desur tiu-ĉi tribuno la gvidanton de l'germana proletaro kaj la honoran prezidanton de de nia Kongreso, kamaradon Thaelman. (V a r m e g a j a p l a ŭ d o j, ĉ i u j e n l a h a l o l e v i ĝ a s). Ni salutas kamaradojn Rakosi, Gramshi (v a r m e g a j a p l a ŭ d o j, ĉ i u j e n l a h a l o l e v i ĝ a s), Antikainen, Jonko Panov. Ni salutas gvidanton de l' hispanaj socialistoj Caballero, enkarcerigitan de la kontraŭrevoluciuloj, Tom Mooney, jam 18 jarojn suferantan en prizono, kaj milojn da aliaj malliberigitoj de l' kapitalo kaj faŝismo (v a r m e g a j a p l a ŭ d o j) kaj ni diras al ili: „Fratoj laŭ la batalo, laŭ la armilo, vi ne estas forgesitaj. Ni estas kun vi. Ĉiun horon de nia vivo, ĉiun guton de nia sango ni fordonos por via liberigo kaj por la liberigo de ĉiuj laboruloj je la hontinda faŝisma reĝimo". (V a r m e g a j a p l a ŭ d o j, ĉ i u j e n l a h a l o l e v i ĝ a s).

Kamaradoj, ankoraŭ Lenin avertis nin ke la burĝ-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 22 von 188

aro povas prosperi faligi kruelan teroron sur la laborulojn kaj repuŝi por tiuj aŭ aliaj mallongaj tempospacoj la kreskantajn fortojn de l' revolucio, sed ke ĝi tutegale ne savos sin kontraŭ la pereo.

„La vivo, — skribis Lenin[9], — prenos la sian. La burĝaro febrosaltu, furiozu ĝis freneziĝo, trosalu, faru stultajojn, anticipe venĝu al la bolŝevikoj kaj penu masakri (kiel en Hindio, en Hungario, en Germanio k.t.p.) p'iajn centojn, milionojn, milcentojn da morgaŭaj aŭ hieraŭaj bolŝevikoj: kondutante tiel, la burĝaro kondutas, kiel kondutis ĉiuj klasoj kondamnitaj de l'historio al pereo. La komunistoj devas scii, ke la estonto ĉiuokaze apartenas al ili, kaj tial povas (kaj devas) kunigi la plej grandan pasiecon en la granda revolucia batalo kun la plej malvarmsanga kaj sobra prikonsidero de l'furiozaj febrosaltoj de l'burĝaro".

Jes, se ni kaj la proletaro de l'tuta mondo firme marŝos la vojon, indikitan al ni de Lenin kaj Stalin, la burĝaro pereos malgraŭ ĉio. (Aplaŭdoj).

## ĈU NEEVITEBLA ESTAS LA VENKO DE L' FAŜISMO?

Kial kaj kiamaniere la faŝismo povis venki?

La faŝismo estas la plej kruda malamiko de l' laborista klaso kaj de l' laboruloj. La faŝismo estas la malamiko de 9/10 de l'germana popolo, de 9/10 de l'aŭstra popolo, de 9/10 de l'aliaj popoloj de faŝismaj landoj. Kiel, kiamaniere tiu-ĉi plej kruda malamiko povis venki?

La faŝismo povis veni al la regado antaŭ ĉio tial ke la laborista klaso, dank'al la politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro, kiun kondukis la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

gvidantoj de l'socialdamokratio, estiĝis splitigita, politike kaj organize senarmigita antaŭ la faco de l' antaŭenmarŝanta burĝaro. Kaj la komunistaj partioj ja estis nesufiĉe fortaj por sen aŭ spite al la socialdemokratio levi la amasojn kaj konduki ilin al la decida batalo kontraŭ la faŝismo.

Kaj efektive! La milionoj da socialdemokrataj laboristoj, kiuj nun kune kun siaj komunistaj fratoj suferas proprakorpe la terurojn de l'faŝista barbareco, ekpensu serioze: se la aŭstria kaj germania proletaro en 1918, kiam eksplodis la revolucio en Germanio kaj Aŭstrio, ne sekvus la socialdemokratan gvidon de Otto Bauer, Friedrich Adler kaj Renner en Aŭstrio, Ebert kaj Scheideman en Germanio, sed ekmarŝus la vojon de l' rusaj bolŝevikoj, la vojon de Lenin kaj Stalin, nun estus faŝismo nek en Aŭstrio, nek en Germanio, nek en Italio kaj Hungario, nek en Polio, nek sur la Balkanoj. Ne la burĝaro, sed la laborista klaso estus delonge la mastro de l' situacio en Eŭropo. (Aplaŭdoj).

Ni prenu, ekzemple, la aŭstran socialdemokration. La revolucio de 1918 levis ĝin sur grandegan altecon. Ĝi havis la regopovon en la manoj, ĝi havis fortajn poziciojn en la armeo, en la ŝtata aparato. Sin apogante je tiuj pozicioj, ĝi povis enradike mortigi la ekĝermantan faŝismon. Sed ĝi fordonis sen kontraŭstaro unu pozicion de l'laborista klaso post alia. Ĝi allasis la burĝaron plifortigi sian regopovon, nuligi la konstitucion, purigi la ŝtatan aparaton, armeon kaj la policon je la socialdemokrataj funkciuloj, forpreni ĉe la laboristoj la arsenalon. Ĝi allasis la faŝistajn banditojn senpune murdi socialdemokratajn laboristojn, akceptis la kondiĉojn de l' Gütenberg'a pakto, malferminta al la faŝistaj elementoj la enpenetron en la entreprenejojn. Samtempe la gvidantoj de l' socialdemokratio mistifikis la la-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 24 von 188

boristojn per la Lintz'a programo, kie estis antaŭvidata alternativa ebleco de armita perforto kontraŭ la burĝaro kaj starigo de proletara diktaturo, certigante ilin ke la partio respondos per alvoko al ĝenerala striko kaj armita batalo se la regantaj klasoj aplikos perforton kontraŭ la laborista klaso. Kvazaŭ la tuta politiko de preparado de l' faŝista atako kontraŭ la laborista klaso ne estis ĉeno da perfortoj al ĝi, vualitaj per konstituciaj formoj? Eĉ la antaŭtagon kaj dum la februaraj bataloj la gvidantaro de l'aŭstra socialdemokratio forlasis la heroece batalintan „Schutzbund" izolita de l' vastaj amasoj kaj venigis la aŭstran proletaron al malvenko.

Ĉu estis neevitebla la venko de l' faŝismo en Germanio? Ne, ĝin povis malokazigi la germana laborista klaso.

Sed por tio ĝi devis elbatali la starigon de unueca antifaŝista proleta fronto, devigi la gvidantojn de l' socialdemokratio ĉesigi la kampanjon kontraŭ komunistoj kaj akcepti la multfojajn proponojn de l' kom. partio pri unueco de agoj kontraŭ la faŝismo.

Ĝi devis ĉe la ofensivo de l' faŝismo kaj ĉe la laŭgrada likvido de l' burĝdemokratiaj liberoj fare de la burĝaro, ne kontentiĝi per la vortaj rezolucioj de l' socialdemokratio, sed respondi per vera amasa batalo, malfaciliganta la faŝistajn planojn de l' germana burĝaro.

Ĝi devis ne allasi la malpermeson de l' ruĝfrontbatalanta asocio per la registaro Braun - Sewering, sed starigi inter ĝi kaj la preskaŭ milion-membra „Reichsbanner" batalkontakton kaj devigi Braun kaj Sewering armi tiun kaj alian por la repuŝo kaj disbato de l' faŝistaj bandoj.

Ĝi devis igi la gvidantojn de l' socialdemokratio, ĉefintaj la registaron de Prusio, akcepti defendrimedojn kontraŭ la faŝismo, aresti la faŝistajn gvidan-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

tojn, fermi ilian gazetaron, konfiski iliajn materialajn rimedojn kaj la rimedojn de l' kapitalistoj, subvenciintaj la faŝistan movadon, dissolvi la faŝistajn organizojn, forpreni ilian armilaron ktp.

Plue ĝi devis elbatali la restarigon kaj plilarĝigon de ĉiuj formoj de socia helpo kaj la starigon de moratorio kaj krizaj monhelpoj por la kamparanoj, malriĉiĝantaj sub la influo de l' krizoj, je la kostoj de l' impostado de bankoj kaj trustoj, kaj tiamaniere certigi al si la helpon de l' laborula kamparanaro. Tio ne estis farita pro la kulpo l' socialdemokratio de Germanio kaj tial la faŝismo povis venki.

Ĉu nepre la burĝaro kaj nobeloj devis retriumfi en Hispanio, en lando, kie tiom favore kombiniĝas la fortoj de l' proletara revolto kun la kamparana milito?

La hispanaj socialistoj estis en la registaro ekde l'unuaj tagoj de la revolucio. Ĉu ili starigis batalkontakton inter la laboristaj organizoj de ĉiuj politikaj tendencoj, inkluzive la komunistojn kaj anarkistojn, ĉu ili kunfirmigis la laboristan klason je unueca sindikata organizo? Ĉu ili postulis la konfiskon de ĉiuj bienulaj, ekleziaj, monakejaj teroj por la kamparanoj, por venigi la lastajn sur la flankon de l'revolucio? Ĉu ili provis batali por la nacia memdifino de l'katalunoj, baskoj, por la liberigo de l' Maroko? Ĉu ili efektivigis purigon de l'armeo je la monarkistaj kaj faŝistaj elementoj, preparinte ĝian transiron sur la flankon de l'laboristoj kaj kamparanoj? Ĉu ili dissolvis la civilan gvardion malamegitan de l'popolo, la ekzekutiston de ĉiuj popolaj movadoj? Ĉu ili frapis sur la faŝistan partion de Gil Robles, sur la potencon de l'katolika eklezio? Ne, nenion el tio ili faris. Ili depuŝis la multfojajn proponojn de l'komunistoj pri unueco de agoj kontraŭ la ofensivo de l'burĝ-bienula reakcio kaj faŝismo,



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

ili realigis elektoleĝojn, ebligantajn al la reakcio akiri la plimulton en la Kortesoj (parlamento), leĝojn, punantajn la popolajn movadojn, leĝojn, laŭ kiuj oni juĝas nun la heroajn asturiajn ministojn. Ili pafmortigis per la manoj de l'civila gvardio la kamparanojn, batalintajn pro la tero, ktp.

Tiel, la socialdemokratio purigis la vojon al la regado por la faŝismo same en Germanio, kaj en Aŭstrio, kaj en Hispanio, disorganizante kaj dissplitigante la vicojn de l'laborista klaso.

Kamaradoj, la faŝismo venkis ankaŭ tial ke la proletaro okazigis izolita de siaj naturaj aliancanoj. La faŝismo venkis tial ke ĝi prosperis sekvigi post sin grandajn amasojn de l'kampularo, dank' al tio ke la socialdemokratio je la nomo de l'laborista klaso kondukis laŭesence kontraŭ-kamparanan politikon. La kamparano vidis ĉe la regado vicon da socialdemokrataj registaroj, kiuj, en ĝiaj okuloj, reprezentis la regadon de l'laborista klaso, sed neniu el ili dissolvis la mizeron de l'kamparanoj, neniu el ili donis teron al la kampularo. La socialdemokratio en Germanio ne tuŝis la bienulojn; ĝi kontraŭagis la strikojn de l'kamplaboristoj; kaj rezulte la kamplaboristoj en Germanio ankoraŭ multe pli frue antaŭ la veno de Hitler al la regado forlasis la reformistajn sindikatojn kaj en la plimulto el okazoj transiris al la „Ŝtalhelmo“ kaj al la nacisocialistoj.

La faŝismo venkis ankaŭ tial ke ĝi prosperis penetri en la vicojn de l'junularo dum la socialdemokratio delogis la laboristan junularon de l'klasbatalo, kaja la revolucia proletaro ne disvolvis meze de l'junularo la necesan edukan laboron kaj nesufiĉe atentis ĝiajn specifajn interesojn kaj bezonoj. La faŝismo kaptis la speciale akran ĉe la junularo bezonon de batala aktiveco kaj enlogis konsiderindan parton de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 27 von 188

ĝi en siajn bataltaĉmentojn. La nova generacio de l'vira kaj virina junularo ne trapasis la terurojn de l'milito. Ĝi spertas sur siaj ŝultroj la tutan pezon de l'ekonomia krizo, de l'senlaboreco kaj de l'disfalo de l'burĝa demokratio. Ne vidante perspektivojn al la estonto, konsiderindaj tavoloj de l'junularo montriĝis precipe influeblaj al la faŝista demagogio, pentrinta al ili allogan estonton post la venko de l' faŝismo.

En ĉi konekso ni ne povas ankaŭ pasi preter vico da eraroj de l' komunistaj partioj, eraroj, kiuj malakcelis nian batalon kontraŭ la faŝismo, En niaj vicoj estis iam neallasinda subtakso de l' faŝisma danĝero, kiu ankoraŭ ĝis nun ne ĉie estas likvidita. Tiaj estas la starpunktoj, kiuj estis antaŭe en niaj partioj, ke „Germanio ne estas Italio" en tiu senco, ke la faŝismo povis venki en Italio, sed ties venko en Germanio estas ekskludita ĉar ĝi estas industrie alte disvolvita, alte kultura lando, havanta kvardekjarajn tradiciojn de l'laborista mavado, kie la faŝismo estas neebla. Aŭ tiaspecaj starpunktoj kiuj estas nun, ke en landoj de „klasika" burĝa demokratio ne estas grundo por la faŝismo. Tiaj starpunktoj povis kaj povas kontribui al la malpliigo de la viglatento rilate la faŝisman danĝeron kaj malfaciligi la mobilizon de l'proletaro por la batalo kontraŭ la faŝismo.

On povas mencii ne malmulte da okazoj, kiam la komunistoj estis surprizitaj per la faŝista renverso. Rememoru Bulgarion, kie la gvidantaro de nia partio okupis „neŭtralan", sed laŭesence oportunistan pozicion rilate la ŝtatrenverson de l'9.junio 1923; Polion, kie en majo 1926 la gvidantaro de l'komunista partio, malĝuste taksinte la movofortojn de l'pola revolucio, ne kapablis distingi la faŝistan karakteron de l'ŝtatrenverso de Pilsudski kaj sin trenis



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 28 von 188

ĉe la vosto de l'eventoj; Finnlandon, kie nia partio sin bazis sur malĝusta imago pri malrapida, laŭgrada faŝizado[10] kaj malrimarkis la preparitan de l'gvidanta grupo de l'burĝaro faŝistan renverson, surprizintan la partion kaj la laboristan klason neatendite.

Kiam la nacisocialismo jam estiĝis minaca amasa movado en Germanio, kamaradoj, kiel Heinz Neuman, por kiuj la registaro de Brüning jam estis registaro de l' faŝista diktaturo, superfiere deklaris: „Se la hitlera „Tria regno" iam venos, do nur je unu kaj duona metroj sub la tero, kaj super ĝi estos la triumfanta laborista regado".

Niaj kamaradoj en Germanio longe subtaksis la dolorpremitan nacian senton kaj indignon de l'amasoj kontraŭ Versajlo, malatente rilatis al la ŝanceladoj de l'kampulara kai etburĝaro, malfruiĝis kun la programo de socia kaj nacia emancipo, kaj kiam ili starigis ĝin, ne scipovis akomodi ĝin al la konkretaj bezonoj kaj al la nivelo de l'amasoj, ne scipovis eĉ vaste popularigi ĝin en la amasoj.

En pluraj landoj al la necesa disvolvo de l'amasa batalo kontraŭ faŝismo estis substituataj senfrukta rezonado pri la karaktero de l'faŝismo „ĝenerale" kaj sektana mallarĝeco rilate la starigon kaj solvon de l'aktualaj politikaj taskoj de l'partio.

Kamaradoj, ni parolas pri la kaŭzoj de la venko de l'faŝismo, ni indikas la historian respondecon de l'socialdemokratio pri la malvenko de l'laborista klaso, ni notas ankaŭ niajn proprajn erarojn en la batalo kontraŭ la faŝismo ne simple tial ke ni deziras fosserĉi en la pasinto. Ni ne estas vivoforaj historiistoj, ni, la batalaj agantoj de l'laborista klaso, havas la devon respondi la demandon, kiu turmentas milionojn da laboristoj: ĉu oni povas kaj kiamaniere malebligi la venkon de

l' faŝismo? Kaj ni respondas al tiuj milionoj da laboristoj: jes, kamaradoj, bari la vojon al faŝismo oni povas. Tio estas tute ebla. Tio dependas de ni mem - de l' laboristoj, kamparanoj, de ĉiuj laboruloj!

## LA FAŜISMO ESTAS KRUELA, SED NESTABILA REĜIMO.

La faŝisma diktaturo de l'burĝaro estas reĝimo kruela, sed nestabila.

En kio estas la ĉefaj kaŭzoj de l'nestabileco de la faŝisma diktaturo?

La faŝismo, intencinta venki la malkonkordon kaj kontradikciojn en la tendaro de l'burĝaro, ankoraŭ pli akrigas tiujn kontradikciojn. La faŝismo penas starigi sian politikan monopolon, perforte neniigante la aliajn politikajn partiojn. Sed la esto de l'kapitalisma sistemo, la ekzisto de diversaj klasoj kaj la pliakriĝo de l'klasaj kontradikcioj kondukas neeviteble al la disŝanceliĝo kaj kreviĝo de l'politika monopolo de l'faŝismo. Ĝi ne estas soveta lando, kie la diktaturo de l'proletaro estas ankaŭ efektivigata per monopola partio, sed kie tiu ĉi politika monopolo respondas al la interesoj de l'milionoj kaj apogas sin pli kaj pli sur la konstruadon de l'senklasa socio. En faŝisma lando la partio de faŝistoj ne povas konservi por longe sian monopolon ĉar ĝi ne estas kapabla meti al si la taskon neniigi la klasojn kaj la klasajn kontradikciojn. Ĝi neniigas la legalan ekzistadon de l'burĝaj partioj, sed pluraj el ili daŭrigas konservi sian nelegalan ekzistadon, kaj la komunista partio en la nelegalaj kondiĉoj marŝas antaŭen, hardiĝas kaj gvidas la batalon de l'proletaro kontraŭ la faŝisma diktaturo. Tiamaniere la politika monopolo de l'faŝismo sub la frapoj de l'klasaj kontradikcioj devas eksplodi.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 30 von 188

Alia kaŭzo de l'nestabileco de l'faŝisma diktaturo estas en tio ke la kontrasto inter la kontraŭ-kapitalisma demagogio de l'faŝismo kaj la politiko de plej rabeca pliriĉiĝo de l'monopolista burĝaro plifaciligas la senvualigon de l'klasa esenco de l'faŝismo kaj kondukas al la disŝanceligo kaj plimallarĝigo de ĝia amasa bazo.

Plue, la venko de l'faŝismo elvokas la profundajn malamon kaj indignon de l'amasoj, kontribuas al la revoluciigo de ili kaj donas fortegan puŝon al la unueca fronto de l'proletaro kontraŭ la faŝismo.

Kondukante politikon de ekonomia naciismo (aŭtarkio) kaj kaptante ĉiam pli grandan parton de l'popola enspezo por la preparado de milito, la faŝismo subfosas la tutan ekonomion de la lando kaj pliakrigas la ekonomian militon inter la kapitalismaj ŝtatoj. Ĝi aldonas al la konfliktoj, aperantaj interne de l'burĝaro karakteron de krudaj kaj sangozaj interpuŝiĝoj, kio subfosas la stabilecon de l'faŝista ŝtata reĝimo en la okuloj de l'popolo. Reĝimo, kiu mortigas proprajn adeptojn, kiel tio estis la 30-n de junio pasintjare en Germanio, faŝisma reĝimo, kontraŭ kiu kun armiloj en manoj batalas alia parto de l'faŝista burĝaro (la naci-socialista puĉo en Aŭstrio, la akraj elpaŝoj de apartaj faŝistaj grupoj kontraŭ la faŝista registaro en Polio, Bulgario, Finnlando kaj aliaj landoj), tia reĝimo ne povas havi longe prestiĝon en la okuloj de l'vastaj etburĝaj amasoj.

La laborista klaso devas scipovi utiligi la kontradikciojn kaj konfliktojn en la tendaro de l'burĝaro, sed ĝi ne povas havi iluziojn, ke la faŝismo sin mem elĉerpos. La faŝismo ne krulos[11] aŭtomatece. Nur la revolucia aktiveco de l'laborista klaso helpos utiligi la konfiktojn neeviteble aperantajn en la tendaro de l'burĝaro por la subfoso de l'faŝisma diktaturo kaj ĝia renverso.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 31 von 188

Likvidante la restojn de-l'burĝa demokratio, farante el la malkaŝa perforto sistemon de regado, la faŝismo subfosas la demokratiajn iluziojn kaj la prestiĝon de l'leĝeco en la okuloj de l'laborulaj amasoj. Tio okazas des pli en tiuj landoj, kie, kiel ekzemple, en Aŭstrio kaj Hispanio, la laboristoj kun la armiloj en manoj elpaŝis kontraŭ la faŝismo, En Aŭstrio la heroeca batalo de l'Schutzbund [12] kaj de l'komunistoj, malgraŭ la malvenko, malfirmigis de l'komenco mem la stabilecon de l'faŝisma diktaturo. En Hispanio la burĝaro ne prosperis surmeti al la laboruloj la faŝisman buŝumon. La armitaj bataloj en Aŭstrio kaj Hispanio venigis al tio, ke ĉiam pli vastaj amasoj de l'laborista klaso ekkonscias la neceson de revolucia klasa batalo.

Nur tiaj monstraj filistroj, kiel la lakeoj de l'burĝaro, kiel la plej malnova teoriulo de l' II Internacio Karl Kautsky, povas jeti al la laboristoj la riproĉon ke oni ne devis, evidente, ekpreni la armilojn en Aŭstrio kaj Hispanio. Kiel aspektus nun la laborista movado en Aŭstrio kaj Hispanio se la laborista klaso de tiuj-ĉi landoj sin gvidus per la perfidaj konsiloj de l'Kautsky'oj? La laborista klaso travivus tiam profundan demoralizon en siaj vicoj.

„La skolo [13] de l'civila milito, — diras Lenin, — ne pasas por la popoloj senrezulte. Ĝi estas peza skolo kaj la kompleta kurso ĝia n e e v i t e b l e entenas la venkojn de l'kontraŭrevolucio, la furiozajojn de l'krueliĝintaj reakciuloj, la sovaĝajn venĝopunojn de l'malnova reĝimo al la ribeluloj ktp. Sed nur ekstremaj pedantoj kaj sencerbiĝintaj mumioj povas ploraĉi pri la eniro de l'popoloj en tiun suferigan skolon; tiu-ĉi skolo instruas al la subpremitaj klasoj la kondukadon de l'civila milito, instruas triumfoplenan revolucion, koncentrigas en la amasoj de l'nuntempaj laboristoj tiun mal-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 32 von 188

amon, kiun eterne kaŝas en si la sklavoj, batpremitaj, malsagacaj, malkleraj, kaj kiu kondukas al la plej grandaj historiaj heroagoj de l'sklavoj, ekkonsciintaj la malhonoron de sia sklaveco" [14].

La venko de l' faŝismo en Germanio, kiel oni scias, sekvigis novan ondon de faŝisma ofensivo, kiu venigis en Aŭstrio al la provoko de Dolfuss, en Hispanio al novaj ofensivoj de l'kontraŭrevolucio kontraŭ la revoluciaj akiroj de l'amasoj, en Polio al la faŝisma reformo de l'konstitucio, kaj en Francio antaŭenvipis la armitajn taĉmentojn de l'faŝistoj en februaro 1934 al provo de ŝtatrenverso. Sed tiu-ĉi venko kaj la furiozajoj de l'faŝisma diktaturo elvokis respondan movadon de unueca proletara fronto kontraŭ la faŝismo sur internacia skalo. La bruligo de l'"Reichstag" [15], kiu estis signalo de ĝenerala ofensivo de l'faŝismo kontraŭ la laborista klaso, la ekkapto kaj disrabo de l'sindikatoj kaj de aliaj laboristaj organizoj, la ĝemoj de l' turmentitaj antifaŝistoj, elirantaj el la keloj de l' faŝistaj kazernoj kaj koncentraj tendaroj, okulfrape montris al la amasoj, kien venigis la reakcia skismiga rolo de l' gvidantoj de la germana socialdemokratio, malakceptintaj la proponojn de l' komunistoj pri kuna batalo kontraŭ la antaŭenmarŝanta faŝismo kaj konvinkas pri la neceso de unuigo de ĉiuj fortoj de l' laborista klaso por la renverso de l' faŝismo.

La venko de Hitler donis ankaŭ decidan antaŭenpuŝon al la kreo de unueca fronto de l'laborista klaso kontraŭ la faŝismo en Francio. La venko de Hitler ne nur vekis ĉe la laboristoj timon je la sorto de l'germanaj laboristoj, ne nur ekflamigis la malamon kontraŭ la ekzekutistoj de iliaj germanaj klasfratoj, sed ankaŭ plifirmigis en ili la rezolutecon [16] neniaokaze allasi en sia lando tion, kio okazis al la laborista klaso de Germanio.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

La fortega emo al unueca fronto en ĉiuj kapitalismaj landoj montras ke la lecionoj de l'malvenko ne perdiĝas senrezulte. La laborista klaso komencas agi novmaniere. La iniciativo de l'kom. partio en la organizo de unueca fronto kaj la senlima sindonemo de l'komunistoj, de l'revoluciaj laboristoj en la batalo kontraŭ la faŝismo sekvigis ankoraŭ neniam estintan kreskon de l'prestiĝo de la Komunista Internacio. Samtempe disvolviĝas profunda krizo de l' II Internacio, signalo al kiu estis la bankroto de l'germana socialdemokratio.

La socialdemokrataj laboristoj povas ĉiam pli okulfrape konvinkiĝi pri tio ke la faŝista Germanio kun ĉiuj ĝiaj teruroj kaj barbareco estas finrezulte — la sekvo de l'socialdemokrata politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro. Tiuj-ĉi amasoj ĉiam pli komprenigas al si, ke la vojo, tra kiu kondukis la proletaron la gvidantoj de l' germana socialdemokratio, ne devas esti ripetita. Ankoraŭ neniam en la tendaro de l' II Internacio esti tioma idea disvago kiel nun. Progresas la diferencigo en ĉiuj socialdemokrataj partioj. El iliaj vicoj elstariĝas du ĉefaj tendaroj: apud la ekzistanta tendaro de reakciaj elementoj, kiuj ĉiamaniere provas konservi la blokon de l'socialdemokratio kun la burĝaro kaj kun furiozo malakceptas la unuecan fronton kun komunistoj, komencas formiĝi la tendaro de l' revoluciaj elementoj, havantaj dubon pri la ĝusteco de l'politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro, starantaj por la kreo de unueca fronto kun komunistoj kaj komencantaj pli kaj pli transiri sur la pozicojn de l'revolucia klasa batalo.

Tiel la faŝismo, aperinta rezulte de l'dekadenco de la kapitalisma sistemo, agas finrezulte kiel faktoro



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

d e t i e s p l u a d i s k o m p o n i g o. Tiel la faŝismo, akceptante la funkcion entombigi la marksismon, la revolucian movadon de l'laborista klaso, rezulte de l' viv-dialektiko de la klasbatalo kondukas mem al la d i s v o l v o d e t i u j f o r t o j, kiuj devas esti ĝiaj tombistoj, tombistoj de l' kapitalismo.

---

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

## II. LA UNUECA FRONTO DE L' LABORISTA KLASO KONTRAŬ LA FAŜISMO.

Kamaradoj! Milionoj da laboristoj kaj laboruloj en la kapitalismaj landoj metas la demandon: kiel malhelpi la venon de l' faŝismo al regado kaj kiel renversi la venkintan faŝismon? La Komunista Internacio respondas: la unua, kion oni devas fari, de kio necesas komenci, ĝi estas la kreo de unueca fronto, la starigo de unueco de agoj de l' laboristoj en ĉiu entrenejo, en ĉiu distrikto, en ĉiu regiono, en ĉiu lando, en la tuta mondo. La unueco de agoj de l' proletaro sur nacia kaj internacia skaloj — jen la potenca armilo, kiu faras la laboristan klason kapabla ne nur por sukcesa defendo, sed ankaŭ por sukcesa kontraŭofensivo kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la klasa malamiko.

### SIGNIFO DE L' UNUECA FRONTO.

Ĉu ne estas klare, ke la kunaj agoj de l' adeptoj de partioj kaj organizoj de du Internacioj—la Komunista kaj la II Internacio — plifaciligus la rebaton de l' amasoj al la faŝista alpremo kaj pligrandigus la politikan pezon de l' laborista klaso?

La kunaj agoj de l' partioj de ambaŭ Internacioj kontraŭ la faŝismo tamen ne reduktiĝus al la influo



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 36 von 188

suri liajn nunajn adeptojn, sur la komunistojn kaj socialdemokratojn, ili kaŭzus ankaŭ fortegan efikon sur la vicojn de l' katolikaj, anarkistaj kaj neorganitaj laboristoj, eĉ sur tiujn, kiuj provizore fariĝis viktimoj de l' faŝista demagogio.

Pli ol tio, potenca unueca fronto de l' proletaro kaŭzus ankaŭ grandegan influon sur ĉiujn aliajn tavolojn de l' laborula popolo, sur la urban etburĝaron, sur la intelektularon. La unueca fronto sugestus al la ŝancelantaj tavoloj fidon al la forto de l' laborista klaso.

Sed tio estas ankoraŭ ne ĉio. La proletaro de l' imperialismaj landoj havas eventualajn aliancanojn ne nur en la persono de l' laboruloj de sia propra lando, sed ankaŭ en la subpremitaj nacioj de l' kolonioj kaj duonkolonioj.

Je kiom la proletaro estas dissplitigita sur nacia kaj internacia skalo, je kiom unu el ĝiaj partoj subtenas la politikon de kunlaborado kun la burĝaro kaj precipe ties subpreman reĝimon en kolonioj kaj duonkolonioj, tio depuŝas de l' laborista klaso la subpremitajn popolojn de l' kolonioj kaj duonkolonioj kaj malplifortigas la tutmondan antiimperialisman fronton. Ĉiu paŝo sur la vojo al unueco de agoj, direktita al la subteno de l' liberiga batalo de l' koloniaj popoloj fare de l' proletaro de imperialismaj metropoloj signifas la transformon de l' kolonioj kaj duonkolonioj je unu el la ĉefaj rezervoj de l' mondproletaro.

Se ni, fine, konsideros ke la internacia unueco de agoj de l' proletaro sin apogas sur la konstante kreskantan forton de l' proleta ŝtato, de l'lando de socialismo: Sovet-Unio, ni vidos do, kiajn larĝajn perspektivojn malfermas la realigo de l' unueco de agoj de l' proletaro sur nacia kaj internacia skalo.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 37 von 188

La starigo de l' unueco de agoj de ĉiuj partoj de l' laborista klaso, sendepende de ties aparteno al tiu aŭ alia partio kaj organizo, estas necesa ankoraŭ antaŭ tio, kiam la plimulto de l' laborista klaso unuiĝos por la batalo pro la renverso de l' kapitalismo kaj la triumfo de l' proletara revolucio.

Ĉu eblas efektivigi tiun-ĉi unuecon de agoj de l' proletaro en apartaj landoj kaj en la tuta mondo? Jes, eblas. Kaj eblas jam nun. La Komunista Internacio ne metas por la unueco de agoj iujn kondiĉojn krom unu, elementa, akceptebla por ĉiuj laboristoj. Nome: ke la unueco de agoj estu direktita kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, kontraŭ la minaco de milito, kontraŭ la klasa malamiko. Jen nia kondiĉo.

## PRI LA ĈEFAJ ARGUMENTOJ DE L' KONTRAŬULOJ DE LA UNUECA FRONTO.

Kion povas kontraŭdiri kaj kion kontraŭdiras la kontraŭuloj de la unueca fronto?

„Por la komunistoj la lozungo de unueca fronto estas nur manovro", — diras unuj. Sed se ĉi-tio estus manovro, — respondas ni, — kial do vi ne senvualigu la „komunistan manovron" per via honesta partopreno en la unueca fronto? Ni deklaras malkaŝe: ni volas la unuecon de agoj de l' laborista klaso por ke la proletaro plifortiĝu en sia batalo kontraŭ la burĝaro, por ke, defendante hodiaŭ siajn ĉiutagajn interesojn kontraŭ la antaŭenmarŝanta kapitalo, kontraŭ la faŝismo, ĝi estu kapabla morgaŭ krei la premisojn por sia definitiva emancipo.

„La komunistoj nin atakas", — diras la aliaj. Sed, aŭskultu, ni jam plurfoje deklaris: ni neniun atakos, ne la personojn, nek la organizojn, nek la parti-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 38 von 188

ojn, kiuj estas por la unueca fronto de l' proletaro kontraŭ la klasa malamiko. Sed en la sama tempo ni havas la devon — en la interesoj de l'proletaro kaj de ties afero—kritiki tiujn personojn, tiujn organizojn kaj partiojn, kiuj malhelpas al la unueco de agoj de l' laboristoj.

„Ni ne povas formi unuecan fronton kun la komunistoj ĉar ili havas alian programon", — diras la triaj. Sed vi ja asertas ke vi havas programon malsimilan al la programo de l' burĝaj partioj, sed tio ne malhelpis kaj ne malhelpas al vi eniri koalicion kun tiuj partioj.

„La burĝ demokrataj partioj estas pli bonaj aliancanoj kontraŭ la faŝismo ol la komunistoj" — diras la kontraŭuloj de l' unueca fronto kaj la defendantoj de l' koalicio kun la burĝaro. Sed kion diras la sperto de Germanio? Ja la socialdemokratoj faris blokon kun tiuj „pli bonaj" aliancanoj. Kaj kiaj estas la rezultoj?

„Se ni starigos unuecan fronton kun la komunistoj, la etburĝoj ektimos la „ruĝan danĝeron" kaj transkuros al la faŝistoj" — ni aŭdas sufiĉe ofte. Sed ĉu la unueca fronto minacas al la kamparanoj, etkomercistoj, laborula intelektularo? Ne, la unueca fronto minacas al la grandburĝaro, la financaj magnatoj, junkroj kaj aliaj ekspluatistoj kies reĝimo portas kompletan ruinigon al ĉiuj tiuj-ĉi tavoloj.

„La socialdemokratio estas por la demokratio, sed la komunistoj por la diktaturo, tial ni ne povas starigi kun la komunistoj unuecan fronton", — diras pluraj gvidantoj de l'socialdemokratio. Sed ĉu ni proponas nun al vi unuecan fronton por la proklamo de l'diktaturo de la proletaro? Ni ja dume tion ne proponas.

„La komunistoj agnosku la demokration, elpaŝu por ĝin defendi". Al tio ni respondas: ni estas adep-

toj de l'soveta demokratio de l'laboruloj, la plej konsekvencema demokratio en la mondo. Sed ni defendas kaj defendos en la kapitalismaj landoj ĉiun spanon[17] da burĝaj demokratiaj liberoj, kiujn atencas la faŝismo kaj la burĝa reakcio ĉar tion diktas la interesoj de l'klasbatalo de la proletaro.

„Sed la malgrandaj komunistaj partioj nenion aldonas per sia partopreno al tiu unueca fronto, kiun efektivigas la labora partio", — diras, ekzemple, la laborpartiaj gvidantoj en Anglio. Sed rememoru, la samon estis dirantaj la aŭstraj socialdemokrataj gvidantoj rilate al la malgranda aŭstria komunista partio. Kaj kion montris la eventoj? Ne la aŭstria socialdemokrata partio kun Otto Bauer kaj Renner ĉe la kapo, evidentiĝis prava, sed la malgranda aŭstria komunista partio, kiu ĝustatempe signalis pri la faŝisma danĝero en Aŭstrio kaj vokis la laboristojn al la batalo. Ja la tuta sperto de l'laborista movado montris ke la komunistoj eĉ ĉe sia relativa malgrandnombreco estas la motoro de l'batal-aktiveco de la proletaro. Krom tio oni ne devas forgesi ke la komunistaj partioj de Aŭstrio aŭ Anglio — tio estas ne nur tiuj mildekoj da laboristoj, kiuj estas adeptoj de l'partio, tio estas p a r t o j de l'tutmonda komunista movado, tio estas s e k c i o j d e l'K o m u n i s t a I n t e r n a c i o, kies a v a n g a r d a partio estas la partio de l'proletaro jam venkinta kaj reganta sur unu sesono de l'terglobo.

„Sed la unueca fronto ne malhelpis la venkon de l'faŝismo en Saario" — elŝovas kontraŭdiron la kontraŭuloj de l'unueca fronto. Stranga logiko estas ĉe tiuj-ĉi sinjoroj! Ili komence faras ĉion por certigi la venkon de l'faŝismo kaj poste rikanas ke la unueca fronto, al kiu ili venis lastmomente, ne venigis la venkon de l'laboristoj.

„Se ni formus unuecan fronton kun la komunistoj,



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 40 von 188

ni devus eliri el la koalicio kaj en la registaron eniros reakciaj kaj faŝistaj partioj", — diras la socialdemokrataj ministroj, sidantaj en la registaroj en diversaj landoj. Bone. Ĉu estis la germana socialdemokratio en koalicia registaro? Estis. Ĉu estis en la registaro la aŭstra socialdemokratio? Ankaŭ estis. Ĉu estis la hispanaj socialistoj en la sama registaro kun la burĝaro? Estis ankaŭ ili. Ĉu malhelpis en tiuj-ĉi landoj la partopreno de l'socialdemokratio en la koaliciaj registaroj la atakon de l'faŝismo kontraŭ la proletaro? Ne, ne malhelpis. Do estas klare kiel tago ke la partopreno de l'socialdemokrataj ministroj en la burĝa registaro ne estas baro kontraŭ la faŝismo.

„La komunistoj agas diktatorece, ili deziras ĉion al ni ordoni kaj dikti". Ne. Ni nenion ordonas kaj nenion diktas. Ni nur faras niajn proponojn, pri kiuj ni estas konvinkitaj, ke ilia realigo respondas al la interesoj de l'laborula popolo. Tio estas ne nur la rajto, sed la devo de ĉiuj elpaŝantoj je la nomo de l'laboristoj. Vi timas la „diktaturon" de l'komunistoj? Ni komune prezentu al la laboristoj ĉiujn proponojn, viajn kaj niajn, komune pritraktu ilin kune kun ĉiuj laboristoj kaj elektu tiujn proponojn, kiuj estas la plej utilaj por la afero de l'laborista klaso.

Do, ĉiuj-ĉi argumentoj kontraŭ la unueca fronto ne eltenas iun ajn kritikon. Tio estas pli ol ĉio pretekstoj de reakciaj gvidantoj de l'socialdemokratio, preferantaj sian unuecan fronton kun la burĝaro al la unueca fronto de l'proletaro.

Ne, tiuj-ĉi pretekstoj ne pasos! La internacia proletaro elsuferis la sekvojn de l'skismo de la laborista movado kaj ĉiam pli konvinkiĝas pri tio ke la unueca fronto, la unueco de agoj de l'proletaro sur nacia kaj internacia skalo estas necesaj kaj tute eblaj.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 41 von 188

## ENHAVO KAJ FORMOJ DE L'UNUECA FRONTO

Kio estas kaj kio devas esti la ĉefa enhavo de l'unueca fronto ĉe la nuna etapo? La defendo de l'senperaj ekonomiaj kaj politikaj interesoj de l'laborista klaso, la defendo de ĝi kontraŭ la faŝismo, devas esti la deira punkto kaj konsistigi la ĉefan enhavon de l'unueca fronto en ĉiuj kapitalismaj landoj.

Ni ne devas nin limigi nur per nudaj alvokoj al la batalo pro la proletara diktaturo, sed trovi kaj elŝovi tiajn losungojn kaj formojn de batalo, kiuj sekvu el la vivaj bezonoj de l' amasoj, el la nivelo de ilia batalkapablo ĉe la nuna etapo de disvolvo.

Ni devas montri al la amasoj, kion ili faru hodiaŭ por sin defendi kontraŭ la kapitalista rabado kaj la faŝista barbareco.

Ni devas strebi[18] la starigon de plej larĝa unueca fronto per la kunaj agoj de laboristaj organizoj diverstendencaj por la defendo de l' vivinteresoj de la laborulaj amasoj.

Tio signifas, unue, kunan batalon por la efektiva transmeto de l' sekvoj de la krizo sur la ŝultrojn de la regantaj klasoj, sur la ŝultrojn de l' kapitalistoj, bienuloj, unuvorte, sur la ŝultrojn de la riĉuloj.

Due, kunan batalon kontraŭ ĉiuj formoj de faŝisma ofensivo, por la defendo de l' batalakiroj kaj rajtoj de l' laboruloj, kontraŭ la likvido de l' burĝdemokratiaj liberoj.

Trie, kunan batalon kontraŭ la alŝoviĝanta danĝero de imperialista milito, tian batalon, kiu malfaciligu ĝian preparadon.

Ni devas senĉese preparadi la laboristan klason al rapida ŝanĝo de formoj kaj metodoj de batalo ĉe aliiĝo de l' cirkonstancoj. Laŭme-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

zure de l' kresko de la laborista klaŝo kaj plifortigo de l' unueco de la laborista klaso, ni devas iri plue: prepari la transiron el la defendo al la ofensivo kontraŭ la kapitalo, direktocelante la organizon de amasa politika striko. Ĉe tio nepra kondiĉo de tia striko devas esti la partoprenigo en ĝi de l' ĉefaj sindikatoj de ĉiu aparta lando.

La komunistoj, certe, ne povas kaj ne devas eĉ por minuto rezigni je sia memstara laboro pri komunisma klerigo, organizo kaj mobilizo de l' amasoj. Tamen en la celo certigi al la laboristoj la vojojn al la unueco de agoj necesas samtempe elbatali tiel mallongdaŭrajn, kiel ankaŭ longdaŭrajn, kontraktojn pri kunaj elpaŝoj kun la socialdemokrataj partioj, reformistaj sindikatoj kaj aliaj organizoj de laboruloj kontraŭ la klasaj malamikoj de l' proletaro. La ĉefan atenton ĉe tio necesos direkti al la disvolvo de amasaj elpaŝoj surloke, efektivigataj de l' bazaj organizoj, per lokaj kontraktoj.

Lojale plenumante la kondiĉojn de ĉiuj kontraktoj faritaj kun ili, ni senkompate senvualigos ĉian sabotagon kontraŭ la kunaj agoj fare de personoj kaj organizoj, partoprenantaj en la unueca fronto. Al ĉiuj provoj malsukcesigi la kontraktojn, — kaj provoj, eble, okazos, — ni respondos per apelo al la amasoj, daŭrigante senĉesan batalon por la restarigo de l' subrompita unueco de agoj.

Kompreneble, la konkreta efektivigo de l' unueca fronto en diversaj landoj iros diversmaniere, akceptos diversajn formojn depende de l' stato kaj karaktero de l' laboristaj organizoj, de ilia politika nivelo, de l' konkreta cirkonstancaro de l' konsiderata lando, de l' okazantaj moviĝoj en la internacia laborista movado ktp.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

Tiaj formoj povas, ekzemple, esti: koordinitaj kunaj agoj de l' laboristoj de okaz'al okazo pro konkretaj kaŭzoj, konkretaj revendikoj[19] aŭ sur la bazo de komuna platformo; koordinitaj agoj en apartaj entreprenejoj aŭ fakoj de produktado; koordinitaj agoj en loka, regiona, nacia aŭ internacia skalo; koordinitaj agoj en la afero de l' organizo de ekonomia batalo de l' laboristoj, efektivigo de amasaj politikaj agoj, en la organizo de kuna sindefendo kontraŭ la faŝistaj atakoj; koordinitaj agoj en la afero de l' helpo al la enprizonigitoj kaj iliaj familioj; en la regiono de batalo kontraŭ la socia reakcio; kunaj agoj en la afero de defendo de l' interesoj de la junularo kaj virinoj; en la regiono de kooperacio, kulturo, sporto ktp. ktp.

Estus nesufiĉe sin kontentigi per la nura faro de pakto pri kunaj agoj kaj la kreo de kontakta komisiono el la partioj kaj organizoj partoprenantaj en la unueca fronto, t.e. similaj al tiuj, kiujn ni havas, ekzemple, en Francio. Tio estas nur la unua paŝo. La pakto estas helpa rimedo por la efektivigo de kunaj agoj, sed ĝi ankoraŭ ne estas laŭ si mem unueca fronto. Kontakta komisiono inter la gvidantaroj de l' komunista kaj socialista partioj estas necesa por plifaciligi la realigon de kunaj agoj, sed ĝi laŭ si mem estas tute ne sufiĉa por la efektiva disvolvo de l' unueca fronto, por la partoprenigo de l' plej vastaj amasoj en la batalo kontraŭ faŝismo.

La komunistoj kaj ĉiuj revoluciaj laboristoj devas klopodi por la kreo de elektitaj (kaj en la landoj de faŝisma diktaturo formitaj el la plej popularaj partoprenantoj de l' movada unuecfronta) eksterpartiaj klasaj organoj de l' unueca fron-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 44 von 188

to en la entreprenejoj, ĉe la senlaboruloj, en la laboristaj rajonoj, ĉe la urba etpopolo kaj sur la kamparo. Nur tiaj organoj povas envolvi per la movado de unueca fronto ankaŭ la grandegan neorganizitan amason de l' laboruloj, povos kontribui al la disvolvo de l' iniciativo de l' amasoj en la batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, kontraŭ la faŝismo kaj reakcio, kaj sur la bazo de tio-ĉi al la kreo de l' necesa vasta laborista aktivularo de l' unueca fronto, kreo de centoj kaj miloj da senpartiaj bolŝevikoj en la kapitalismaj landoj.

La kunaj agoj de l' organizitaj laboristoj, tio estas la bazo. Sed ni ankaŭ ne devas ellasi el la vidkampo, ke la neorganizitaj laboristoj konstituas la superantan plimulton de l' laboristoj. Tiel en Francio la nombro de organizitaj laboristoj — komunistoj, socialistoj, sindikatanoj de diversaj tendencoj — estas nur proksimume miliono, sed la tuta nombro de l' laboristoj egalas 11 milionojn. En Britio en la sindikatoj kaj partioj de ĉiuj tendencoj estas proksimume 5 milionoj. Sed ja la nombro de ĉiuj laboristoj estas difinata je 14 milionoj. En Usono estas organizitaj proksimume 5 milionoj da laboristoj, kaj da laboristoj entute estas tie 38 milionoj. Proksimume sama estas la proporcio ankaŭ en pluraj aliaj landoj. En la „normalaj" tempoj tiu-ĉi amaso staras ĝeneraltrajte ekster la politika vivo. Sed nun tiu-ĉi giganta amaso pli ka pli enmoviĝas, entiriĝas en la politikan vivon, elpaŝas sur la politika areno.

La kreo de eksterpartiaj klasaj organoj estas la plej bona formo de kondukado, plilarĝigo kaj plifortigo de l' unueca fronto en la bazo mem de l' plej vastaj amasoj. Tiuj-ĉi organoj estos la plej bona fortikaĵ'o kontraŭ ĉiuj provoj de l' malamikoj de la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 45 von 188

unueca fronto rompi la starigatan unuecon de agoj de l' laborista klaso.

## PRI LA ANTIFAŜISTA POPOLA FRONTO.

En la afero de l' mobilizo de la laborulaj amasoj por la batalo kontraŭ la faŝismo precipe grava tasko estas la kreo de larĝa popola antifaŝista fronto sur la bazo de l' proletara unueca fronto. La sukceso de l' tuta batalo de la proletaro estas intime ligita kun la starigo de batala unio de l' proletaro kun la laborula kamparanaro kaj kun la ĉefa amaso de l' urba etburĝaro, konsistigantaj la plimulton de l' loĝantaro eĉ en la industrie disvolvitaj landoj.

La faŝismo en sia agitado, dezirante konkeri tiujn ĉi amasojn por si, penas kontraŭstarigi la laborulajn amasojn de l' urbo kaj kamparo al la revolucia proletaro, timigi la etburĝon per la minacilo de l' „ruĝa danĝero". Ni devas returni la pinton kaj montri al la laborulaj kamparanoj, metiistoj kaj labora intelektularo, el kie al ĝi minacas efektiva danĝero: konkrete indiki, kiu surmetas sur la kamparanon la pezon de l' impostoj kaj depagoj, elpremas el li uzuristajn procentojn, kiu, posedante la plej bonan teron kaj ĉiujn riĉaj'ojn, forpelas la kamparanon kaj lian familon el lia farmkampo kaj kondamnas al senlaboreco kaj almozuleco. Konkrete klarigi, pacience kaj persiste klarigi, kiu senhavigas la metiistojn per impostoj, depagoj, alta lupago kaj neeltportebla por ili konkurado; kiu elj'etas sur la stratojn kaj senlaborigas la vastajn amasojn de l' labora intelektularo.

Sed tio estas nesufiĉa.

La ĉefa, la plej decida por la starigo de l' antifaŝista popola fronto — ĝi estas la rezoluta



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

elpaŝo de l' revolucia proletaro por la defendo de l' revendikoj de tiuj tavoloj kaj speciale de l' laborula kamparanaro, revendikoj, kiuj iras la linion de l' radikalaj interesoj de la proletaro, kunligante en la procezo de l' batalo la revendikojn de l' laborista klaso kun tiuj-ĉi revendikoj.

Ĉe la konstituo de l' antifaŝisma popola fronto grandan signifon havas la ĝusta rilato al tiuj organizoj kaj partioj, kie membras en konsiderinda nombro la laborula kamparanaro kaj la ĉefaj amasoj de l'urba etburĝaro.

En la kapitalistaj landoj la plimulto el tiuj-ĉi partioj kaj organizoj, tiel politikaj, kiel ankaŭ ekonomiaj, estas ankoraŭ sub la influo de l'burĝaro kaj sekvas ĝin. La socia konsisto de tiuj-ĉi partioj kaj organizoj estas diversnatura. En ili estas grandaj riĉkamparanoj apud senteraj kamparanoj, grandaj aferuloj apud etbutikistoj, sed la gvido en ili apartenas al la unuaj, al la agentoj de l'granda kapitalo. Tio devigas nin pri diferencigita rilato al tiuj-ĉi organizoj, konsiderante, ke ofte la membra amaso ne scias pri la vera politika fizonomio de sia gvidantaro. En certaj cirkonstancoj ni povas kaj devas direkti niajn klopodojn por, malgraŭ ilia burĝa gvido, altiri tiujn-ĉi partiojn kaj organizojn aŭ iujn partojn el ili al la antifaŝista popola fronto. Tia, ekzemple, estas la situacio en Francio kun la radikala partio, en Usono kun diversaj farmistaj organizoj, en Polio kun „Stronictwo Ludowe", en Jugoslavio kun la ĥorvata kamparana partio, en Bulgario kun la Terkulturista unio, en Grekio kun la agraristoj ktp. Sed sendepende de tio, ĉu estas ŝancoj altiri tiajn partiojn kaj organizojn al la popola fronto, nia taktiko ĉe ĉiuj kondiĉoj devas esti direktita al la partoprenigo de l'adherantaj[20] al ili etkamparanoj, metiistoj kaj hejmmetiistoj ktp. en la antifaŝista popola fronto.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 47 von 188

Vi vidas, sekve, ke ĉi-tie tra la tuta linio necesas fini kun la ofte okazanta en nia praktiko ignorado fuŝa rilato al diversaj organizoj de l'kamparanoj, metiistoj kaj etburĝaj amasoj de l'urbo.

## LA NODAJ PROBLEMOJ DE L'UNUECA FRONTO EN APARTAJ LANDOJ.

En ĉiu lando estas nodaj problemoj, agitantaj ĉe la nuna etapo la plej vastajn amasojn, ĉirkaŭ kiuj devas esti disvolvita la batalo por la starigo de unueca fronto. Ĝuste sonde-trovi tiujn-ĉi nodajn punktojn, nodajn problemojn — tio signifas certigi kaj plirapidigi la starigon de unueca fronto.

a) USONO.

Ni prenu, ekzemple, tian gravan landon de l'kapitalisma mondo, kia Usono. La krizo ekmovigis ĉi-tie milionajn amasojn. Ekkrulis la programo de sanigo de l'kapitalismo. Grandegaj amasoj komencas deiri de l'burĝaj partioj kaj troviĝas nun ĉe la disvojo.

La naskiĝanta usona faŝismo penas direkti la disreviĝon kaj la malkontenton de tiuj-ĉi amasoj en reakciajn faŝismajn kanalojn. Ĉe tio la specifeco de l' evoluo de la usona faŝismo estas en tio ke ĉe la nuna stadio ĝi elpaŝas kutime sub la formo de opozicio al la faŝismo, kiel tendenco „neamerikana", importita el alilando. Diference je la germana faŝismo, elpaŝinta kun kontraŭkonstituciaj lozungoj, la usona faŝismo penas sin prezenti en la rolo de batalanto por la konstitucio kaj la „amerikana demokratio". Ĝi ne prezentas ankoraŭ el si senpere minacantan forton, sed se ĝi prosperos penetri en la vastajn amasojn, seniluziiĝintajn pri la malnovaj bur-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

ĝaj partioj, ĝi povas fariĝi serioza minaco en la plej proksima tempo.

Kaj kion signifus la venko de l'faŝismo en Usono? Por la laborulaj amasoj ĝi signifus, certe, la senbridan pliintensigon de l'reĝimo de ekspluatado kaj la disbaton de l'laborista movado. Kaj kia estus la internacia signifo de ĉi venko de l'faŝismo? Usono, kiel oni scias, ne estas Hungario kaj ne Finnlando, ne Bulgario aŭ Latvio. La venko de l'faŝismo en Usono aliigus esence la tutan internacian cirkonstancaron.

Ĉu povas en tiaj kondiĉoj la usona proletaro sin kontentigi per la nura organizo de sia klaskonscia avangardo, preta iri la revolucian vojon? Ne.

Estas tute evidente ke la interesoj de l'usona proletaro postulas senprokrastan delimigon de ĉiuj ĝiaj fortoj de l'kapitalistaj partioj. Ĝi devas trovi la vojojn kaj taŭgajn formojn por ĝustatempe ne allasi la transkapton de l'malkontentaj vastaj amasoj de l'laboruloj fare de l'faŝismo. Kaj ĉi-tie necesas diri: la kreo de amasa partio de l'laboruloj, de „labor-ist-farmista partio“ povus esti tia taŭga formo en la usonaj kondiĉoj. Tia partio estus la specifa formo de amasa popola fronto en Usono, kiu devas esti kontraŭstarigata al la partioj de l' trustoj kaj bankoj, kaj ankaŭ al la kreskanta faŝismo. Tia partio ne estos, certe, socialista, nek komunista. Sed ĝi devas esti antifaŝista kaj ne devas esti antikomunista partio. La programo de ĉi-tiu partio devas esti direktita kontraŭ la bankoj, trustoj kaj monopoloj, kontraŭ la ĉefaj malamikoj de l' popolo, spekulantaj je ties malfeliĉoj. Tia partio konformos al sia celo nur en tiu okazo se ĝi defendos la aktualajn revendikojn de l' laborista klaso, batalos por vera socia leĝaro, por asekuro je senlaboreco; se ĝi batalos pro tero



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

por la blankaj kaj negraj duonfarmistoj kaj por ties liberigo je la pezo de l' ŝuldoj; se ĝi batalos por la egalrajteco de l' negroj, por la defendo de l' revendikoj de la militveteranoj, por la defendo de l' interesoj de la reprezentantoj de liberaj profesioj, etkomercistoj kaj metiistoj. Kaj tiel plu.

Estas memkompreneble, ke tia partio batalos por la elstarigo de siaj reprezentantoj en la municipalitatojn, en la reprezentajn organojn de apartaj ŝtatoj, kaj en la kongreson kaj senaton.

Niaj kamaradoj en Usono ekagis ĝuste, elmontrinte iniciativon en la kreo de tia partio. Sed ili devos ankoraŭ akcepti efikajn rimedojn por ke la afero de l' kreo de tia partio fariĝu la afero de l' amasoj mem. La demandon pri la organizo de „laborist-farmista partio" kaj ĝian programon necesas pritrakti en vastaj popolaj kunvenoj. Necesas disvolvi plej vastan movadon pri la kreo de tia partio kaj ekstari ĉe la kapo de tiu movado. Oni povas neniuokaze allasi la transiron de l' iniciativo pri la organizo de l' partio en la manojn de tiuj elementoj, kiuj deziras utiligi la malkontentecon de l' milionaj amasoj, seniluziiĝintaj pri ambaŭ burĝaj partioj, la demokrata kaj la respublikana, por la kreo de „tria" partio en Usono kiel partio antikomunista, kiel partio direktita kontraŭ la revolucia movado.

b) BRITIO.

En Britio la faŝista organizo de Mosley rezulte de l'amasaj elpaŝoj de la anglaj laboristoj provizore deiris sur la malantaŭan planon. Sed ni ne devas malrimarki tiun fakton, ke la tiel-nomita „nacia registaro" efektivigas vicon da reakciaj mezuroj kontraŭ la laborista klaso, per kiuj ankaŭ en Britio kreiĝas kondiĉoj plifaciligantaj al la burĝaro, ĉe la ne-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 50 von 188

ceso, la transiron al faŝisma reĝimo. Batali kontraŭ la faŝisma danĝero en Britio ĉe la nuna etapo, tio signifas batali antaŭ ĉio kontraŭ la „nacia registaro", kontraŭ ties reakciaj mezuroj, kontraŭ la ofensivo de l'kapitalo, por la defendo de l'revendikoj de la senlaboruloj, kontraŭ la redukto de l'salajro, por la nuligo de ĉiuj leĝoj, kun kies helpo la angla burĝaro malplialtigas la vivnivelon de l'amasoj.

Sed la kreskanta malamo de l' laborista klaso kontraŭ la „nacia registaro" unuigas ĉiam pli vastajn amasojn sub la lozungo de konstituigo en Britio de nova laborpartiana registaro. Ĉu la komunistoj povas ignori tiun-ĉi spiritostaton de l' laboristaj amasoj, konservintaj sian fidon je laborpartiana registaro? Ne, kamaradoj. Ni devas trovi vojon al tiuj-ĉi amasoj. Ni diras al ili malkaŝe, kiel tion faris la XIII kongreso de l' brita komunista partio: ni, komunistoj, estas adeptoj de l' soveta reĝimo, kiel la nura reĝimo, kapabla emancipi la laboristojn je la jugo de l' kapitalo. Sed vi deziras laborpartianan registaron? Bone. Ni batalos brak-ĉe-brako kun vi por la malvenko de l' „nacia registaro". Ni estas pretaj subteni vian batalon por la kreo de nova laborpartiana registaro malgraŭ tio ke ambaŭ antaŭaj laborpartianaj registaroj ne plenumis la promesojn faritajn de l' laborpartio al la laborista klaso. Ni ne atendas de ĉi-registaro la efektivigon de socialismaj entreprenoj. Sed je la nomo de milionoj da laboristoj ni metos al ĝi la postulon defendi la plej aktualajn ekonomiajn kaj politikajn interesojn de la laborista klaso kaj de ĉiuj laboruloj. Ni kune pritraktu la komunan programon de tiaj revendikoj kaj realigu tiun unuecon de agoj, kiu estas necesa al la proletaro por doni rebaton al la reakcia ofensivo de l' „nacia registaro" kaj ankaŭ kontraŭ Lloyd-George, kiu siamaniere penas sekvigi post si la amasojn



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 51 von 188

kontraŭ la afero de l' laborista klaso, en la interesoj de l' brita burĝaro.

Tia pozicio de l' britaj komunistoj estas ĝusta. Ĝi plifaciligos al ili la starigon de unueca fronto de batalo kun la milionaj amasoj de l' anglaj trade-union'oj[21] kaj de l' labora partio.

Restante ĉiam en la unuaj vicoj de l' batalanta proletaro, indikante al la amasoj la sole ĝustan vojon: la vojon de batalo por la revolucia renverso de l' dominado de la burĝaro kaj starigo de soveta reĝimo, la komunistoj ne devas ĉe la difino de siaj aktualaj politikaj taskoj, provi transsalti tiujn necesajn etapojn de l' amasa movado, en kies procezo la laboristaj amasoj seniĝas per la propra sperto je siaj iluzioj kaj transiras sur la flankon de l' komunismo

c) FRANCIO.

Francio estas la lando, kie, kiel oni scias, la laborista klaso montras ekzemplon al la tuta internacia proletaro, kiel oni devas batali kontraŭ la faŝismo. La franca komunista partio montras al ĉiuj sekcioj de Komintern la ekzemplon de tio, kiel oni devas konduki la taktikon de l' unueca fronto, la socialistaj laboristoj — la ekzemplon de tio, kion devas fari nun la socialdemokrataj laboristoj de aliaj kapitalismaj landoj en la batalo kontraŭ la faŝismo. (Aplaŭdoj).

La signifo de l' duonmiliona antifaŝista demonstracio, okazinta la 14-n de julio ĉi-jare en Parizo, kaj multnombraj demonstracioj en aliaj urboj de Francio estas grandega. Ĝi estas jam ne nur la komenco de l' unueca laborista fronto, ĝi estas la komenco de larĝa tutpopola fronto kontraŭ la faŝismo en Francio. Tiu-ĉi movado de l' unueca fronto levas la kredon de l' laborista klaso je siaj fortoj, plifortigas en ĝi la konscion pri sia konduka rolo rilate



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 52 von 188

al la kampularo, urba etburĝaro, intelektularo, ĝi plivastigas la influon de l' komunista partio en la laboristaj amasoj, do konsekvence faras la proletaron pli forta en la batalo kontraŭ la faŝismo. Ĝi ĝustatempe mobilizas la viglatenton de l' amasoj kontraŭ la faŝisma danĝero. Kaj ĝi servos kiel infekta ekzemplo por la disvolvo de l'antifaŝista movado en aliaj kapitalismaj landoj, kaŭzos vigligan efikon sur la proletojn de Germanio, subpremitajn de la faŝista diktaturo.

La venko, kion ja diri, estas granda, sed ĝi ankoraŭ ne solvas la rezulton de l'antifaŝista batalo. La superanta plimulto de l' franca popolo estas nekontesteble kontraŭ la faŝismo. Sed la burĝaro kun la helpo de l'armita forto scipovas perforti la volon de l'popoloj. La faŝista movado plue disvolviĝas absolute libere ĉe la aktiva subteno de l'monopolista kapitalo, ŝtata aparato de l'burĝaro, ĝenerala stabo de l'franca armeo kaj la apogilo de ĉia reakcio: la katolika eklezio. La plej forta faŝista organizo — la „Fajrokrucoj" disponas hodiaŭ 350 mil armitajn homojn, kies kerno estas 60 mil rezerv-oficiroj. Ĝi havas fortajn poziciojn en la polico, en la ĝendarmio, armeo kaj aviado, en la tuta ŝtata aparato. La lastaj municipaj elektoj montras, ke en Francio kreskas ne nur la revoluciaj fortoj, sed ankaŭ la fortoj de l'faŝismo. Se la faŝismo prosperos vaste penetri en la kampularon kaj certigi al si la subtenon de unu parto de l'armeo ĉe la neŭtraleco de l' alia, la francaj laborulaj amasoj ne povos malhelpi al la veno de l'faŝistoj al la regado. Ne forgesu, kamaradoj, la organizan malfortecon de l' franca laborista movado, plifaciligantan la sukceson de l'faŝista ofensivo. La laborista klaso kaj ĉiuj antifaŝistoj de Francio havas neniujn motivojn por trankviliĝi kun la atingitaj rezultoj.

Kiuj taskoj staras antaŭ la laborista klaso de Francio?

Unue, atingi la starigon de unueca fronto ne nur en la regiono politika, sed ankaŭ en la regiono ekonomia por la organizo de batalo kontraŭ la ofensivo de l'kapitalo, rompi per sia surpremo la kontraŭstaron al unueca fronto fare de l'suprularo de la reformista Konfederacio de l'laboro.

Due, atingi la realigon de l'sindikata unueco en Francio: unuecaj sindikatoj sur la bazo de l'klasa batalo.

Trie, aligi al la antifaŝista movado la vastajn kamparanajn amasojn, la amasojn de l'etburĝaro, prezentinte por iliaj revendikoj specialan lokon en la programo de l'antifaŝista popola fronto.

Kvare, organize firmigi kaj plilarĝigi plue la disvolviĝintan antifaŝistan movadon per la amasa kreo de elektitaj eksterpartiaj organoj de l'antifaŝista popola fronto, pli larĝa ol la partioj kaj organizoj de laboruloj eksistantaj nun en Francio.

Kvine, per sia premo atingi la dissolvon kaj senarmigon de l' faŝistaj organizoj, kiel organizoj de komplotuloj kontraŭ la respubliko kaj agentoj de Hitler en Francio.

Sese, atingi la purigon de l'ŝtata aparato, armeo, polico je la komplotuloj, preparantaj faŝistan ŝtatrenverson.

Sepe, disvolvi la batalon kontraŭ la gvidantoj de l' reakciaj koterioj de l'katolika eklezio, kiel unu el aplej gravaj apogiloj de l'franca faŝismo.

Oke, ligi kun la antifaŝista movado la armeon per la kreo en ties medio de komitatoj por la defendo de l'respubliko kaj konstitucio kontraŭ tiuj, kiuj deziras utiligi la armeon por kontraŭkonstitucia ŝtatrenverso (aplaŭdoj); ne allasi la reakciajn fortojn en Francio rompi la franc-sovetian kontrakton, defendantan la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 54 von 188

aferon de la paco kontraŭ la agreso de l'germana faŝismo. (Aplaŭdoj).

Kaj se en Francio la antifaŝista movado venigos al la kreo de registaro, kiu efektivigos veran batalon — ne en vortoj, sed en realo, kontraŭ la franca faŝismo, efektivigos la programon, la revendikojn de l'antifaŝista popola fronto, la komunistoj, restante nepacigeblaj malamikoj de ĉia burĝa registaro kaj adeptoj de soveta reĝimo, tamen, antaŭ la faco de l' progresantafa ŝisma danĝero, estas pretaj subteni tian registaron. (Aplaŭdoj).

## LA UNUECA FRONTO KAJ LA AMASAJ FAŜISTAJ ORGANIZOJ

Kamaradoj, la batalo por la starigo de unueca fronto en la landoj, kie la faŝistoj estas ĉe la regado, estas, sendube, la plej grava problemo, staranta antaŭ ni. Tie tiu-ĉi batalo pasas en multe pli pezaj kondiĉoj ol en la landoj kun legala laborista movado. Tamen en la faŝismaj landoj estas ĉiuj premisoj por la disvolvo de vera antifaŝista popola fronto en la batalo kontraŭ la faŝista diktaturo ĉar la socialdemokrataj, katolikaj kaj aliaj laboristoj, ekzemple en Germanio, povas pli senpere ekkonscii la neceson de unueca batalo kune kun la komunistoj kontraŭ la faŝisma diktaturo. La vastaj tavoloj de l'etburĝaro kaj kampularo, jam gustumintaj la maldolĉajn fruktojn de l' faŝista dominado, sentas ĉiam pli grandan malkontenton kaj disreviĝon, kio plifaciligas ilian partoprenigon en la antifaŝista popola fronto.

Sed la ĉefa tasko en la faŝismaj landoj, precipe en Germanio kaj Italio, kie la faŝismo scipovis atingi amasan bazon kaj enpelis perforte la laboristojn kaj aliajn laborulojn en siajn organizojn, estas en la lerta kombino de l' batalo kontraŭ la faŝisma dikta-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

turo elekstere kun ties subfoso interne de l'amasaj faŝistaj organizoj kaj organoj. Necesas studi, ellerni kaj apliki konforme al la konkretaj kondiĉoj de tiuj-ĉi landoj specialajn metodojn kaj alirojn, kontribuantajn al la pli rapida diskomponigo de l'amasa bazo de l'faŝismo kaj preparantajn la renverson de l'faŝisma diktaturo. Tion-ĉi necesas studi, ellerni kaj apliki, sed ne nur krii: „For Hitler!“ aŭ „For Mussolini!“. Studi, ellerni kaj apliki.

Tio estas malfacila kaj komplika tasko. Des pli malfacila, ke nia sperto de sukcesa batalo kontraŭ la faŝisma diktaturo estas ekstreme limigita. Niaj italaj kamaradoj, ekzemple, batalas en la kondiĉoj de faŝisma diktaturo jam ĉirkaŭ 13 jaroj. Sed ili ankoraŭ ne prosperis disvolvi efektivan amasan batalon kontraŭ la faŝismo, kaj tial ili, bedaŭrinde, malmulte povis ĉi-rilate helpi per pozitiva sperto al aliaj komunistaj partioj de faŝismaj landoj.

La germanaj kaj italaj komunistoj kaj la komunistoj de aliaj faŝismaj landoj, kaj ankaŭ la komjunuloj, montris miraklojn de heroismo, ili faris kaj faras ĉiutage grandegajn oferojn. Antaŭ tiuj heroismo kaj oferoj ni ĉiuj klinas la kapojn. Sed nura heroismo ne sufiĉas. (Aplaŭdoj). Necesas ĉi-tiun heroismon kunigi kun ĉiutaga laboro en la amasoj, kun tia konkreta batalo kontraŭ la faŝismo ke estu atingitaj ĉi-tie la plej palpeblaj rezultoj. En nia batalo kontraŭ la faŝisma diktaturo estas precipe danĝere akcepti la deziraton por la ekzistanto. Necesas sin bazi sur la faktoj, sur la reala konkreta cirkonstancaro.

Sed kia estas nun la realo, ekzemple, en Germanio?

En la amasoj progresas la malkontento kaj la seniluziĝo pri la politiko de l'faŝisma diktaturo, akceptantaj eĉ la formon de partaj strikoj kaj aliaj elpaŝoj. Malgraŭ ĉiuj penoj, la faŝismo ne prosperis politike konkeri por si la ĉefajn amasojn de l'labo-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 56 von 188

ristoj, ĝi perdas kaj ĉiam pli perdos eĉ siajn antaŭajn adeptojn. Sed ni tamen devas konsideri ke la laboristoj, konvikitaj pri la ebleco renversi la faŝisman diktaturon kaj pretaj jam hodiaŭ aktive batali por tio-ĉi estas ankoraŭ en malplimulto: tio estas ni, komunistoj, kaj la revolucia parto de l'socialdemokrataj laboristoj. Sed la plimulto de l'laboruloj dume ankoraŭ ne ekkonsciis la realajn kaj konkretajn eblecojn kaj vojojn de renverso de tiu-ĉi diktaturo kaj sin trovas ankoraŭ en atenda situacio. Tion necesas konsideri, kiam ni fiksas niajn taskojn de batalo kontraŭ la faŝismo en Germanio kaj kiam ni serĉos, studos kaj aplikos specialajn alirmanierojn por la renverso kaj disŝanceligo de l'faŝisma diktaturo en Germanio.

Por doni senteblan frapon al la faŝisma diktaturo, ni devas scii ĝian plej vundeblan lokon. Kie estas la Akila kalkano de l'faŝisma diktaturo? En ties socia bazo. La lasta estas treega diversnatura. Ĝi envolvas diversajn klasojn kaj diversajn tavolojn de l'socio. La faŝismo proklamis sin la sola reprezentanto de ĉiuj klasoj kaj tavoloj de l'loĝantaro: fabrikposedanto kaj laboristo, milionulo kaj senlaborulo, junkro kaj etkamparano, grandkapitalisto kaj metiisto. Ĝi faras la aspekton, ke ĝi defendas la interesojn de ĉiuj ĉi tavoloj, la interesojn de l'nacio. Sed estante la diktaturo de l'grandburĝaro, la faŝismo devas neeviteble veni en konflikton kun sia amasa socia bazo, des pli ke ĝuste dum la faŝisma diktaturo plej reliefe elstariĝas la klasaj kontradikcioj inter la bando da financ-magnatoj kaj la superanta plimulto de l'popolo.

Alkonduki la amasojn al la decida batalo por la renverso de l'faŝisma diktaturo ni povas nur per la partopreniĝo de l'laboristoj, perforte enpelitaj aŭ pro nekonscieco-adherintaj al la faŝistaj organizoj, en

la plej elementaj movadoj por la defendo de de iliaj ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj interesoj. Ĝuste tial la komunistoj devas labori en tiuj-ĉi organizoj kiel la plej bonaj defendantoj de l'ĉiutagaj interesoj de la membra amaso, konsiderante ke, laŭgrade de tio ke la laboristoj, troviĝantaj en ĉi organizoj, komencas pli ofte postuli al si rajtojn kaj defendi siajn interesojn, ili neeviteble kunpuŝiĝas kun la faŝisma diktaturo.

Sur la grundo de l'defendo de l'aktualaj, komenctempe plej elementaj, interesoj de l'laborulaj amasoj de l'urbo kaj kamparo estas relative pli facile trovi komunan lingvon ne nur kun la konsciaj antifaŝistoj, sed ankaŭ kun tiuj laboruloj, kiuj estas ankoraŭ adeptoj de l'faŝismo, sed estas disrevigitaj kaj malkontentaj pri ĝia politiko, kiuj murmuras kaj serĉas okazon esprimi sian malkontenton. Ni ĝenerale devas havi konscion pri tio ke tuta nia taktiko devas havi tian karakteron, ke ĝi ne depuŝu de si la vicanajn adeptojn de l'faŝismo, ne j'etu ilin denove en la ĉirkaŭbrakumojn de l'faŝismo, sed pliprofundigu la abismon inter la faŝista supro kaj la amaso de l'disrevigitaj vicanaj adeptoj de l'faŝismo el la laborulaj tavoloj.

Ni ne konfuziĝu, kamaradoj, se la homoj, mobilizitaj ĉirkaŭ tiuj-ĉi ĉiutagaj interesoj, konsideras sin indiferentaj al politiko aŭ eĉ adeptoj de l'faŝismo. Por ni estas grave partoprenigi ilin en movado, kiu, kvankam komence ankoraŭ ne marŝas malkaŝe sub la lozungoj de batalo kontraŭ la faŝismo, sed objektive jam estas movado antifaŝista, kontraŭstarigante tiujn-ĉi amasojn al la faŝisma diktaturo.

La sperto instruas nin, ke malutila kaj neĝusta estas la opinio, ke kvazaŭ en la landoj de faŝisma diktaturo estas ĝenerale neeble elpaŝi legale aŭ nelegale. Insisti pri tiaspeca vidpunkto signifas fali

en pasivecon, rezigni je efektiva amasa laboro ĝenerale. Vere, trovi en la kondiĉoj de l' faŝisma diktaturo la formojn kaj metodojn de legala aŭ duonlegala elpaŝo estas malfacila, komplika tasko. Sed, same kiel en multaj aliaj problemoj, la vojon indikas la vivo mem kaj la iniciativo de l'amasoj mem, jam montrintaj vicon de ekzemploj, kiujn ni devas ĝeneraligi, apliki organizite kaj celkonforme. Necesas kun la tuta decidemo meti finon al la subtakso de l'laboro en la faŝistaj amasaj organizoj. Kaj en Italio, kaj en Germanio, kaj en pluraj aliaj faŝismaj landoj, niaj kamaradoj vualis sian pasivecon kaj oftokaze eĉ sian rektan rifuzon labori en la faŝistaj amasaj organizoj per la kontraŭstarigo de l'laboro en la entreprenejoj al la laboro en la faŝistaj amasaj organizoj. Sed en realo ĝuste tiu-ĉi skemeca kontraŭstarigo sekvigis tion, ke la laboro estis farata tre malforte kaj iufoje eĉ tute ne farata same en la faŝistaj amasaj organizoj, kiel en la entreprenejoj.

Tamen por la komunistoj en la faŝismaj landoj estas speciale grave esti ĉie, kie estas la amasoj. La faŝismo forprenis ĉe la laboristoj iliajn proprajn legalajn organizojn. Ĝi altrudis al ili faŝistajn organizojn, kaj tie e s t a s la amasoj — devigite aŭ parte propravole. Ĉi amasaj organizoj povas kaj devas esti nia legala aŭ duonlegala agadkampo, kie ni kontaktos kun la amasoj. Ili povas kaj devas esti por ni legala, duonlegala deira punkto por la defendo de l'ĉiutagaj interesoj de l' amasoj. Por la utiligo de tiuj eblecoj la komunistoj devas elbataladi elektitajn postenojn en la faŝistaj amasaj organizoj por la celoj de kontakto kun la amaso, unu fojon por ĉiam liberiĝinte de l' antaŭjuĝo, ke tia agado estas nekonforma aŭ malinda por revolucia laboristo.

En Germanio, ekzemple, ekzistas sistemo de tiel

nomataj „fabrikaj rajtigitoj". Sed kie estas dirite, ke ni devas prezenti en tiuj-ĉi organizoj la monopolon al la faŝistoj? Ĉu ni ne povas provi unuigi en la entreprenejo la komunistajn, socialdemokratajn, katolikajn kaj aliajn antifaŝistajn laboristojn por ke ili ĉe la balotado de l' listo de „fabrikaj rajtigitoj" elstreku la evidentajn agentojn de l' entreprenisto kaj enlistigu aliajn kandidatojn, havantaj la konfidon de l'laboristoj? La praktiko jam montris ke tio-ĉi estas ebla.

Ĉu la praktiko ne diras ankaŭ tion, ke oni povas kune kun la socialdemokrataj kaj aliaj malkontentaj laboristoj postuli de l' fabrikaj rajtigitoj efektivan defendon de l'interesoj de la laboristoj?

Vidu la „laborfronton" en Germanio aŭ la faŝistajn sindikatojn en Italio. Ĉu estas neeble postuli la elektadon, sed ne la nominacion[22] de l'funkciuloj de la „laborfronto", insisti ke la gvidantaj organoj de l'lokaj grupoj raportadu ĉe la kunvenoj de l' membroj de organizoj, sin turni kun ĉi revendikoj laŭ decido de l'grupo al la entreprenisto, al la „kuratoro de l'laboro", al la superaj organoj de l'"laborfronto"? Tio estas ebla ĉe la kondiĉo ke la revoluciaj laboristoj efektive laboras en la „laborfronto" kaj elbatalas postenojn en ĝi.

Similaj labormetodoj estas eblaj kaj necesaj ankaŭ en aliaj amasaj faŝistaj organizoj: en la Hitler-junularo, en la sportorganizoj, en la organizo „Kraft durch Freude", „Doppo lavoro" en Italio, en la kooperativoj ktp.

Kamaradoj, vi memoras la antikvan legendon pri la preno de Trojo. Trojo sin ĉirkaŭbaris kontraŭ la armeo atakinta ĝin per nealireblaj muroj. Kaj la atakinta armeo, perdinte multe da viktimoj, ne povis atingi la venkon ĝis ĝi, kun la helpo de l'fama troja ĉevalo, penetris internen, en la kernon mem de l'malamiko.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

Ni, la revoluciaj laboristoj, ŝajnas al mi, ne devas ĝeni apliki la saman taktikon rilate al nia faŝista malamiko, sin defendanta kontraŭ la popolo per la vivanta muro de siaj gorĝotranĉistoj. (Aplaŭdoj).

Tiu, kiu ne komprenas la neceson apliki tian taktikon rilate al la faŝismo, kiu konsideras tian alirmanieron „malaltiga", tiu povas esti bonega kamarado, sed li, permesu diri, estas babilulo, sed ne revoluciulo, tiu ne scipovos alkonduki la amasojn al la renverso de l'faŝisma diktaturo. (Aplaŭdoj).

La amasa movado de l'unueca fronto, naskiĝanta ekstere kaj elinterne de la faŝistaj organizoj de Germanio, Italio kaj aliaj landoj, kie la faŝismo havas amasan bazon, ekirante de la defendo de l'plej elementaj bezonoj, aliigante siajn formojn kaj batallozungojn laŭgrade de la plivastiĝo kaj progresado de tiu-ĉi batalo, estos tiu murbreĉilo, kiu detruos la ŝajnantan nun al multiuj nealirebla fortikaj'on de l'faŝisma diktaturo.

## LA UNUECA FRONTO EN LANDOJ, KIE LA SOCIALDEMOKRATOJ ESTAS EN LA REGISTARO

La batalo por starigo de l'unueca fronto levas ankaŭ alian tre gravan problemon: pri unueca fronto en la landoj, kie ĉe la regado estas socialdemokrataj registaroj aŭ koaliciaj kun la partopreno de socialistoj, kiel, ekzemple, en Danio, Norvegio, Svedio, Ĉekoslovakio kaj Belgio.

Nia absolute negativa rilato al la socialdemokrataj registaroj, kiuj estas registaroj de kompromisado kun la burĝaro, estas konata. Sed, malgraŭ tio, ni ne konsideras la ĉeeston de socialdemokrata registaro aŭ de registara koalicio de l'socialdemokrata partio kun la burĝaj partioj — nevenkebla obstaklo por la starigo de unueca fronto kun la socialdemo-

kratoj en certaj demandoj. Ni opinias ke ankaŭ en ĉi okazo estas tute *ebla* kaj *necesa* la unueca fronto por la defendo de l'aktualaj interesoj de la laborula popolo kaj en la batalo kontraŭ la faŝismo. Certe, en la landoj kie la reprezentantoj de l'social-demokrataj partioj partoprenas en la registaro, la socialdemokrata gvidantaro kaŭzas la plej fortan *kontraŭstaron* al la proletara unueca fronto. Tio estas tute komprenebla, ja ili deziras montri al la burĝaro ke ĝuste ili pli bone kaj pli lerte ol ĉiuj scipovas teni je la brido la malkontentajn laboristajn amasojn kaj prezervi[23] ilin kontraŭ la influo de l'komunismo. Tamen tiu fakto ke la socialdemokrataj mini-, stroj rilatas negative al la proletara unueca fronto-neniom povas pravigi tian situacion, kiam *komunistoj nenion faras por la kreo de l' unueca fronto de la proletaro.*

Niaj kamaradoj en la skandinavaj landoj ofte iras la linion de l'malpli granda rezisto, *sin limigante per la propagandeca senvualigo de l' socialdemokrata registaro*. Tio estas eraro. Ekzemple en Danio la socialdemokrataj gvidantoj jam dek jarojn sidas en la registaro, kaj la komunistoj dek jarojn de tag' al tago ripetas, ke ĝi estas burĝa, kapitalista registaro. Oni devas supozi ke tiu-ĉi propagando estas konata al la danaj laboristoj. Tio, ke la konsiderinda plimulto tamen fordonas siajn voĉojn al la socialdemokrata registara partio nur montras, ke la propagandeca senvualigo de l'registaro fare de l' komunistoj ne *sufiĉas*, tamen ne montras ke tiuj-ĉi milcentoj da laboristoj estas kontentaj pri ĉiuj registaraj aktoj de l' socialdemokrataj ministroj. Ne, ili *ne estas* kontentaj pri tio, ke la socialdemokrata registaro per sia tiel nomata „kriza interkonsento„ donas helpon al la *grandaj kapitalistoj kaj bienuloj*, sed ne al la laboristoj kaj al la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 62 von 188

kamparana malriĉularo; ke ĝi per sia dekreto, emisiita[24] en januaro 1933, deprenis ĉe la laboristoj la r a j t o n p r i s t r i k o; ke ĝi akceptis decidon pri la r e a r m i g o de l' p o l i c o k a j t i e s e n k a z e r n i g o; ke la socialdemokrata gvidantaro projektas danĝeran a n t i d e m o k r a t i a n e l e k t a n r e f o r m o n (kun konsiderinda malpliigo de l' nombro de deputitoj). Mi sendube ne eraros, asertante, kamaradoj, ke 99 procentoj el la laboristoj de Danio n e a p r o b a s tiajn politikajn paŝojn de l' socialdemokrataj gvidantoj kaj ministroj.

Ĉu la komunistoj ne povas alvoki la sindikatojn kaj la socialdemokratajn organizojn en Danio pridiskuti tiun aŭ alian el la aktualaj demandoj kaj kune elpaŝi por la proletara unueca fronto kun la celo efektivigi la laboristajn revendikojn? Pasintjare, en oktobro, kiam niaj danaj kamaradoj sin turnis al la sindikatoj kun alvoko elpaŝi kontraŭ la redukto de l' senlaborulaj subvencioj kaj por la demokratiaj rajtoj de l' sindikatoj, ĉirkaŭ cent lokaj organizoj aliĝis al la unueca fronto.

En S v e d i o la trian fojon estas ĉe la regado socialdemokrata registaro, sed la svedaj komunistoj en praktiko longan tempon rifuzis la aplikon de taktiko de l' unueca fronto. Kial? Ĉu ili estis kontraŭ la unueca fronto? Ne, certe, ili estis principe por la unueca fronto, por la unueca fronto ĝ e n e r a l e, sed ili ne komprenis, kiamotive, en kiuj demandoj, en la defendo de kiuj revendikoj oni povus sukcese konstrui proletaran unuecan fronton, kie sin alkroĉi kaj kiel sin alkroĉi. Kelkajn monatojn antaŭ la formiĝo de l' socialdemokrata registaro, la socialdemokrata partio elpaŝis dum la elektokampanjo kun platformo, kiu enhavas plurajn tiajn revendikojn, kiuj ĝuste povas esti enigitaj en la platformon de l' proletara unueca fronto. Ekzemple, la lozungoj: „K o n t r a ŭ l a d o-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 63 von 188

ganimpostoj", „Kontraŭ la militarizo", „Fini kun la prokrastoj en la demando pri asekuro kontraŭ senlaboreco", „Certigi al la maljuniĝintoj pension sufiĉan por la ekzistado", „Ne allasi la ekzistadon de tiaj organizoj kiel Munch-Corps (faŝista organizo)", „Por la klasan leĝaron kontraŭ la sindikatoj postulatan de l' burĝaj partioj".

Pli ol miliono da laboruloj de Svedio en 1932 voĉdonis por tiuj-ĉi revendikoj, elŝovitaj de l'socialdemokratio, kaj salutis en 1933 la konstituiĝon de socialdemokrata registaro en la espero ke nun sekvos la realigo de tiuj-ĉi revendikoj. Kio povis esti pli natura en ĉi situcio — kaj kio povis en pli granda grado konformi al la deziroj de l'laboristaj amasoj — ol alvoko de l'komunista partio al ĉiuj socialdemokrataj kaj sindikataj organizoj kun propono entrepreni komunajn agojn por la realigo de tiuj-ĉi revendikoj elŝovitaj de l'socialdemokrata partio.

Se prosperus, celante la realigon de tiaj revendikoj de l'socialdemokratoj mem, efektive mobilizi la vastajn amasojn, kunigi la socialdemokratajn kaj komunistajn laboristajn organizojn je unueca fronto, ne povas esti dubo ke la laborista klaso de Svedio el tio gajnus. La socialdemokrataj ministroj de Svedio, certe, ne tre ĝojus pri tio. Ĉar en tiu-ĉi okazo la registaro estus devigita iujn el tiuj-ĉi revendikoj realigi. En ĉiu okazo ne okazus tio, kio riceviĝis nun, kiam la registaro anstataŭ la nuligo de l'doganimpostoj pliiltigis iujn doganimpostojn, anstataŭ la limigo de l'militarismo plialtigis la militbuĝeton kaj anstataŭ la rifuzo de ĉia leĝaro, direktita kontraŭ la sindikatoj, prezentis mem al la parlamento tian leĝoprojekton. Vere, en rilato kun la lasta demando la sveda komunista partio efektivigis bonan amasan



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 64 von 188

kampanjon en la spirito de l'proletara unueca frono kaj atingis tion ke finfine eĉ la socialdemokrata frakcio de l'parlamento sentis sin devigita voĉdont kontraŭ la registara leĝoprojekto kaj ĝi dume fiaskis. La norvegaj komunistoj ĝuste agis, alvokinte la unuan de majo la organizojn de l'Laborista partio al kunaj demonstracioj kaj elŝovinte vicon da revendikoj, kiuj ĉeftrajte koincidas kun la revendikoj el la elekta platformo de l' norvega Laborista partio. Kvankam tiu-ĉi paŝo por la unueca fronto estis malforte preparita kaj la gvidantaro de l'norvega Laborista partio estis kontraŭ ĝi, en tridek lokoj okazis demonstracioj de l'unueca fronto.

Antaŭe multaj komunistoj timis ke de ilia flanko estŭs elmontro de oportunismo se ili ne kontraŭstarigos al ajna parta revendiko de l'socialdemokratio proprajn, duoble pli radikalajn revendikojn. Tio estis naiva eraro. Se la socialdemokratoj elŝovis, ekzemple, la postulon pri dissolvo de l'faŝistaj organizoj, do ne estas por ni neceso aldoni: „kaj dissolvon de l'ŝtata polico" (ĉar tiun-ĉi postulon estas celkonforme elŝovi en alia situacio), kaj ni devas diri al la socialdemokrataj laboristoj: ni estas pretaj akcepti tiujn-ĉi revendikojn de via partio kiel la revendikoj de l'proletara unueca fronto kaj ĝis la fino batali pro ilia realigo. Ni kune marŝu al la batalo.

Ankaŭ en Ĉekoslovakio oni povas kaj devas utiligi por la starigo de unueca fronto de l'laborista klaso certajn revendikojn elŝovitajn de la ĉeka kaj germana socialdemokratioj kaj la reformistaj sindikatoj. Kiam la socialdemokratio postulas, ekzemple, la havigon de laboro al la senlaboruloj kaj la nuligon — kiel ĝi tion postulas ankoraŭ de l'jaro 1927,— de l'leĝoj, limigantaj la aŭtonomion de l'municipalitatoj, necesas sur la lokoj kaj en ĉiu aparta distrikto konkretigi tiujn-ĉi postulojn kaj brak-ĉe-brako kun



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 65 von 188

la socialdemokratiaj organizoj batali por ilia efektiva realigo. Aŭ kiam la socialdemokrataj partioj atakas „ĝenerale“ la faŝismoportantojn en la ŝtata aparato, oni devas en ĉiu distrikto eltiri al la lumo la konkretajn faŝismajn heroldojn kaj kune kun la socialdemokrataj laboristoj elpaŝi por la forigo de tiuj el la ŝtataj instituoj.

En Belgio la gvidantoj de l'socialista partio, kun Emil Vandervelde ĉe la kapo, eniris koalician registaron. Tiun-ĉi „sukceson“ ili atingis sur la bazo de ilia longdaŭra vasta kampanjo por du ĉefaj revendikoj: 1) la nuligo de l'ekstrajdekretoj, kaj 2) realigo de l'plano de de-Man. La unua demando estas tre grava. La antaŭa registaro emisiis ensume 150 reakciajn ekstrajn dekretojn, kiuj ekstreme peze ekkuŝis sur la laborulan popolon. Oni intencis ilin tuj nuligi. Tion postulis la socialista partio. Sed ĉu multajn el tiuj-ĉi ekstraj dekretoj nuligis la nova registaro? Ĝi nuligis absolute neniun, sed nur iom plimoligis kelkajn ekstrajn dekretojn por fari siaspecan „simbolecan“ kompenson por la larĝaj promesoj de la socialistaj gvidantoj de Belgio (simile al tiu „simboleca dolaro“, kiun iuj eŭropaj ŝtatoj proponis al Usono por la pripago de siaj milionaj militŝuldoj).

Kio koncernas la realigon de l'vasteanoncita plano de de-Man, la afero akceptis turnon tute neatenditan por la socialdemokrataj amasoj: la socialistaj ministroj deklaris ke necesas komence venki la ekonomian krizon kaj realigi nur tiujn partojn de l'plano de de-Man, kiuj plibonigas la situacion de l' industriaj kapitalistoj kaj de l' bankoj,—kaj nur post tio oni povos realigi la mezurojn, direktitajn al la plifaciligo de l'situacio de la laboristoj. Tamen, kiom longe la laboristoj devos atendi sian parton de „bonstato“, kiun promesas la plano de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 66 von 188

de-Man? Super la belgaj bankieroj jam ekverŝiĝsi vera o r a p l u v o. Estis farita la devalorigo de l'belga franko je 28% kaj per tiu-ĉi manipulo la bankieroj povis alproprigi por si kiel trofeo 4 1/2 miliardojn da frankoj je la kostoj de l'salajratoj kaj de l'ŝparoj de la malgrandaj homoj. Sed kiel tio-ĉi koordiniĝas kun la enhavo de la plano de de-Man? Ja, se kredi al la litero de l'plano, ĝi promesas, „p e r s e k u t a d o n d e l' m o n o p o l i s t a j t r o u z o j k a j d e l's p e k u l i s t a j m a n o v r o j".

La registaro nominaciis sur la bazo de l'plano de de-Man komisionon por la kontrolo de l' bankoj, sed f o r m i t a n e l b a n k i e r o j, kiuj nun gaje kaj senzorge kontrolas sin mem!

La plano de de-Man promesas ankaŭ plurajn aliajn bonajn aj'ojn: „r e d u k t o n d e l' l a b o r t e m p o," „n o r m a l i g o n d e l' s a l a j r o", „m i n i m u m o n d e s a l a j r o", „organizon de integrala sistemo de s o c i a a s e k u r o", plilarĝigon de la viv-oportunecoj per nova l o ĝ e j k o n s t r u a d o ktp. Ĉio-ĉi estas revendikoj, kiujn ni, komunistoj, povas subteni. Ni devas nin turni al la laboristaj organizoj de Belgio kaj diri: la kapitalistoj ricevis jam sufiĉe kaj eĉ tro multe. Ni postulu de la socialdemokrataj ministroj ke ili plenumu siajn promesojn, faritajn al la laboristoj. Ni kuniĝu je u n u e c a fronto por la s u k c e s a d e f e n d o de niaj interesoj. Ministro Vandervelde, ni subtenas la revendikojn por laboristoj, enhavatajn en v i a platformo; sed ni deklaras malkaŝe: tiujn-ĉi revendikojn ni traktas s e r i o z e, ni deziras farojn, sed ne malplenajn vortojn, kaj tial ni unuigas milcentojn da laboristoj por la batalo pro tiuj-ĉi revendikoj!

Tiamaniere en landoj kun socialdemokrata registaro la komunistoj, utiligante konformajn apartajn revendikojn el la platformoj de l' socialdemokrataj



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

partioj mem kaj la promesojn de l' socialdemokrataj ministroj dum la elektoj, kiel deira punkto por la efektivigo de kunaj agoj kun la socialdemokrataj partioj kaj organizoj, povos poste pli facile disvolvi kampanjon por la starigo de unueca fronto jam sur la bazo de aliaj revendikoj de la amasoj en la batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, kontraŭ la faŝismo kaj la minaco de milito.

Plue necesas konsideri ke se ĝenerale la kunaj agoj kun la socialdemokrataj partioj kaj organizoj postulas de l' komunistoj seriozan, fundamentitan kritikon de l' socialdemokratismo, kiel ideologio kaj praktiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro, kaj la nelacigeblan kamaradecan klarigadon al la socialdemokrataj laboristoj de la programo kaj lozungoj de l' komunismo, tiu-ĉi tasko estas precipe g r a v a e n la batalo por unueca fronto ĝuste en tiuj landoj, kie ekzistas socialdemokrataj registaroj.

## LA BATALO POR LA SINDIKATA UNUECO.

Kamaradoj! Plej grava etapo en la plifortigo de l' unueca fronto devas fariĝi la realigo de l' unueco de l' sindikatoj en nacia kaj internacia skalo.

Kiel oni scias, la skismiga taktiko de l' reformistaj gvidantoj estis efektivigata kun la plej granda akreco en la sindikatoj. Kaj tio estas komprenebla: ĉi-tie ilia politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro trovas sian praktikan kulminon senpere en la entreprenejo, je la kostoj de la vivinteresoj de la laboristaj amasoj. Tio sekvigis, certe, akran kritikon kaj rebaton al tiu-ĉi praktiko fare de la revoluciaj laboristoj sub la gvido de l' komunistoj. Jen kial en la sindikata regiono sin disvolvis la plej forta batalo inter la komunismo kaj la reformismo.

Ju pli peza kaj komplika estiĝis la situacio de l'

kapitalismo, des pli reakcia estis la politiko de l' gvidantoj de la „Amsterdamaj" sindikatoj kaj des pli agresivaj iliaj faroj rilate al ĉiuj opoziciaj elementoj interne de l' sindikatoj. Eĉ la starigo de l' faŝisma diktaturo en Germanio kaj la intensa ofensivo de l' kapitalo en ĉiuj kapitalismaj landoj ne malpliigis tiun-ĉi agresivecon. Ĉu ne estas karakteriza ke en la nura jaro 1933 en Anglio, Nederlando, Belgio, Svedio estas eldonitaj plej hontindaj cirkuleroj, direktitaj al la eksigo de l' komunistoj kaj revoluciaj laboristoj el la sindikatoj?

En Anglio en 1933 aperas cirkulero malpermesanta la adheron de l' lokaj filioj de l' sindikatoj al kontraŭmilitaj kaj aliaj revoluciaj organizoj. Tio estis preludo al la fama „nigra cirkulero" de l' Generala Konsilantaro de l' trade-union'oj, deklarinta eksterleĝa ĉian konsilantaron de sindikatoj, kiu allasos en sian konsiston delegitojn „tiel aŭ aliel ligitajn kun la komunistaj organizoj". Kion jam diri pri la gvidantaro de l' germanaj sindikatoj, aplikinta neaŭditajn represiojn kontraŭ la revoluciaj elementoj en la sindikatoj!

Nia taktiko devas sekvi ne el la konduto de apartaj gvidantoj de l' „amsterdamaj" ŝindikatoj, kiujn ajn malfacilojn por la klasbatalo kaŭzu tiu konduto, sed antaŭ ĉio el la fakto: kie estas la laboristaj amasoj. Kaj ĉi-tie ni devas malkaŝe deklari: la laboro en la sindikatoj estas la plej doloriginta demando de ĉiuj komunistaj partioj. Ni devas atingi efektivan stat-aliiĝon en la sindikata laboro, metinte en la centron la demandon pri la batalo por sindikata unueco.

„En kio estas la forto de l' socialdemokratio en Okcidento?" — estis diranta al ni kamarado Stalin antaŭ 10 jaroj.

„En tio ke ĝi sin apogas je la sindikatoj.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

En kio estas la malforto de niaj komunistaj partioj en Okcidento?

En tio ke ili ĝis nun ne kunligiĝis, kaj iuj elementoj de tiuj-ĉi komunistaj partioj ne volas kunligiĝi kun la sindikatoj.

Tial la ĉefa tasko de la komunistaj partioj de Okcidento ĉi-momente estas disvolvi kaj konduki ĝis la fino kampanjon por la unueco de l' sindikata movado, aliĝi por ĉiuj komunistoj absolute al la sindikatoj, ekkonduki tie sistemecan, paciencan laboron por la kunigo de l' laborista klaso kontraŭ la kapitalo kaj atingi tiamaniere ke la komunistaj partioj povu sin apogi je la sindikatoj"[25].

Ĉu estas plenumita tiu-ĉi sugesto de kamarado Stalin? Ne, kamaradoj, ne plenumita.

Ignorante la emon de l' laboristoj al sindikatoj kaj starante antaŭ la malfaciloj de l' laboro en „amsterdamaj" sindikatoj, multaj niaj kamaradoj decidis pasi preter tiu-ĉi komplika tasko. Ili nepre parolis pri la organiza krizo de l' „amsterdamaj" sindikatoj, pri la fuĝo de l' laboristoj el la sindikatoj kaj malrimarkis ke, post ioma falo de l' sindikatoj komence de l' monda ekonomia krizo, ili poste denove komencis progresi. La specifeco de l' sindikatoj estis ĝuste en tio, ke la ofensivo de l' burĝaro kontraŭ la sindikatoj rajtoj, la provo en pluraj landoj unifi[26] la sindikatojn (Polio, Hungario k.a.), la mallarĝigo de l' socia asekuro, la rabado de l' salajro, malgraŭ la foresto de kontraŭstaro fare de l' reformistaj sindikatgvidantaj, devigis la laboristojn ankoraŭ pli intime kuniĝi ĉirkaŭ la sindikatoj, ĉar la laboristoj volis kaj volas vidi en la sindikato la bataleman defendanton de siaj aktualaj klasaj interesoj. Tio-ĉi klarigas tiun fakton, ke la plimulto el la „amsterdamaj" sindikatoj — en Francio, Ĉekoslovakio, Belgio, Svedio, Nederlando, Svisio k.a. — kvante pli-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 70 von 188

kreskis dum la lastaj jaroj. La amerika federacio de l' laboro ankaŭ tre konsiderinde pligrandigis la nombron de siaj membroj dum la lastaj du jaroj.

Se la germanaj kamaradoj pli bone komprenus la taskon de l' sindikata laboro pri kiu al ili multfoje parolis kamarado Thaelman, ni certe havus pli bonan situacion en la sindikatoj ol tiu, kiun ni havis en realo al la momento de l'alveno de la faŝisma diktaturo. Al la fino de 1932 nur ĉirkaŭ dek procentoj el la membroj de l'partio estis anoj en la liberaj sindikatoj. Kaj tio-ĉi — malgraŭ tio, ke la komunistoj post la sesa Kongreso de Komintern staris ĉe la kapo de tuta vico da strikoj. En la gazetaro niaj kamaradoj skribis pri la neceso havigi naŭdek procentojn de niaj fortoj por la laboro en la sindikatoj, sed en realo ĉio estis koncentrigita ĉirkaŭ RGO [27], kiu fakte emis anstataŭi la sindikatojn. Nu, kaj post la regadpreno de Hitler? Dum du jaroj multaj niaj kamaradoj obstine kaj sistemece kontraŭstaris la ĝustan lozungon de batalo por la restarigo de l' liberaj sindikatoj.

Mi povus mencii analogajn ekzemplojn preskaŭ por ĉiuj aliaj kapitalismaj landoj.

Sed ni havas jam ankaŭ la unuan seriozan aktivon en la batalo por la unueco de l' sindikata movado en eŭropaj landoj. Mi pensas pri la malgranda Aŭstrio, kie, laŭ la iniciato de l' komunista partio estas kreita bazo por nelegala sindikata movado. Post la februaraj bataloj la socialdemokratoj kun Otto Bauer ĉe la kapo lanĉis la lozungon: „La liberaj sindikatoj povas esti restarigitaj nur post la falo de l'faŝismo". La komunistoj eklaboris por la restarigo de l'sindikatoj. Ĉiu fazo de tiu-ĉi laboro estis peco de vivanta unueca fronto de l' aŭstra proletaro. La sukcesplena restarigo de l' liberaj sindikatoj en la mallegaleco estis serioza mal-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 71 von 188

venko por la faŝismo. La socialdemokratoj estis ĉe la disvojo. Parto el ili provis intertrakti kun la registaro. Alia parto, vidante niajn sukcesojn, fondis paralele proprajn nelegalajn sindikatojn. Sed la vojo povis esti nur unu: aŭ la kapitulacio antaŭ la faŝismo, aŭ en la kuna batalo kontraŭ la faŝismo — al la unueco de l'sindikatoj. Sub la premo de l'amasoj la ŝancelinta gvidantaro de l' paralelaj sindikatoj, fonditaj de l'eksaj sindikatgvidantoj, decidis iri al unuiĝo. La bazo de tiu uniĝo estas la nepacigebla batalo kontraŭ la kapitalo kaj la faŝismo kaj la certigo de l' demokratio en la sindikatoj. Ni salutas tiun-ĉi fakton, kamaradoj, kiu estas la unua depost la formala skismo de l' sindikata movado post la milito kaj tial havas internacian signifon.

La unueca fronto en Francio sendube servis kiel giganta puŝo al la realigo de l' sindikata unueco: la gvidantoj de l' Generala Konfederacio de l' Laboro ĉiel malakcelis kaj malakcelas la realigon de l' unueco, kontraŭmetante al ĉefa demando pri la klasa politiko de l' sindikatoj demandojn, kiuj havas akcesoran kaj duagradan au formalan signifon. Senduba sukceso de l' batalo por la unueco de l' sindikatoj estis la fondo de unuecaj sindikatoj sur loka skalo, envolvintaj, ekzemple, ĉe la fervojistoj preskaŭ tri kvaronojn de l' membraro de l' ambaŭ sindikatoj.

Ni estas decideme por la restarigo de l' unueco de la sindikatoj en ĉiu lando kaj sur internacia skalo, ni estas por unueca sindikato en ĉiu fako, ni estas por unueca unio de l' sindikatoj, ni estas por la unueca internacia unuiĝo de l' sindikatoj laŭfake, ni estas por unueca Internacio de l' sindikatoj sur la bazo de l' klasba-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 72 von 188

talo. Ni estas por la unuecaj klasaj sindikatoj kiel unu el la plej gravaj apogiloj de l' laborista klaso kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj de l' faŝismo. Ĉe tio ni metas unu kondiĉon por la unuigo de l' sindikatoj: batalon kontraŭ la kapitalo, batalon kontraŭ la faŝismo kaj intersindikatan demokration.

La tempo ne atendas. Por ni la demando pri la unueco de l' sindikata movado kiel sur nacia, tiel ankaŭ sur internacia skalo, estas la demando pri la granda afero de l' unuigo de nia klaso je potencaj unuecaj sindikataj organizoj kontraŭ la klasa malamiko.

Ni salutas la alvokon de l' Ruĝa Sindikata Internacio al la Amsterdama internacio — antaŭ la unua de majo ĉi jare — kun propono pritrakti kune la demandon pri la kondiĉoj, metodoj kaj formoj de l' unuigo de la monda sindikatmovado. La gvidantoj de l' Amsterdama internacio repuŝis ĉi proponon sub la preteksto de l' malnoviĝinta argumento, ke la unueco de l' sindikata movado estas ebla nur en la vicoj de l' Amsterdama internacio, kiu, apropoe[28], unuigas preskaŭ ekskluzive organizojn de parto el la landoj.

Sed la komunistoj, laborante en la sindikatoj, devas senĉese daŭrigi la batalon por la unueco de l' sindikata movado. La tasko de l' ruĝaj sindikatoj kaj de l' Sindikata Internacio estas fari ĉion de ili dependan por ke pli rapide venu la horo de l' starigo de kuna batalo de ĉiuj sindikatoj kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj faŝismo, por krei unuecon de l' sindikata movado, malgraŭ la obstina kontraŭstaro de l' reakciaj gvidantoj de la Amsterdama internacio. La ruĝaj sindikatoj kaj la Sindikata Internacio devas ricevi nian ĉiurimedan helpon en ĉi-direkto.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 73 von 188

Ni rekomendas en landoj, kie ekzistas malgrandaj ruĝaj sindikatoj, atingi ilian adheron al grandaj reformistaj sindikatoj, postulante la liberecon defendi siajn opiniojn kaj la reakcepton de l' eksigitoj, kaj en landoj, kie ekzistas paralele grandaj ruĝaj kaj reformistaj sindikatoj, — la kunvokon de unuiga kongreso sur la bazo de l' platformo de batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj certigo de l' sindikata demokratio.

Necesas diri kun la tuta kategorieco, ke tiu laboristo-komunisto, tiu revolucia laboristo, kiu ne adheras al la amasa sindikato de sia profesio, kiu ne batalas por la transformo de l' reformista sindikato je efektive klasa organizo, kiu ne batalas por la unueco de l' sindikata movado sur la bazo de l' klasa batalo, — tiu laboristo-komunisto, tiu revolucia laboristo ne plenumas sian plej unuavican proletan devon. (Aplaŭdoj).

## LA UNUECA FRONTO KAJ LA JUNULARO.

Mi jam menciis, kamaradoj, kian rolon ludis la envarbo de l' junularo en la faŝistajn organizojn por la venko de l' faŝismo. Parolante pri la junularo, ni devas malkaŝe deklari: ni malatentis nian taskon partoprenigi la amasojn de l' laborula junularo en la batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, kontraŭ la faŝismo kaj la minaco de milito; ni malantentis en pluraj landoj tiujn-ĉi taskojn. Ni subtaksis la grandegan signifon de l' junularo en la batalo kontraŭ la faŝismo. Ni ne ĉiam konsideris la specialajn ekonomiajn, politikajn kaj kulturajn interesojn de l' junularo. Ni ne sufiĉe ankaŭ atentis la revolucian edukadon de l' junularo.

Ĉion-ĉi tre lerte utiligis la faŝismo, transtirinte en kelkaj landoj, precipe en Germanio, grandajn



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 74 von 188

partojn de l' junularo sur la vojon kontraŭ la proletaro. Necesas konsideri, ke la faŝismo enlogas la junularon ne nur per la militarista romantiko. Ĝi iun kromnutras, vestas en la taĉmentoj, al iu donas laboron, fondas eĉ tiel nomatajn kulturajn instituojn por la junularo, celante tiamaniere opiniigi, kvazaŭ ĝi efektive deziras kaj povas nutri, vesti, instrui kaj certigi laboron al la amaso de l' laborula junularo.

Niaj komunistaj junular-asocioj en vico da kapitalismaj landoj estas ĉiam ankoraŭ plimultokaze sektecaj, amasoforaj organizoj. Ilia ĉefa malforteco estas en tio, ke ili ĉiam ankoraŭ penas kopii la komunistajn partiojn, iliajn formojn kaj metodojn de laboro, forgesante, ke la komjunularo — tio n e e s t a s k o m u n i s t a p a r t i o de j u n u l a r o. Ili nesufiĉe konsideras, ke tio estas organizo kun siaj specialaj taskoj. Ĝiaj metodoj kaj formoj de laboro, edukado, batalo devas esti akomoditaj al la konkretaj nivelo kaj bezonoj de l' junularo.

Niaj komjunuloj montris neforgeseblajn ekzemplojn de heroismo en la batalo kontraŭ la faŝistaj perfortoj kaj la burĝa reakcio. Sed al ili ne sufiĉas ankoraŭ la scipovo konkrete kaj persiste elbatali la amasojn de l' junularo el-sub la malamika influo. Tio montras nevenkitan ĝis nun kontraŭstaron al la laboro en la faŝistaj amasaj organizoj, ne ĉiam ĝustan traktmanieron al la socialista kaj alia nekomunista junularo.

Por ĉio-ĉi portas, certe, grandan respondecon ankaŭ la komunistaj partioj, kiuj devas gvidi kaj subteni la komjunularon en ĝia laboro. Ja la problemo de l' junularo estas ne nur komjunulara problemo. T i o e s t a s p r o b l e m o de l' t u t a k o m u n i s t a m o v a d o. En la regiono de la batalo por la junularo la komunistaj partioj kaj la komjunularaj organizoj devas en efektivo realigi decidan antaŭen-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

movigon. La ĉefa tasko de l' komunista junular-movado en la kapitalismaj landoj estas kuraĝe marŝi la vojon de realigo de l' unueca fronto, la vojon de organizo kaj unuigo de l' laborula juna generacio. Kian grandegan signifon havas tiu-ĉi tasko por la revolucia junular-movado montras la ekzemploj de Francio kaj Usono en la lasta tempo. Sufiĉis en tiuj-ĉi landoj nur alpaŝi al la efektivigo de l' unueca fronto kaj tuj riceviĝis konsiderindaj sukcesoj. Meritas ankaŭ atenton sur la kampo de l' internacia unueca fronto la iniciato de l' antifaŝista kaj antimilita komitato en Parizo en la kreo de internacia kunlaborado de ĉiuj nefaŝistaj organizoj de l junularo.

Tiuj-ĉi sukcesaj paŝoj en la movado de l' unueca fronto de l' junularo en la lasta tempo montras ankaŭ ke la formoj de l'unueca fronto de junularo devas esti aplikataj ne laŭ ŝablono, ne nepre la samaj, kiuj estas en la praktiko de l'komunistaj partioj. La komunistaj asocioj de junularo devas ĉiurimede celi la unuigon de l'fortoj de ĉiuj nefaŝistaj amasaj organizoj de l'junularo, inkluzive ĝis la fondo de diversspecaj komunaj organizoj por la batalo kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la neaŭdita senrajteco kaj militarizo de l'junularo, por la ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj de l'juna generacio, por la alvarbo al la antifaŝista fronto de tiu-ĉi junularo, kie ajn ĝi estu: en la entreprenejoj, en la tendaroj de devigaj laboroj, en la laborborsoj, en la kazernoj kaj la floto, en lernejoj kaj diversaj sportaj, kulturaj kaj aliaj organizoj.

Disvolvante kaj plifortigante la komjunularon, niaj komjunuloj devas klopodi por la fondo de antifaŝistaj asocioj (unuiĝoj kaj unuecaj organizoj) de l' komunistaj kaj socialistaj junular-ligoj sur la platformo de l' klasbatalo.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 76 von 188

## LA UNUECA FRONTO KAJ LA VIRINOJ.

Ne malpli granda subtakso, kamaradoj, ol rilate al la junularo, elmontriĝis ankaŭ rilate al laboro inter laborulaj virinoj, inter laboristinoj, senlaboraj virinoj, kamparaninoj kaj hejmmastrinoj. Tamen, se de la junularo la faŝismo pli ol ĉio forprenas, la virinon ĝi precipe senkompate kaj cinike sklavigas, ludante je ŝiaj plej doloraj sentoj de patrino, hejmmastrino, senfamilia laboristino, malcertaj pri la morgaŭa tago. La faŝismo, elpaŝante en la rolo de bonfaranto, j'etas mizerajn almozojn al la malsatanta familio, penante dissolvi per tio la maldolĉecon, sekvigatan, precipe ĉe la laborulaj virinoj, per la neaŭdita sklaveco, kiun portas por ili la faŝismo. Ĝi elpelas la laboristinojn el la produktejoj. Ĝi perforte forsendas la malriĉajn junulinojn sur kamparon, kondamnante ilin al la situacio de senpaga servistino ĉe la riĉkampulo aŭ bienulo. Promesante al la virino feliĉan hejmon, ĝi, kiom neniu alia kapitalisma reĝimo, pelas la virinon sur la vojon de l' prostituo.

La komunistoj, kaj antaŭ ĉio niaj komunistinoj, devas memori, ke ne povas esti sukcesa batalo kontraŭ la faŝismo kaj kontraŭ la milito sen la partoprenigo en ĝi de l' vastaj virinaj amasoj. Kaj por tio per nura agitado oni nenion atingos. Ni devas trovi la eblecon, konsiderante ajnan konkretan cirkonstancaron, mobilizi la amasojn de l' laborulaj virinoj ĉirkaŭ iliaj aktualaj interesoj kaj postuloj, en la batalo kontraŭ la vivkareco, por la plialtigo de l' salajro sur la bazo de egala pago por egala laboro, kontraŭ la amasaj maldungoj, kontraŭ ĉiu elmontro de ilia neegalrajta situacio kaj faŝisma sklavigo.

Aspirante partoprenigi la laborulajn virinojn en la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

revolucia movado, ni ne devas timi ĉi-cele la kreon ankaŭ de specialaj virinaj organizoj tie kie tio estos necesa.

La antaŭjuĝo, kvazaŭ necesas likvidi la virinajn organizojn, kiuj estas sub la gvido de l' kompartioj en la kapitalismaj landoj, je la nomo de l' batalo kontraŭ la „virina separatismo" en la laborista movado, tiu-ĉi antaŭjuĝo oftokaze alportis grandan malutilon.

Necesas eltrovi la plej simplajn, elastajn formojn kun la celo de starigo de kontakto kaj kuna batalo de l' revoluciaj, socialdemokrataj kaj progresemaj kontraŭmilitaj kaj antifaŝistaj organizoj de virinoj. Ni devas nepre atingi ke la laboristinoj kaj laborulaj virinoj batalu ŝultro-ĉe-ŝultro kun iliaj klasfratoj en la vicoj de l' unueca fronto de la laborista klaso kaj de l' antifaŝista popola fronto.

## LA ANTIIMPERIALISMA UNUECA FRONTO.

Ekskluzivan gravecon, en konekso kun la aliiĝinta internacia kaj interna cirkonstancaro, en ĉiuj koloniaj kaj duonkoloniaj landoj akiras la demando pri antiimperialisma unueca fronto.

Formante larĝan antiimperialisman unuecan fronton de batalo en la kolonioj kaj duonkolonioj, necesas antaŭ ĉio konsideri la variecon de l' kondiĉoj, en kiuj pasas la antiimperialisma batalo de l' amasoj, la diversan gradon de matureco de l' naci-liberiga movado, de l' rolo de la proletaro en ĝi kaj influo de l' komunista partio sur la vastajn amasojn.

La demando staras aliel en Brazilo ol en Hindio kaj Ĉinio, k.t.p.

En Brazilo la komunista partio, metinta ĝustan komencon al la disvolvo de l' unueca antiimperialisma fronto per la kreo de l' naci-liberiga alianco,



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 78 von 188

devas streĉi ĉiujn fortojn por la plua plilarĝigo de ĉi-fronto per la envarbo unuavice de l' multmilionaj amasoj de l' kampularo, kondukante la aferon al la kreo de trupoj de l' popol-revolucia armeo, ĝis la fino fidelaj al la revolucio, kaj al la realigo de l' regado de la naci-liberiga alianco.

En Hindio la komunistoj devas partopreni, subteni kaj plilarĝigi ĉiujn antiimperialismajn amasajn elpaŝojn, ne esceptante tiujn, kiujn ĉefas la naci-reformistoj. Konservante sian politikan kaj organizan memstarecon, ili devas ekkonduki aktivan laboron interne de l' organizoj, partoprenantaj en la Nacia Kongreso de Hindio, kontribuante al la kristaligo interne de ili de naci-revolucia alo kun la celo de plua disvolvo de l' naci-liberiga movado de l' popoloj de Hindio kontraŭ la brita imperialismo.

En Ĉinio, kie la popola movado venigis jam al la kreo de sovetaj rajonoj sur konsiderinda teritorio de la lando kaj al la organizo de potenca Ruĝa Armeo, la rabula ofensivo de l' japana imperialismo kaj la perfido de l' nankina registaro metis sub minacon la nacian ekziston de l' granda ĉina popolo. Nur la ĉinaj sovetoj povas elpaŝi kiel unuiga centro en la batalo kontraŭ la sklavigo kaj divido de Ĉinio fare de l' imperialistoj, kiel unuiga centro, kiu kolektos ĉiujn antiimperialismajn fortojn por la nacia batalo de l' ĉina popolo.

Ni aprobas tial la iniciativon de nia kuraĝa frata ĉina kom. partio en la afero de l' kreo de plej larĝa antiimperialisma unueca fronto kontraŭ la japana imperialismo kaj ĝiaj ĉinaj agentoj kun ĉiuj tiuj organizataj fortoj, ekzistantaj sur la teritorio de Ĉinio, kiuj estas pretaj efektive konduki batalon por la savo de ilia lando kaj ilia popolo. Mi estas certa, ke mi esprimos la sentimentojn kaj la pensojn de tuta nia kongreso se mi deklaros: ni sendas flaman



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 79 von 188

fratecan saluton de l'nomo de la revolucia proletaro de l' tuta mondo al ĉiuj sovetoj de Ĉinio, al la ĉina revolucia popolo. (*Varmegaj aplaŭdoj, ĉiuj en la halo leviĝas*). Ni sendas flaman fratecan saluton al la spertita en miloj da bataloj heroeca Ruĝa Armeo de Ĉinio. (*Varmegaj aplaŭdoj*). Kaj ni certigas la ĉinan popolon pri nia firma rezoluteco subteni ĝian batalon por kompleta ĝia liberigo je ĉiuj imperialistaj rabuloj kaj iliaj ĉinaj agentoj. (*Varmegaj aplaŭdoj, ĉiuj en la halo leviĝas. Kelkajn minutojn daŭras bruaj ovacioj. Salut-aklamoj flanke de ĉiuj delegitoj*).

## PRI REGISTARO DE L'UNUECA FRONTO.

Kamaradoj, ni prenis rezolutan, aŭdacan kurson al la unueca fronto de l' laborista klaso, kaj ni estas pretaj efektivigi ĝin kun la tuta konsekvencemo.

Se oni demandos nin, ĉu staras ni, komunistoj, sur la grundo de l'unueca fronto *nur* en la batalo por partaj revendikoj, aŭ ni estas pretaj dividi la respondecon eĉ tiam kiam temos pri la kreo de *registaro* sur la bazo de l'unueca fronto, ni diros kun plena konscio de l'respondeco: jes, ni konsideras, ke povas veni tia situacio, kiam la kreo de *registaro de l'proletara* unueca fronto aŭ de *l'antifaŝista popola fronto* estos ne nur ebla, sed ankaŭ necesa en la interesoj de l' proletaro. (*Aplaŭdoj*). Kaj ni en ĉi-okazo sen iuj ajn ŝanceliĝoj elpaŝos por la kreo de tia registaro.

Mi parolas ĉi-tie ne pri registaro, kiu povas esti formita *post* la triumfo de l' proletara revolucio. Certe, ne estas ekskludite, ke en iu lando tuj post la revolucia renverso de l' burĝaro povas esti formita soveta registaro sur la bazo de registara bloko



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 80 von 188

de l'komunista partio kun certa partio (aŭ kun ties maldekstruma bloko), partoprenanta en la revolucio. La venkinta partio de l'rusaj bolŝevikoj, kiel oni scias, post la Oktobra revolucio enkondukis en la konsiston de l'soveta registaro ankaŭ la reprezentantojn de l' maldekstrumaj eseroj[29]. Tio estis specifeco de l'unua sovet registaro post la venko de l'Oktobra revolucio.

Temas ne pri tia okazo, sed pri la ebla kreo de registaro de l'unueca fronto antaŭtage kaj antaŭ la triumfo de l' soveta revolucio.

Kia registaro ĝi estas? Kaj en kia situacio povas temi pri ĝi?

Tio estas antaŭ ĉio registaro de batalo kontraŭ la faŝismo kaj reakcio. Tio devas esti registaro, estiĝinta rezulte de l' movado de la unueca fronto kaj neniamaniere limiganta la agadon de l' komunista partio kaj de l'amasaj organizoj de la laborista klaso, sed, male, entreprenanta decidajn agojn kontraŭ la kontraŭrevoluciaj financaj magnatoj kaj iliaj faŝistaj agentoj.

En la konforma momento, apogante sin je la progresanta movado de l'unueca fronto, la komunista partio de l' konsiderata lando elpaŝos por la kreo de tia registaro sur la bazo de certa antifaŝista platformo.

Ĉe kiuj objektivaj kondiĉoj estos ebla la kreo de tia registaro? Al tia demando en la plej ĝenerala formo oni povas respondi: en kondiĉoj de politika krizo, kiam la regantaj klasoj jam ne estos kapablaj venki la potencan leviĝon de l'amasa antifaŝista movado. Sed tio estas nur la ĝenerala perspektivo, sen kiu sendube en praktiko ne estas ebla la kreo de registaro de l'unueca fronto. Nur la ĉeesto de certaj specialaj premisoj povas meti sur la tagordon la demandon pri la kreo de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

tia registaro, kiel politike necesan taskon. Al mi ŝajnas, ke tiuokaze la plej grandan atenton indas jenaj premisoj:

Unue, kiam la ŝtata aparato de l' burĝaro estas jam sufiĉe disorganizita kaj paralizita, tiel ke la burĝaro ne povas malhelpi al la kreo de registaro de batalo kontraŭ la reakcio kaj faŝismo;

due, kiam la plej vastaj amasoj de laboruloj, precipe la amasaj sindikatoj, torente leviĝas kontraŭ la faŝismo kaj reakcio, sed ankoraŭ ne estas pretaj leviĝi al revolto por, sub la gvido de l' komunista partio, batali pro la konkero de soveta reĝimo;

trie, kiam la diferenciĝo kaj maldekstrumiĝo en la vicoj de l' socialdemokratio kaj aliaj partioj, partoprenantaj la unuecan fronton, jam venigis al tio, ke konsiderinda ilia parto postulas senkompatajn agojn kontraŭ la faŝistoj kaj aliaj reakciuloj, batalas kune kun la komunistoj kontraŭ la faŝismo kaj malkaŝe elpaŝas kontraŭ la reakcia, malamika al komunismo, parto de sia propra partio.

Kiam kaj en kiuj landoj fakte aperos tia situacio, en kiu ĉi premisoj estos sufiĉagrade donitaj, — tion anticipe diri ne estas eble, sed, ĉar tia ebleco estas ekskludata en neniu el la kapitalismaj landoj, ni devas do ĝin konsideri kaj ne ne nur nin mem orienti al ĝi kaj nin prepari, sed konformmaniere orienti ankaŭ la laboristan klason.

Tio, ke ni hodiaŭ metas al pritrakto ĉi-demandon, certe, estas ligata kun nia takso de l'situacio kaj de l' proksima perspektivo de disvolvo, kaj ankaŭ kun la fakta kresko de l'movado de unueca fronto en pluraj landoj dum la lasta tempo. Pli ol dek jarojn la situacio en la kapitalismaj landoj estis tia ke la Komunista Internacio ne devis pritrakti tiaspecajn demandojn.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 82 von 188

Vi memoras, kamaradoj, ke en nia kvara kongreso, en 1922, kaj ankoraŭ en la kvina kongreso, en 1924, estis pritraktita la demando pri la lozungo de laborista aŭ laborist-kamparana registaro. Ĉe tio komence temis laŭesence preskaŭ pri demando analoga al tiu, kiun ni metas hodiaŭ. La debatoj, kiuj disvolviĝis tiam en la Komunista Internacio ĉirkaŭ ĉi-tiu demando kaj precipe la politikaj eraroj, kiujn oni ĉe tio allasis, havas ankoraŭ nun signifon por la pliakrigo de nia viglatento rilate al la danĝero de deviadoj dekstren kaj „maldekstren“ de l'bolŝevista linio en tiu-ĉi demando. Tial mi mallongece indikos iujn el tiuj-ĉi eraroj, por dedukti el ili la lecionojn por la hodiaŭa politiko de niaj partioj.

La unua vico da eraroj estis kondiĉita ĝuste per tio, ke la demando pri laborista registaro ne estis klare kaj firme kunligita kun la ĉeesto de politika krizo. Dank'al tio la dekstraj oportunistoj povis interpreti la aferon tiel, ke la konstituigon de laborista registaro, subtenata de la komunista partio, oni devas aspiri en ajna, tiel diri, „normala“ situacio. La ultramaldekstrumaj, male agnoskis nur tian laboristan registaron, kiu povas esti kreita nur per armita revolto, post la renverso de l'burĝaro. Kaj tio kaj alio estis neĝusta, kaj tial, por eviti la ripeton de similaj eraroj, ni nun tiel akcentas la precizan prikonsideron de l'specialaj konkretaj kondiĉoj de politika krizo kaj leviĝo de l'amasa movado, ĉe kiuj la kreo de registaro de l'unueca fronto povas esti ebla kaj politike necesa.

La dua vico da eraroj estis kondiĉita per tio, ke la demando de laborista registaro ne estis kunligita kun la disvolvo de batalema amasa movado de l'unueca fronto de l'proletaro. Tial la dekstraj oportunistoj havis la eblecon denaturigi la demandon,



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 83 von 188

reduktante ĝin al la senprincipa taktiko de blokiĝo kun la socialdemokrataj partioj sur la bazo de pure-parlamentaj kombinoj. La ultramaldekstrumaj, male, kriis: „Neniajn koaliciojn kun la kontraŭrevolucia socialdemokratio!", konsiderante laŭesence ĉiujn socialdemokratojn kiel kontraŭrevoluciulojn.

Kaj tio kaj alio estis neĝusta, kaj ni nun substrekas, unuflanke, ke ni tute ne deziras tian „laborstan registaron", kiu estus plej simple plivastigita socialdemokrata registaro. Ni eĉ preferas rezigni je la nomo „laborista registaro" kaj parolas pri registaro de l'unueca fronto, kiu laŭ sia politika karaktero estas alia, principe alia, ol ĉiuj socialdemokrataj registaroj, kutime nomantaj sin „laborista registaro". Dum socialdemokrata registaro prezentas el si ilon de klasa kunlaborado kun la burĝaro en la interesoj de l' konservado de la kapitalisma reĝimo, la registaro de l' unueca fronto estas organo de kunlaborado de l'revolucia avangardo kun aliaj antifaŝistaj partioj en la interesoj de l'tuta laborula popolo, registaro de batalo kontraŭ la faŝismo kaj reakcio. Estas klare, ke tio estas du aj'oj en radiko malsamaj.

Aliflanke, ni substrekas la neceson vidi diferencon inter du diversaj tendaroj de l'socialdemokratio. Kiel mi jam indikis, ekzistas reakcia tendaro de l'socialdemokratio, sed ekzistas kaj kreskas kune kun tio tendaro de l'maldekstrumaj socialdemokratoj (sen citosignoj), de l'revoluciiĝantaj laboristoj. La decida diferenco inter ili en praktiko estas en la rilato al la unueca fronto de l' laborista klaso. La reakciaj socialdemokratoj estas kontraŭ la unueca fronto, ili kalumnias pri la movado de l'unueca fronto, sabotas kaj diskomponigas ĝin, ĉar ĝi subrompas ilian politikon de klasa kunlaborado



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

kun la burĝaro. La maldekstrumaj socialdemokratoj estas por la unueca fronto, ili defendas, disvolvas, plifortigas la movadon de l'unueca fronto. Ĉar tiu-ĉi movado de l'unueca fronto estas batalema movado kontraŭ la faŝismo kaj reakcio, ĝi estos konstanta mova forto puŝanta la registaron de l'unueca fronto al la batalo kontraŭ la reakcia burĝaro. Ju pli forte disvolviĝos ĉi-tiu amasa movado, des pli grandan forton ĝi povas prezenti ankaŭ al la registaro por la batalo kontraŭ la reakciuloj. Kaj ju pli bone tiu-ĉi amasa movado estos organizita elsube, ju pli vasta estos la reto da eksterpartiaj klasaj organoj de l'unueca fronto en la entreprenejoj, meze de l'senlaboruloj, en la laboristaj kvartaloj, meze de l'etpopolo de l'urbo kaj kamparo, des pli estos da garantioj kontraŭ ebla denaturiĝo de l'politiko de la registaro de l'unueca fronto.

La tria vico da eraraj opinioj, evidentiĝintaj en la antaŭaj debatoj, koncernis ĝuste la praktikan politikon de l'„laborista registaro". La dekstraj oportunistoj opiniis ke la laborista registaro devas sin teni „en la kadroj de l'burĝa demokratio", sekve, devas entrepreni neniujn paŝojn, elirantajn ekster tiujn kadrojn. La ultramaldekstrumaj, male, fakte rifuzis ĉian provon krei registaron de l'unueca fronto.

En 1923 en Saksio kaj Turingio oni povis vidi la okulfrapan bildon de l'dekstraoportunista praktiko de l'„laborista registaro". La enpaŝo de l'komunistoj en la saksian registaron kune kun la maldekstrumaj socialdemokratoj (grupo de Zeitner) laŭ si mem ne estis eraro, male, la revolucia situacio en Germanio plene pravigis tiun paŝon. Sed, partoprenante en la registaro, la komunistoj devis utiligi siajn poziciojn antaŭ ĉio por armi la proletaron. Ili tion-ĉi



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

ne faris. Ili eĉ ne rekvizis unu el la loĝejoj de l' riĉuloj, kvankam la loĝej-mizero ĉe la laboristoj estis tiom granda ke multaj el ili kune kun la infanoj kaj edzinoj estis sen loĝo. Ili entreprenis ankaŭ nenion por la organizo de revolucia amasa movado. Ili ĝenerale kondutis tiel, kiel ordinaraj parlamentaj ministroj „en la kadroj de l'burĝa demokratio". Kiel oni scias, tio estis rezulto de l'oportunista politiko de Brandler kaj liaj samideanoj. Rezulte sekvis tia bankroto, ke ni ankaŭ nun ankoraŭ estas devigitaj mencii la saksian registaron kiel klasikan ekzemplon de tio, kiel revoluciuloj ne devas konduti en registaro.

Kamaradoj, ni postulas de ĉiu registaro de l'unueca fronto tute alian politikon. Ni postulas de ĝi ke ĝi realigu difinitajn, konformajn al la situacio, radikajn revoluciajn revendikojn. Ekzemple, la kontrolon super la produktado, la kontrolon super la bankoj, la disigon de l'polico, la anstataŭigon de ĝi per armita laborista milico k.t.p.

Lenin alvokis nin 15 jarojn antaŭe koncentri la tutan atenton je la „elserĉo de l'formoj de transsiro aŭ aliro al la proletara revolucio". Eble, la registaro de l'unueca fronto en pluraj landoj estos unu el la plej gravaj transiraj formoj. La „maldekstrumaj" doktrinuloj ĉiam preterpasis tiun-ĉi direktivon de Lenin, ili, kiel limigitaj propagandistoj, ĉiam parolis nur pri pri la „celo", neniam zorgante pri la „formoj de transiro". Tial ili provis redukti ankaŭ la lozungon „laborista registaro" al malplena vortludo, al „sinonimo" de l'proletara diktaturo. Kaj la dekstraj oportunistoj provis kun la helpo de ĉi-tiu lozungo starigi specialan „demokratian interspacan stadion" inter la diktaturo de l' burĝaro kaj la diktaturo de l' proletaro, por sugesti al la laboristoj la iluzion de paca parlamenta pro-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 86 von 188

menado el unu diktaturo en alian. Tiun-ĉi fikcian „interspacan stadion“ ili nomis ankaŭ „transira formo“ kaj eĉ provis sin bazi sur Lenin! Sed tiun-ĉi friponaĵ'on ne estis malfacile malkovri: ja Lenin parolis pri la formo de transiro aŭ aliro al la „p r o l e t a r a r e v o l u c i o“, t.e. al la renverso de l'burĝa diktaturo, sed n e pri la transira formo i n t e r la burĝa kaj la proletara diktaturo.

Kial Lenin atribuis tian treege grandan signifon al la formo de transiro al la proletara revolucio? Tial ke li konsideris la „f u n d a m e n t a n l e ĝ o n d e ĉ i u j g r a n d a j r e v o l u c i o j“, tiun leĝon, ke nuraj propagando kaj agitado ne kapablas anstataŭi al la amasoj la p r o p r a n p o l i t i k a n s p e r t o n, kiam temas pri la aligo de efektive vastaj amasoj de l'laboruloj sur la flankon de l'revolucia avangardo, sen kio ne estas ebla la triumfplena batalo pro la regado. La kutima eraro de mismaldekstruma karaktero — tio estas la imago, ke apenaŭ estiĝos politika (aŭ revolucia) krizo, al la komunista gvidantaro sufiĉas lanĉi la lozungon de l'revolucia leviĝo, kaj la vastaj amasoj ĝin sekvos. Ne, eĉ ĉe tiu-ĉi krizo la amasoj tute ne ĉiam estas pretaj al tio. Ni tion vidas en la ekzemplo de H i s p a n i o. Helpi al la m i l i o n a j a m a s o j laŭeble pli rapide per la propra sperto ellerni, kion ili devas fari, kie trovi la decidan elvojon, kia partio indas ilian fidon, — jen kial estas necesaj, intercetere, kiel la transiraj lozungoj, tiel ankaŭ specialaj „formoj de transiro aŭ aliro al la proletara revolucio“. Aliokaze la plej vastaj popol-amasoj, estante en mallibero ĉe la etburĝaj demokratiaj iluzioj kaj tradicioj, povas eĉ en la ĉeesto de revolucia situacio ŝanceliĝi, malrapidumi kaj erarvagi ne trovante la vojon al la revolucio, — kaj poste trafi sub la frapojn de l'faŝistaj ekzekutistoj.

Tial ni antaŭfiksas la eblecon de kreo, en la kon-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 87 von 188

diĉoj de politika krizo, de registaro de l'antifaŝista popola fronto. Je kiom tia registaro efektive kondukos batalon kontraŭ la malamikoj de l'popolo, prezentos liberon de ago al la laborista klaso kaj al la komunista partio, ni, komunistoj, ĉiurimede ĝin subtenos kaj kiel soldatoj de l'revolucio batalos ĉe la unua fajrolinio. Sed ni malkaŝe diras al la amasoj:

La definitivan savon tiu-ĉi registaro ne povas alporti. Ĝi ne estas kapabla renversi la klasan dominadon de l'ekspluatistoj, kaj tial ne povas definitive forigi ankaŭ la danĝeron de faŝista kontraŭrevolucio. Sekve, nesesas sin armi por la socialista revolucio! La savon alportas nur kaj nur soveta reĝimo!

Pritaksante la nunan disvolvon de l'monda situacio, ni vidas ke maturiĝas politika krizo en tuta vico da landoj. Per tio estas kondiĉita la granda aktualeco kaj graveco de firma decido de nia kongreso en la demando pri registaro de l'unueca fronto.

Se niaj pa tioj scipovos bolŝevistece utiligi la eblecon de kreo de registaro de l'unueca fronto, la batalon ĉirkaŭ ĝia kreo, kaj ankaŭ la ĉeeston ĉe la regado de tia registaro por la revolucia preparado de l'amasoj, ĝi estos ankaŭ la plej bona politika pravigo de nia kurso al la kreo de registaro de l'unueca fronto.

## PRI LA IDEOLOGIA BATALO KONTRAŬ LA FAŜISMO.

Unu el la plej malfortaj flankoj de l'antifaŝista batalo de niaj partioj estas en tio, ke ili nesufiĉe kaj neĝustatempe reagas al la demagogio de l'faŝismo kaj kontinuas ĝis nun malŝate rilati al la demandoj de batalo kontraŭ la faŝisma ideologio. Multaj kamaradoj ne kredis, ke tiom reakcia vario de

l'burĝa ideologio, kiel la ideologio de faŝismo, venanta en sia absurdeco iufoje al frenezo, estas ĝenerale kapabla akiri amasan influon. La malproksimen atinginta putrado de l'kapitalismo penetras en la kernon mem de ĝiaj ideologio kaj kulturo, kaj la senespereca situacio de l'vastaj popolaj amasoj faras certajn tavolojn el ili influeblaj al la infekto per la ideologiaj elj'etaj'oj de tiu putrado.

Tiun-ĉi forton de l'ideologia infekto de l'faŝismo ni neniuokaze devas subtaksi. Ni devas, male, de nia flanko disvolvi vastan ideologian batalon sur la bazo de klara, populara argumentado kaj ĝusta, bone pripensita alpaŝmaniero al la specifeco de l' nacia psikologio de l' popolaj amasoj.

La faŝistoj reskuas la tutan h i s t o r i o n de ĉiu popolo por prezenti sin la heredantoj kaj daŭrigantoj de ĉio plej altigita kaj heroeca en ĝia pasinto, kaj ĉion, kio estis malaltiga kaj ofenda por la naciaj sentoj de l'popolo, utiligas kiel ilo kontraŭ la malamikoj de l'faŝismo. En Germanio estas eldonitaj centoj da libroj havantaj la nuran celon: la falsigon faŝistmaniere de l'historio de la germana popolo.

La freŝebakitaj nacisocialistaj historiistoj penas prezenti la historion de Germanio tiamaniere, kvazaŭ rezulte de ia „historia laŭleĝeco" en la daŭro de 2000 jaroj pasas ruĝfadene linio de disvolvo, veniginta al la apero sur la historia scenejo de l'nacia „savinto", „mesio" de l'g e r m a n a popolo, la konata kaporalo de a ŭ s t r a deveno! En tiuj-ĉi libroj estas pentritaj la plej grandaj agantoj de l'germana popolo en la pasinto kiel faŝistoj, kaj la grandaj kamparanaj movadoj kiel la direktaj anticipuloj de l'faŝista movado.

Mussolini intense penas gajni kapitalon je la heroeca figuro de Garibaldi. La francaj faŝistoj elŝovas, kiel sian heroinon, Jeanne d'Arc[30]. La usonaj



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 89 von 188

faŝistoj apelas al la tradicioj de l'amerikaj militoj pro sendependeco, tradicioj de Washington, Lincoln. La bulgaraj faŝistoj utiligas la naciliberigan movadon de l'sepdekaj jaroj [31] kaj ĝiajn ŝatatajn popolajn hereojn Vasil Levski, Stefan Karaĝa k.a.

Tiuj komunistoj, kiuj opinias, ke ĉio-ĉi ne koncernas la aferon de l'laborista klaso, kiuj nenion faras por historie ĝuste, en vere-markisma, lenino-marksisma, lenino-stalineca spirito lumigi antaŭ la laborulaj amasoj la pasinton de ilia propra popolo, por kunligi ilian nunan batalon kun ĝiaj revoluciaj tradicioj en la pasinto, — tiuj komunistoj libervole prezentas al la faŝistaj falsigistoj ĉion, kio estas valora en la historia pasinto de la nacio, por la stultigo de l'popolaj amasoj. (Aplaŭdoj).

Ne! Kamaradoj! Nin koncernas ĉiu grava demando ne nur de l' nuntempo kaj de l'estonto, sed ankaŭ de l'pasinto de nia propra popolo. Ja ni, komunistoj, ne kondukas mallarĝan politikon de gildaj interesoj de l'laboristoj. Ni ne estas limigitaj agantoj de l'trade-union'oj aŭ gvidantoj de l'mezepokaj gildoj de metiistoj kaj metihelpistoj. Ni estas la reprezentantoj de l'klasaj interesoj de la plej grava, plej granda klaso de l'nuna socio — la laborista klaso, alvokita liberigi la homaron je la suferoj de l'kapitalisma sociordo, jam renversinta sur unu sesono de l'terglobo la jugon de l'kapitalismo kaj estanta la reganta klaso. Ni defendas la viv-interesojn de ĉiuj ekspluatitaj laborulaj tavoloj, t. e. de l'superanta plimulto de l'popolo en ĉiu kapitalisma lando.

Ni, komunistoj estas la nepacigeblaj principaj kontraŭuloj de l'burĝa naciismo en ĉiuj ĝiaj varioj. Sed ni ne estas adeptoj de l'nacia nihilismo kaj neniam devas elpaŝi kiel

tiaj. La tasko de l'edukado de l'laboristoj kaj de ĉiuj laboruloj en la spirito de proleta internaciismo — estas unu el la fundamentaj taskoj de ĉiu komunista partio. Sed tiu, kiu pensas, ke tio-ĉi permesas al li kaj eĉ devigas kraĉi sur ĉiujn naciajn sentojn de l'vastaj laborulaj amasoj, tiu estas malproksima de l'vera bolŝevismo, nenion komprenis el la instruo de Lenin kaj Stalin pri la nacia problemo. (A p l a ŭ d o j).

Lenin, kiu ĉiam rezolute kaj konsenkvenceme batalis kontraŭ la burĝa naciismo, montris al ni ekzemplon de ĝusta rilato al la naciaj sentoj en sia artikolo „Pri la nacia fiereco de l'grandrusoj", verkita en 1914. Jen kion li skribis:

„Ĉu estas fremda al ni, grandrusaj konsciaj proletoj, la sento de nacia fiereco? Certe, ne! Ni amas nian lingvon kaj nian patrolandon, ni pli ol ĉio laboras por levi ĝ i a j n laborulajn amasojn (t. e. 9/10 el ĝia loĝantaro) al la konscia vivo de demokratoj kaj socialistoj. Al ni estas pli ol ĉio dolore vidi kaj senti al kiaj perfortoj, jugo kaj fitraktado submetas nian belegan patrolandon la caraj ekzekutistoj, nobeloj kaj kapitalistoj. Ni estas fieraj pri tio, ke tiuj-ĉi perfortoj elvokis rebaton el nia medio, el la medio de grandrusoj, ke t i u - ĉ i medio elstarigis Radiŝĉev'on, la decembrulojn, la revoluciulojn-malnobelojn de l'70-aj jaroj, ke la grandrusa laborista klaso kreis en 1905 potencan revolucian partion de l'amasoj... Ni estas plenaj de sento de nacia fiereco, ĉar la grandrusa nacio a n k a ŭ kreis revolucian klason, a n k a ŭ pruvis ke ĝi estas kapabla doni al la homaro grandajn ekzemplojn de batalo pro libero kaj pro socialismo, sed ne nur grandajn pogromojn, vicojn de pendumiloj, torturejojn, grandajn malsatojn kaj grandan sklav.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 91 von 188

humilecon antaŭ la popoj, caroj, bienuloj kaj kapitalistoj.

Ni estas plenaj de sento de nacia fiereco kaj ĝuste tial ni **p r e c i p e** malamas **n i a n** sklavecan pasinton... kaj nian sklavecan nunon, kiam la samaj bienuloj, akceligitaj de la kapitalistoj, kondukas nin al milito, por sufoki Pollon kaj Ukrainion, por premi la demokratan movadon en Persio kaj en Ĉinio, por plifortigi la bandon de l' Romanov'oj, Bobrinskij'oj, Puriŝkeviĉ'oj, malhonorigantaj nian grandrusan nacian indecon"[32].

Jen kiel skibis pri nacia fiereco Lenin.

Mi pensas, kamaradoj, ke mi ne agis malĝuste ĉe la proceso en Leipzig, kiam ĉe la ekprovo de l'faŝistoj prikalumnii la bulgaran popolon kiel barbara, prenis sub mian defendon la nacian honoron de l'laborulaj amasoj de la bulgara popolo, sindoneme batalantaj kontraŭ la faŝistaj uzurpuloj, tiuj-ĉi veraj barbaroj kaj sovaĝuloj. (**V a r m e g a j  k a j  d a ŭ r a n t a j  a p l a ŭ d o j**), kaj kiam mi deklaris, ke mi havas neniajn motivojn por honti, ke mi estas bulgaro, kaj male mi fieras ke mi estas filo de l'heroeca bulgara laborista klaso.

Kamaradoj! La proleta internaciismo devas, por tiel diri, „alklimatiĝi" en ĉiu lando, por ellasi profundajn radikojn en la naska lando. La **n a c i a j  f o r m o j** de l'proletara klasa batalo kaj laborista movado de apartaj landoj ne kontraŭdiras al la proleta internaciismo, male, ĝuste en tiuj-ĉi formoj oni povas kun sukceso bataldefendi ankaŭ la **i n t e r n a c i a j n  i n t e r e s o j n** de l'proletaro.

Kompreneble, necesas **ĉ i e  k a j  e n  ĉ i u j  o k a z o j** malkovri kaj konkrete pruvi al la amasoj, ke la faŝista burĝaro sub la preteksto de defendo de la tutnaciaj interesoj kondukas sian egoistan politikon



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 92 von 188

de subpremo kaj ekspluato de l'propra popolo, same kiel rabado kaj sklavigo de aliaj popoloj. Sed per tio s i n l i m i g i oni ne povas. Necesas samtempe per la batalo mem de l'laborista klaso kaj la elpaŝoj de l' komunistaj partioj montri ke la proletaro, sin levante kontraŭ ĉiaspeca servutigo kaj nacia subpremo, estas la u n i k a vera batalanto pro la nacia libereco kaj la sendependeco de l'popolo.

La interesoj de l' klasa batalo de la proletaro kontraŭ la hejmlandaj ekspluatistoj kaj subpremantoj ne kontraŭdiras al la interesoj de libera kaj feliĉa estonto de l' nacio. Male: la socialista revolucio signifos la s a v o n d e l' n a c i o kaj malfermos al ĝi la vojon al supera leviĝo. P e r t i o, ke la laborista klaso nuntempe konstruas siajn klasajn organizojn kaj plifortigas siajn poziciojn, ke ĝi defendas kontraŭ la faŝismo la demokratiajn rajtojn kaj liberon, ke ĝi batalas por la renverso de l'kapitalismo, jam p e r t i o m e m ĝi batalas por la estonto de l'nac'o.

La revolucia proletaro batalas por la savo de la kulturo de l'popolo, por ĝia liberigo el la katenoj de l'ekputranta monopola kapitalo, de l'barbara faŝismo, perfortanta ĝin. N u r la proletara revolucio povas evitigi la pereon de l'kulturo, levi ĝin al la supera ekfloro, kiel vere-popolan kulturon — n a c i a n l a ŭ l a f o r m o k a j s o c i a l i s m a n l a ŭ l a e n h a v o, — kio estas antaŭ niaj okuloj efektivigata sub la gvido de S t a l i n en Sovet-Unio. (A p l a ŭ d o j).

La proletara internaciismo ne nur ne kontraŭdiras tiun-ĉi batalon de l' laboruloj de apartaj landoj por nacia, socia kaj kultura libereco, sed ankaŭ certigas, dank'al la internacia proletara solidareco kaj batala unueco, la s u b t e n o n, necesan por la venko en tiu-ĉi batalo. N u r e n p l e j i n t i m a k u n l i g o kun la venkinta proletaro de l' granda Sovet-Unio la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 93 von 188

laborista klaso de l' kapitalismaj landoj povas venki. Nur batalante brak-ĉe-brako kun la proletaro de l'imperialismaj landoj, la koloniaj popoloj kaj la subpremitaj naciaj minoritoj [33] povas elbatali sian liberigon. Nur tra la revolucia unuiĝo de l'imperialismaj landoj kun la naci-liberiga movado de l'koloniaj kaj dependaj landoj kuŝas la vojo de l'venko de la proletara revolucio en la imperialismaj landoj, ĉar, kiel instruis nin Marx, „ne povas esti libera la popolo, subpremanta aliajn popolojn".

Ne povas ja la komunistoj, apartenantaj al subpremita, dependa nacio, kun sukceso elpaŝi kontraŭ la ŝovinismo en la vicoj de ilia nacio, se ili samtempe ne montros en la praktiko de l'amasa movado, ke ili en realo batalas por la emancipo de sia nacio kontraŭ la fremda jugo. Ne povas ja ankaŭ, aliflanke, la komunistoj de l'subpremanta nacio fari tion, kio estas necesa por la eduko de l'laborulaj amasoj de sia nacio en la spirito de internaciismo, ne kondukante rezolutan batalon kontraŭ la subprema politiko de l'„propra" burĝaro, por la rajto je kompleta memdifino de l'nacioj, sklavigitaj de ĝi. Se ili tion-ĉi ne faras, ili ne plifaciligos ankaŭ al la laboruloj de l' subpremita nacio la venkon super iliaj naciismaj antaŭjuĝoj.

Se ni en tia spirito elpaŝados, se ni en tuta nia amasa laboro konvinke montros, ke ni estas same liberaj kiel je nacia nihilismo, tiel je burĝa naciismo, do nur en tiu-ĉi okazo ni povas konduki efektive sukcesan batalon kontraŭ la ŝovinista demagogio de l' faŝistoj.

Tial tiom precipe grava estas la ĝusta kaj konkreta apliko de l'lenino-stalineca nacia politiko. Tio-ĉi estas la nepre necesa premiso por sukcesa batalo kontraŭ la ŝovinismo, tiu-ĉi ĉefa ilo de ideologia influo de l'faŝistoj sur la amasojn. (Aplaŭdoj).



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 94 von 188

## III. LA PLIFORTIGO DE L' KOM. PARTIOJ KAJ LA BATALO PRO LA POLITIKA UNUECO DE L' PROLETARO

Kamaradoj! En la batalo por la starigo de l'unueca fronto la signifo de l'gvidanta rolo de l' komunista partio elkreskas neordinare. La iniciantanto, organizanto, mova forto de l'unueca fronto de l'laborista klaso laŭesence estas nur la komunista partio.

La komunistaj partioj povas certigi la mobilizon de l'vastaj amasoj de laboruloj por la unueca batalo kontraŭ la faŝismo kaj la ofensivo de l' kapitalo nur ĉe la ĉiuflanka plifortigo de iliaj propraj vicoj, ĉe la disvolvo de ilia iniciativo, ĉe la efektivigo de marks-leninista politiko kaj ĝusta, elasta taktiko, konsideranta la konkretan cirkonstancaron kaj la dislokacion[34] de l' klasaj fortoj.

### LA PLIFORTIGO DE L' KOMUNISTAJ PARTIOJ

En la periodo inter la sesa kaj sepa kongresoj niaj partioj en la kapitalismaj landoj nekontesteble plikreskis kaj konsiderinde hardiĝis. Sed estus plej danĝera eraro ĉe tio ĉi trankviliĝi. Ju pli plilarĝiĝos la unueca fronto de l'laborista klaso, des pli aperos antaŭ ni da novaj, komplikaj taskoj, des pli ni devos labori super la politika kaj organiza plifortigo de niaj partioj. La unueca fronto de l'proletaro elŝovas armeon da laboristoj, kiu povas plenumi sian mision se ĉe la kapo de tiu-ĉi armeo staros kondukanta forto, indikanta al ĝi la celojn



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

kaj vojojn. Tiu-ĉi kondukanta forto povas esti nur forta proleta revolucia partio.

Kiam ni, komunistoj, streĉas ĉiujn fortojn por la starigo de unueca fronto, ni tion-ĉi faras ne el la mallarĝa vidpunkto de varbado de novaj membroj por la komunistaj partioj. Sed ni devas ĉiuflanke plifortigi la komunistajn partiojn kaj pligrandigi ilian kvantan kreskon ĝuste tial, ke ni serioze deziras la plifortigon de l'unueca fronto. La plifortigo de l' komunistaj partioj prezentas ne mallarĝepartian intereson, sed intereson de l' tuta laborista movado.

La unueco, revolucia kunigiteco kaj batalpreteco de l'komunistaj partioj — jen plej valora kapitalo, kiu apartenas ne nur al ni, sed al la tuta laborista klaso. Nian pretecon iri kune kun la socialdemokrataj partioj kaj organizoj al la batalo kontraŭ la faŝismo ni kunigis kaj kunigos kun nepacigebla batalo kontraŭ la socialdemokratismo kiel ideologio kaj praktiko de kompromisado kun la burĝaro kaj, sekve, ankaŭ kontraŭ ĉiaj enpenetroj de tiu-ĉi ideologio en niajn proprajn vicojn.

Ĉe la kuraĝa kaj rezoluta kondukado de politiko de l'unueca fronto ni renkontas en niaj propraj vicoj obstaklojn, kiujn ni devas, kio ajn estu, forigi en eble plej mallonga tempo.

Post la sesa kongreso de Komintern en ĉiuj komunistaj partioj de kapitalismaj landoj estis efektivigita sukcesplena batalo kontraŭ la tendenco de oportunista akomodiĝo al la kondiĉoj de kapitalisma stabiliĝo kaj kontraŭ la infektiĝo per reformistaj kaj legalistaj iluzioj. Niaj partioj' purigis siajn vicojn je diversspecaj dekstrumaj oportunistoj, plifortiginte per tio sian bolŝevistan unuecon kaj batalkapablon. Malpli sukcese estis kondukata la ba-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 96 von 188

talo kontraŭ sektismo. La sektismo elmontriĝis jam ne en primitivaj, malkaŝaj formoj, kiel en la unuaj jaroj de ekzistado de l'Komunista Internacio-sed, sin kovrante per la formala agnosko de l'bol-ŝevistaj tezoj, malakcelis la disvolvon de l'bolŝevista amasa politiko. En nia tempo tio estas oft-okaze ne „infana malsano", kiel skribis Lenin, sed enradikiĝinta malvirto, sen kies forigo oni ne povas solvi la taskon de starigo de unueca fronto de l'proletaro kaj alkonduko de l'amasoj el pozicioj de reformismo sur la flankon de l' revolucio.

En la nuna cirkonstancaro la sektismo, la memkontenta sektismo, kiel ni kvalifikas ĝin en nia projekto de rezolucio, antaŭ ĉio malhelpas al nia batalo por la realigo de l'unueca fronto. La sektismo, kontenta pri sia doktrinula limigiteco, pri sia foreco je la efektiva vivo de l'amasoj; kontenta pri siaj missimpligitaj metodoj de solvado de l'komplikaj demandoj de l'laborista movado sur la bazo de ŝablonaj skemoj. La sektismo, pretendanta je ĉionsciado kaj konsideranta superflua lerni ĉe la amasoj, je la lecionoj de l'laborista movado. Unu-vorte, la sektismo al kiu la maro atingas nur la genuojn [35].

La memkontenta sektismo ne volas kaj ne povas kompreni, ke la gvidado de l'laborista klaso fare de l'komunista partio ne estas atingebla spontane. La kondukantan rolon de l'komunista partio en la bataloj de l' laborista klaso oni devas elbatali. Por tio necesas ne deklami pri la kondukanta rolo de l'komunistoj, sed per siaj ĉiutageca amasa laboro kaj ĝusta politiko ekmeriti, batalakiri la konfidon de l'laboristaj amasoj. Tio estas ebla nur en tiu okazo se ni, komunistoj, en nia politika laboro serioze konsideras la efektivan nivelon de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

l'klaskonscio de l'amasoj, la gradon de ilia revoluciiĝo, se ni sobre pritaksos la konkretan cirkonstancaron ne sur la bazo de niaj deziroj, sed sur la bazo de tio, kio efektive estas. Ni devas paŝo post paŝo pacience plifaciligi al la vastaj amasoj la transiron sur la poziciojn de l'komunismo. Ni neniam devas forgesi la vortojn de Lenin, kiu tutforte estis avertanta nin, ke —

„la afero estas ĝuste en tio, ke oni ne akceptu la forvivigiton por ni kiel forvivigito por la klaso, kiel forvivigito por la amasoj"[36].

Ĉu nun, kamaradoj, estas malmulte ankoraŭ da doktrinulaj elementoj en niaj vicoj, kiuj en la politiko de l' unueca fronto ĉiam kaj ĉie sentas nurajn danĝerojn? Por tiaj kamaradoj la tuta unueca fronto, ĝi estas seninterrompa danĝero. Sed tiu-ĉi sektana principeco estas nenio alia krom politika senpoveco antaŭ la malfaciloj de l'senpera gvidado de l'batalo de la amasoj.

La sektismo precipe esprimiĝas en la supertakso de l'revoluciiĝo de l'amasoj, en la supertakso de l'rapidritmo de ilia deiro el la pozicioj de reformismo, en la provoj de transsalto trans malfacilaj etapoj kaj komplikaj taskoj de l'movado. Al la metodoj de gvidado de l'amasoj en la praktiko oni ofte substituis metodojn de gvidado de mallarĝpartia grupo. Estis subtaksita la forto de l'tradicia ligo de l'amasoj kun iliaj organizoj kaj gvidantaroj, kaj kiam tiuj-ĉi amasoj tiujn ligojn tuj ni ŝiris, oni al ili komencis rilati same akre, kiel al iliaj reakciaj gvidantoj. Estis ŝablonigitaj la taktiko kaj la lozungoj por ĉiuj landoj, ne estis konsideritaj la specifecoj de l'konkreta cirkonstancaro en ĉiu aparta lando. Estis ignorata la neceso de obstina batalo en la denso de l'amaso mem por la batalakiro de l'konfido de la amasoj, estis malatentata la batalo pro la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 98 von 188

partaj revendikoj de l'laboristoj kaj la laboro en la reformistaj sindikatoj kaj faŝistaj amasaj organizoj. Al la politiko de unueca fronto oni oftokaze substituis nudajn alvokojn kaj abstraktan propagandon.

Ne mapli malhelpis la sektanaj traktmanieroj al la ĝusta elekto de homoj, edukado kaj kreskigo de kontingentoj, ligitaj kun la amasoj, ĝuantaj la konfidon de l'amasoj, de kontingentoj, revolucie eltenitaj kaj spertitaj en la klasaj bataloj, scipovantaj kunigi la praktikan sperton de amasa laboro kun la principa firmeco de bolŝeviko.

La sektismo, tiamaniere, en konsiderinda grado malrapidigis la kreskon de l' komunistaj partioj, malfaciligis la kondukadon de vera amasa politiko, malhelpis al la utiligo de l' malfaciloj de la klasa malamiko por la plifortigo de l' revolucia movado, malhelpis al la afero de l'batalakiro de l'vastaj proletaj amasoj al la flanko de l'komunistaj partioj.

Batalante plej rezolute por la elradikigo kaj la supervenko je la lastaj restoj de l' memkontenta sektismo, ni devas ĉiurimede pligrandigi nian vigl-atenton kaj batalon rilate al la dekstruma oportunismo kaj kontraŭ ĉiuj ĝiaj konkretaj elmontriĝoj, konsiderante ke la danĝero de ĝi plikreskos laŭgrade de l'disvolviĝo de l'unueca fronto. Jam estas tendencoj, esprimiĝantaj en la malaltigo de l' rolo de la komunista partio en la vicoj de l'unueca fronto kaj en la paciĝo kun la socialdemokrata ideologio. Necesas ne lasi el vido ke la taktiko de unueca fronto estas metodo de klarvidebla konvinkado de l'socialdemokrataj laboristoj pri la ĝusteco de l'komunista kaj malĝusteco de l'socialdemokrata politiko, sed ne paciĝo kunla socialdemokrataj ideologio kaj praktiko. La sukcesa batalo por la starigo de unueca fronto nepre postu-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

las konstantan batalon en niaj vicoj kontraŭ la tendenco al **malaltigo de l' rolo de la partio**, kontraŭ la **legalismaj iluzioj**, kontraŭ la sinorientado je **spontaneco kaj aŭtomatismo**, kiel en la afero de likvido de l'faŝismo, tiel ankaŭ en la realigo de l'unueca fronto, kontraŭ la **plej malgrandaj hezitoj en la momento de l' decida ago.**

„Necesas, — instruas nin kamarado Stalin, — ke la partio en sia laboro scipovu kunigi la superan prin cipecon (ne miksi kun sektismo!) kun la maksimumo da ligoj kaj kontakto kun la amasoj (ne miksi kun vostismo!), sen kio ne estas eble por la partio ne nur instrui la amasojn, sed ankaŭ lerni ĉe ili, ne nur konduki la amasojn kaj levi ilin al la nivelo de l'partio, sed ankaŭ aŭskultatenti la voĉon de l'amasoj kaj diveni iliajn doloriĝintajn bezonojn"[37].

## LA POLITIKA UNUECO DE L' LABORISTA KLASO.

Kamaradoj, la disvolvo de l'unueca fronto de kuna batalo de l' komunistaj kaj socialdemokrataj laboristoj kontraŭ la faŝismo kaj ofensivo de l'kapitalo elstarigos ankaŭ la demandon **pri politika unueco, pri unueca amasa politika partio de l' laboristo klaso.** La socialdemokrataj laboristoj ĉiam pli per la sperto konvinkiĝas, ke la batalo kontraŭ la klasa malamiko postulas unuecan politikan gvidadon, ĉar la **dueco de l' gvidado** malfaciligas la pluajn disvolvon kaj plifortigon de l'unueca batalo de la laborista klaso.

La interesoj de l'klasa batalo de l'proletaro kaj la sukceso de l'proletara revolucio diktas la neceson de l'enesto en ĉiu lando de **unueca partio de l'proletaro.** Atingi tion-ĉi estas, certe, ne tiom



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 100 von 188

facile kaj simple. Tio-ĉi postulas persistan laboron kaj batalon kaj estos laŭnecese pli-malpli longdaŭra procezo. La komunistaj partioj devas, sin apogante je la kreskanta emo de l'laboristoj al la unuigo de l'socialdemokrataj partioj aŭ apartaj organizoj kun la komunistaj partioj, preni firme kaj certoplene en siajn manojn la iniciativon en la afero de ĉi-tiu unuigo. La afero de l'unuigo de la fortoj de l'laborista klaso je unueca revolucia proleta partio, en la momento kiam la internacia laborista movado eniras en periodon de likvido de l'skismo, tio-ĉi estas nia afero, la afero de l'Komunista Internacio.

Sed se por la starigo de unueca fronto de l'komunistaj kaj socialdemokrataj partioj estas sufiĉa interkonsento en la batalo kontraŭ la faŝismo, la ofensivo de l'kapitalo kaj la milito, la kreo de politika unueco estas ebla nur sur la bazo de vico da certaj kondiĉoj de principa karaktero.

Tiu-ĉi unuigo estas ebla nur, unue, ĉe la kondiĉo de kompleta sendenpendeco je la burĝaro kaj kompleta rompo de l' bloko de la socialdemokratio kun la burĝaro;

due, ĉe la kondiĉo de antaŭa realigo de l'unueco de agoj;

trie, ĉe la kondiĉo de agnosko de l'neceseco de la revolucia renverso de l' dominado de l' burĝaro kaj starigo de diktaturo de l'proletaro en la formo de sovetoj;

kvare, ĉe la kondiĉo de rifuzo je subteno de sia burĝaro en imperialista milito;

kvine, ĉe la kondiĉo de l'konstruo de la partio sur la bazo de demokrateca centralismo, certiganta la unuecon de volo kaj ago kaj elprovita en la sperto de l' rusaj bolŝevikoj.

N devas klarigadi al la socialdemokrataj laboristoj pacience kaj kamaradece, kial sen tiuj-ĉi kondiĉoj



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 101 von 188

estas neebla la politika unueco de l'laborista klaso. Ni devas kune kun ili priparoli la sencon kaj signifon de tiuj-ĉi kondiĉoj.

Kial estas necesaj por la realigo de l'politika unueco de l'proletaro la kompleta sendependeco je la burĝaro kaj la rompo de l'bloko de l'socialdemokratio kun la burĝaro?

Tial, ke la tuta sperto de l'laborista movado kaj precipe la sperto de dekkvin jaroj de koalicia politiko en Germanio montris ke la politiko de klasa kunlaborado, la politiko de dependeco je la burĝaro kondukas al la malvenko de l' laborista klaso kaj al la venko de l' faŝismo. Kaj nur la vojo de nepaciĝema klasa batalo kontraŭ la burĝaro, la vojo de l' bolŝevikoj, estas la ĝusta vojo al la venko.

Kial premiso de l'politika unueco devas esti la antaŭa starigo de unueco de agoj?

Tial ke la unueco de agoj por la repuŝo de l'ofensivo de la kapitalo kaj faŝismo estas ebla kaj necesa ankoraŭ antaŭ tio, ke la plimulto de l'laboristoj unuiĝos sur komuna politika platformo de renverso de l'kapitalismo, kaj la ellaboro de unueco de opinioj pri la ĉefaj vojoj kaj celoj de batalo de l'proletaro, sen kio ne estas ebla la unuigo de l'partioj, postulas pli-malpli longdaŭran tempon. Kaj plej bone la uuueco de opinioj ellaboriĝas en la kuna batalo kontraŭ la klasa malamiko jam hodiaŭ. Proponi anstataŭ la unueca fronto tuj unuiĝi— signifas meti la ĉevalon malantaŭ la veturilo kaj opinii ke la veturilo iros antaŭen (Rido). Ĝuste tial ke por ni la demando de politika unueco ne estas manovro, kiel por multaj socialdemokrataj gvidantoj, ni insistas pri la realigo de l'unueco de agoj, kiel unu el plej gravaj etapoj en la batalo por la politika unueco.

Kial estas necesa la agnosko de l'revolucia ren-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 102 von 188

verso de l'burĝaro kaj starigo de diktaturo de l' proletaro en la formo de soveta reĝimo?

Tial ke la sperto de l'triumfo de la granda Oktobra revolucio, unuflanke, kaj aliflanke—la maldolĉaj lecionoj de Germanio, Aŭstrio kaj Hispanio dum la tuta postmilita periodo denove komfirmis, ke la venko de l'proletaro estas ebla nur per la revolucia renverso de l'burĝaro, kaj ke la burĝaro prefere dronigos la laboristan movadon en maro da sango, ol permesos al la proletaro per paca vojo starigi la socialismon. La sperto de l'Oktobra revolucio okulfrape montris, ke la ĉefa enhavo de l'proletara revolucio estas la demando pri la proletara diktaturo, kiu estas alvokita subpremi la kontraŭstaron de l'renversitaj ekspluatistoj, armi la revolucion por la batalo kontraŭ la imperialismo kaj alkonduki la revolucion al la kompleta venko de l'socialismo. Por realigi la diktaturon de l'proletaro kiel diktaturo de l'superanta plimulto super mizera malplimulto, super la ekspluatistoj,—kaj nur kiel tia ĝi povas esti realigita,—por tio-ĉi estas necesaj la sovetoj—ampleksantaj ĉiujn tavolojn de la laborista klaso, la ĉefajn amasojn de la kampularo kaj aliajn laborulojn, sen kies vekiĝo, sen kies enkonduko en la fronton de l'revolucia batalo, ne estas ebla la firmigo de l'venko de l'proletaro.

Kial kondiĉo de l'politika unueco estas la rifuzo je la subteno de l'burĝaro en imperialista milito?

Tial ke la burĝaro kondukas imperialistan militon por siaj rabulaj celoj—kontraŭ la interesoj de l'superanta plimulto de l'popoloj, sub kiu ajn vualo estas kondukata ĉi milito. Tial ke ĉiuj imperialistoj kunigas kun la febra preparado por milito ekstreman plifortiĝon de l'ekspluato kaj subpremo de la laboruloj interne de la lando. La subteno al la burĝaro



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 103 von 188

en tia milito signifas perfidon al la interesoj de la lando kaj al la internacia laborista klaso.

Kial, fine, kondiĉo de l'unueco estas la konstruo de l'partio sur la bazo de demokrateca centralismo?

Tial ke nur partio, konstruita sur la bazo de l'demokrateca centralismo povas certigi la uuuecon de volo kaj ago, povas venigi la proletaron al la venko super la burĝaro, disponanta tian potencan ilon kiel la centralizita ŝtata aparato. La apliko de l'principo de demokrateca centralismo eltenis brilan historian elprovon en la sperto de l'rusa bolŝevista partio, la partio de Lenin-Stalin.

Jes, kamaradoj, ni estas por unueca amasa politika partio de l'laborista klaso. Sed el ĉi-tie sekvas la neceso, kiel diris kamarado Stalin, je

> „partio batalema, partio revolucia, sufiĉe kuraĝa por konduki la proletojn al la batalo pro la regado, sufiĉe sperta por sin orienti en la komplikaj kondiĉoj de l'revolucia cirkonstancaro kaj sufiĉe elasta por ĉirkaŭpasi ĉiujn kaj ĉiajn subakvajn rokojn sur la vojo al la celo" [38].

Jen kial estas necese elbatali la politikan unuiĝon sur la bazo de l'menciitaj kondiĉoj.

Ni estas por la politika unueco de l'laborista klaso! Tial ni estas pretaj plej intimmaniere kunlabori kun ĉiuj socialdemokratoj, kiuj estas por la unueca fronto kaj sincere subtenas la unuiĝon sur la menciitaj principoj. Sed ĝuste tial ke ni estas por la unuiĝo, ni rezolute batalos kontraŭ ĉiuj „maldekstrumaj" demagogoj, kiuj provas utiligi la disreviĝon de l'socialdemokrataj laboristoj por la kreo de novaj socialistaj partioj aŭ internacioj, direktitaj kontraŭ la komunista movado kaj, tiamaniere, pliprofundigantaj la skismon de l'laborista klaso.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 104 von 188

Ni salutas la kreskantan aspiron meze de l'social-demokrataj laboristoj al la uuueca fronto kun la komunistoj. En tiu-ĉi fakto ni vidas la progresadon de ilia revolucia konscio kaj la komencon de supervenko je la skismo en la laborista klaso. Opiniante, ke la unueco de agoj estas urĝa neceso kaj la plej ĝusta vojo al la kreo ankaŭ de l'politika unueco' de l'proletaro, ni deklaras pri la preteco de l'Komunista Internacio kaj de ĝiaj sekcioj alpaŝi al intertraktoj kun la II Internacio kaj ĝiaj sekcioj pri la starigo de unueco de l'laborista klaso en la batalo kontraŭ la ofensivo de l'kapitalo, kontraŭ la faŝismo kaj la minaco de imperialista milito.

---

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

## KONKLUDO.

Kamaradoj!

Mi finas mian raporton. Kiel vi vidas, konsiderante la cirkonstancaron aliiĝintan depost la VI-a Kongreso, la lecionojn de nia batalo kaj apogante nin sur la jam atingitan gradon de konsolidiĝo de niaj partioj, ni starigas nun novmaniere plurajn demandojn kaj unuavice la demandon pri unueca fronto kaj pri rilato al la socialdemokratio, reformistaj sindikatoj kaj aliaj amasaj organizoj.

Estas saĝuloj, kiuj songas vidi en tuta ĉi-tiu deiro de niaj principaj pozicioj ian turniĝon dekstren de la linio de l'bolŝevismo. Kio do! Malsata kokino, oni diras ĉe ni en Bulgario, ĉiam songas milion (Rido, varmegaj aplaŭdoj).

Tiel pensu tiuj-ĉi politikaj kokinoj. (Rido, varmegaj aplaŭdoj).

Nin tio-ĉi malmulte interesas. Por ni estas pli grave, ke niaj propraj partioj kaj la vastaj amasoj de l'tuta mondo ĝuste komprenu, kion ni celas.

Ni ne estus revoluciaj marksistoj, leninistoj, indaj disĉiploj de Marx-Engels-Lenin-Stalin, se ni, depende de la aliiĝinta situacio kaj de l' demoviĝoj, okazantaj en la tutmonda laborista movado, ne rekonstruus konformmaniere nian politikon kaj nian taktikon.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 106 von 188

Ni ne estus veraj revoluciuloj, se ni ne lernus el la propra sperto kaj el la sperto de l'amasoj.

Ni volas, ke niaj partioj en la kapitalismaj landoj elpaŝu kaj agu kiel veraj politikaj partioj de l'laborista klaso, ke ili efektive ludu la rolon de politika faktoro en la vivo de ilia lando, ke ili ĉiam konduku aktivan bolŝevistan amasan politikon, sed ne limigu sin per nuraj propagando kaj kritiko kaj nudaj alvokoj al la batalo pro la proletara diktaturo.

Ni estas malamikoj de ĉia skemeco. Ni volas konsideri la konkretan cirkonstancaron en ĉiu momento kaj en ĉiu donita loko, sed ne agi laŭ certa ŝablono ĉie kaj ĉiam, ne forgesi, ke en malsamaj kondiĉoj la pozicio de l'komunistoj ne povas esti sama.

Ni volas sobre konsideri ĉiujn etapojn en la disvolvo de l'klasa batalo kaj en la progreso de l'klasa konscio de l'amasoj mem, scipovi trovi kaj solvi ĉe ĉiu etapo la konformajn al tiu etapo konkretajn taskojn de la revolucia movado.

Ni volas trovi komunan lingvon kun la plej vastaj amasoj en la celoj de batalo kontraŭ la klasa malamiko, trovi la vojojn por la definitiva supervenko de l'izoleco de la revolucia avangardo je la amasoj de l'proletaro kaj de ĉiuj laboruloj, kaj ankaŭ por la supervenko de l' fatala izoleco de la laborista klaso mem je ĝiaj naturaj aliancanoj en la batalo kontraŭ la burĝaro, kontraŭ la faŝismo.

Ni volas partoprenigi ĉiam pli vastajn amasojn en la revolucia klasa batalo kaj alkonduki ilin al la proletara revolucio, elirante el iliaj plej aktualaj interesoj kaj bezonoj kaj sur la bazo de ilia propra sperto.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

Ni volas laŭ la ekzemplo de niaj bravaj rusaj bolŝevikoj, laŭ la ekzemplo de l'avangarda partio de la Komunista Internacio, la komunista partio de Sovet-Unio, kunigi la revolucian heroismon de l' germanaj, hispanaj, aŭstraj kaj aliaj komunistoj kun vera revolucia realismo kaj fini kun la lastaj restoj de skolastika febrmoviĝo ĉirkaŭ seriozaj politikaj demandoj.

Ni volas ĉiuflanke armi nian partion por ia solvo de l'plej komplikaj politikaj taskoj, starantaj antaŭ ili. Por tio ĉi pli kaj pli alte levi ilian teorian nivelon, eduki ilin en la spirito de viva marksismo-lenismo, sed ne de morta doktrineco.

Ni volas elradiki el niaj vicoj la memkontentan sektismon, kiu unuavice baras al ni la vojon al la amasoj kaj malhelpas al la efektivigo de vera bolŝevista amasa politiko. Ni volas ĉiurimede plifortigi la batalon kontraŭ ĉiuj konkretaj elmontriĝoj de dekstruma oportunismo, konsiderante ke la danĝero el tiu-ĉi flanko alkreskos ĝuste en la praktiko de efektivigo de nia amasa politiko kaj batalo.

Ni volas, ke la komunistoj en ĉiu lando ĝustatempe ĉerpu kaj utiligu ĉiujn lecionojn el ilia propra sperto, kiel revolucia avangardo de l'proletaro. Ni volas, ke ili laŭeble plej radike ellernu naĝi en la fortfluaj akvoj de la klasa batalo, sed ne restu sur la bordo kiel observantoj kaj registrantoj de la alkurantaj ondoj en la atendo de bona vetero. (Aplaŭdoj).

Jen kion ni volas!

Kaj ni volas ĉi-ĉion tial, ke nur tiavoje la laborista klaso ĉe la kapo de ĉiuj laboruloj, kuniĝante je miliona revolucia armeo, gvidita de l'Komunista Internacio, kaj havante tian grandan sagacan ŝip-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 108 von 188

gvidiston, kiel nia gvidanto kamarado Stalin (varmegaj aplaŭdoj) povos celtrafe plenumi sian historian mision: forbalai de-sur la faco de la tero la faŝismon kaj kune kun ĝi la kapitalismon! (La tuta halo leviĝas kaj aranĝas al k-do Dimitrov varmegan ovacion. El ĉiuj flankoj en diversaj lingvoj eksonas la elvoĉoj de l'kongresanoj: „Hura, vivu kamarado Dimitrov!". Forttona kantado de l' „Internacio" en ĉiuj lingvoj de la mondo. Ekkrioj: „Vivu kamarado Stalin, vivu kamarado Dimitrov!". Ekkrio: „Al kamarado Dimitrov, la standardportanto de Komintern, bolŝevistan hura'on!". Ekkrio en bulgara lingvo: „Al kamarado Dimitrov, heroeca batalanto de l'Komunista Internacio kontraŭ la faŝismo, hura'on!". La delegitaroj kantas siajn revoluciajn kantojn: la itala — „Bandera rossa", la pola — „Na barikady", la franca — la „Carmagnole"-on, la germana — „Rote Wedding", la ĉina — „Marŝon de l'ĉina Ruĝa armeo").

---

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

# POR UNUECO DE L' LABORISTA KLASO KONTRAŬ FAŜISMO.

## KONKLUDA PAROLO DE K-DO GEORGI DIMITROV EN LA VII KONGRESO DE LA KOMUNISTA INTERNACIO LA 13-n DE AŬGUSTO 1935.

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 111 von 188

Kamaradoj! La detalaj debatoj pri mia raporto atestas pri la grandega intereso de l'kongreso al la ĉefaj taktikaj problemoj kaj taskoj de l'batalo de la laborista klaso kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj faŝismo, kontraŭ la minaco de imperialista milito.

Resumigante nun la diskuton, ni povas konstati, ke ĉiuj esencaj tezoj de la raporto renkontis la unuaniman aprobon de la kongreso. Neniu el la debatintoj kontraŭdiris la skizitajn de ni taktikajn principojn kaj la proponitan rezolucion.

Oni povas kuraĝe diri ke en neniu el la antaŭaj kongresoj de l' Komunista Internacio estis evidentiĝinta tia ide-politika solidareco, kiel nun. (Aplaŭdoj). La kompleta unuanimeco de l' kongreso atestas, ke en niaj vicoj plene maturiĝis la konscio de l'neceso rekonstrui niajn politikon kaj taktikon konforme al la aliiĝinta cirkonstancaro kaj sur la bazo de l'riĉega, edifa sperto de l'lastaj jaroj.

Tiun-ĉi unuanimecon, certe, oni povas konsideri kiel unu el la plej gravaj kondiĉoj de la sukcesplena solvo de l'ĉefa plej proksima tasko de l'internacia movado proletara: la starigo de unueco de agoj de ĉiuj partoj de l' laborista klaso en la batalo kontraŭ la faŝismo.

Por sukcesplene solvi tiun-ĉi taskon, ni bezonas, unue, ke la komunistoj scipovu uzi la ilon de l'marksist-leninista analizo, zorgeme studante la konkretan cirkonstancaron kaj dispozicion de l'klasaj fortoj en ilia evoluo kaj konforme al



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 112 von 188

tio·ĉi konstruu siajn planojn de agado kaj batalo. Ni devas elpeli plej senkompate la emon — kaptantan ofte niajn kamaradojn — al nenaturaj skemoj, senvivaj formuloj, al pretaj ŝablonoj. Ni devas fini kun tia stato de aj'oj, ke la komunistoj, kiam ĉe ili ne sufiĉas forto kaj kapablo por marksist-leninista analizo, substituas al tiu·ĉi analizo komunajn frazojn kaj komunajn lozungojn kiel ekzemple „revolucia eliro el la krizo", sen iu ajn serioza provo klarigi, ĉe la ĉeesto de kiaj kondiĉoj, ĉe kia kunrilato de klasaj fortoj, ĉe kia grado de revolucia matureco de l'proletaro kaj de l'laborulaj amasoj, ĉe kia nivelo de influo de l'kom.partio estas ebla la revolucia eliro el la krizo. Sen tio·ĉi ĉiuj similaj lozungoj estiĝas malplenajo, senenhava frazo, ombrokovranta nur niajn taskojn de l' hodiaŭa tago. Sen konkreta marksist-leninista analizo ni kapablos ĝuste starigi kaj solvi nek la demandon pri faŝismo, nek pri proletara kaj komunpopola fronto, nek pri rilato al la burĝa demokratio, nek pri tiuj procezoj, kiuj okazas interne de la laborista klaso kaj speciale inter la socialdemokrataj laboristoj, nek pri registaro de l'unueca fronto, nek multon da aliaj novaj kaj komplikaj demandoj, kiujn la vivo kaj la disvolvo de l'klasbatalo starigas kaj starigos antaŭ ni.

Due, al ni estas necesaj vivantaj homoj — homoj, elkreskintaj el la laborista amaso, el ĝia ĉiutageca batalo, homoj de batalema ago, sindoneme fidelaj al la afero de l'proletaro, per kies kapoj kaj manoj estos realigataj la decidoj de nia kongreso. Sen bolŝevistaj, lenin-stalinecaj kontingentoj ni ne solvos tiujn grandegajn taskojn, kiuj staras antaŭ la laboruloj en la afero de l'batalo kontraŭ la faŝismo.

Trie, al ni estas necesaj homoj, armitaj per la kompaso de l' marksist-leninista teorio, sen kies sperta uzado homoj devojiĝas al mallarĝeca



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

praktikismo, trovas solvojn nur de okaz' al okazo ellasas la larĝan perspektivon de l'batalo, montrantan al la amasoj, kien kaj pro kio ni iras kaj kien ni kondukas la laborulojn.

Kvare, al ni estas necesa o r g a n i z a d o d e l'a m a s o j por la efektivigo de niaj decidoj en la vivo. Nura nia ide-politika influo ne estas sufiĉa. Ni devas fini kun la sin-orientado al la s p o n t a n e c o d e l' m o v a d o, kiel unu el ĉefaj niaj malfortecoj. Ni devas memori, ke sen organiza laboro, persista, longdaŭra, pacienca, iufoje ŝajnanta sendanka, la amasoj ne alnaĝos la komunisman bordon. Por scipovi organizi la amasojn, ni devas ellerni la lenin-stalinecan arton fari niajn decidojn akiro ne nur de l'komunistoj, sed de l'plej vastaj amasoj de laboruloj. Necesas ellerni paroli kun la amasoj ne en la lingvo de l'libraj formuloj, sed en la lingvo de l'batalantoj pro la afero de l'amasoj, ĉe kiuj ĉiu vorto, ĉiu ideo respegulas la pensojn kaj humorojn de milionoj.

Ĉe tiuj-ĉi demandoj mi dezirus halti en mia konkluda parolo.

Kamaradoj! La kongreso renkontis la novajn taktikajn direktivojn kun grandaj entuziasmo kaj unuanimeco. Certe, la entuziasmo kaj unuanimeco estas belega ajo. Sed estas ankoraŭ pli bone, kiam ili estas kunigataj kun profunde pripensita, kritika traktmaniero al la taskoj, starantaj antaŭ ni, kun ĝusta asimilo de l'decidoj akceptitaj kaj kun efektiva komprenо de l'rimedoj kaj metodoj de apliko de tiuj-ĉi decidoj en la konkreta cirkonstancaro de ĉiu lando.

Ni ja ankaŭ antaŭe treege unuanime akceptadis ne malbonajn decidojn. Sed la malfeliĉo estis en tio, ke oni akceptis ilin oftokaze formale kaj faris tiujn decidojn, en la plej bona okazo, akiraj'o de malgranda avangardo de l'laborista klaso. Niaj decidoj ne



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 114 von 188

estiĝis karno kaj sango de l' vastaj amasoj, ili ne transformiĝis je la direktivo por ago de milionoj.

Ĉu ni povas aserti ke ni jam definitive liberiĝis de tia formala rilato al la akceptitaj rezolucioj? Ne. Necesas diri, ke ankaŭ en tiu-ĉi kongreso en la elpaŝoj de kelkaj kamaradoj montriĝis restoj de formalismo, estas sentata iufoje la emo substitui al la konkreta analizo de l'realo kaj al la viva sperto ian novan skemon, ian novan, simplisman, senvivan formulon, prezenti kiel r e a l o tion, kio al ni estas d e z i r i n d a, sed kiu ankoraŭ n e ekzistas en efektivo.

## LA BATALO KONTRAŬ LA FAŜISMO DEVAS ESTI KONKRETA.

Nenluj komunaj karakterizoj de l'faŝismo, kiom ajn ĝustaj ili estu en si mem, ne liberigas nin de l'neceso studi kaj konsideri la specifon de disvolvo de l'faŝismo kaj de l'diversaj formoj de la faŝista diktaturo en apartaj landoj kaj ĉe diversaj etapoj. Estas necese en ĉiu lando esplori, studi, elserĉi la naci-specialan, la naci-specifan en la faŝismo kaj konforme al tio fiksi efektivajn metodojn kaj formojn de batalo kontraŭ la faŝismo.

Lenin insiste avertis nin kontraŭ la „ŝablonigo, mekanika egaligo, samigo de l'taktikaj reguloj, reguloj de batalo". Tiu-ĉi direktivo estas precipe ĝusta kiam temas pri la batalo kontraŭ tia malamiko, kiu tiom rafinite, tiom jezuite ekspluatas la naciajn sentojn kaj antaŭjuĝojn de l' amasoj kaj iliajn antikapitalismajn humorojn en la interesoj de l'grandkapitalo. T i a n m a l a m i k o n o n i d e v a s k o n i p r e c i z e k a j ĉ i u f l a n k e. Estas necese sen iu ajn prokrasto atentokapti ĝiajn diversajn manovrojn, malkovri ĝiajn kaŝajn pasejojn, esti preta doni al ĝi rebaton sur iu ajn areno kaj en ĉiuj momento. Oni ne devas eĉ



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 115 von 188

ĝeni lerni ĉe la malamiko, se tio-ĉi helpos pli rapide kaj certe t o r d i a l ĝ i l a k o l o n. (Aplaŭdoj).

Estus kruda eraro fiksi ian komunan skemon de disvolvo de l' faŝismo por ĉiuj landoj kaj ĉiuj popoloj. Tia skemo ne helpos, sed malhelpos al ni konduki veran batalon. Ĝi, krom ĉio cetera, sekvigas tion ke estas depuŝataj sen ekzameno en la tendaron de l'faŝismo tiuj tavoloj de l'loĝantaro, kiuj, ĉe ĝusta rilato al ili, povus esti en certa stadio de l'evoluo, ekmovigitaj al la batalo kontraŭ la faŝismo aŭ almenaŭ neŭtraligitaj.

Ni prenu, ekzemple, la disvolvon de l'faŝismo en Francio kaj en Germanio. Iuj kamaradoj opinias, ke en Francio la fasismo ĝenerale ne povas disvolviĝi tiom facile, kiel en Germanio. Kio ĉi-tie estas ĝusta kaj kio neĝusta? Ĝusta tio, ke en Germanio ne estis tiaj profundaj demokratiaj tradicioj, kiel en Francio, kiu trafaris en la 18-a kaj 19-a jarcentoj kelkajn revoluciojn. Ĝusta, ke Francio estas lando, gajninta la militon kaj altrudinta la versajlan sistemon al aliaj landoj, ke en Francio en la amasoj ne estas tiu premiteco de l'nacia sento, kiu ludis tiom grandan rolon en Germanio. Ĝusta, ke la ĉefaj amasoj de l'kampularo en Francio estas inspiritaj respublikanece, antifaŝisme, precipe en la sudaj regionoj, diference de Germanio, kie jam antaŭ la alveno de l'faŝismo al la regado konsiderinda parto de l' kampularo estis sub la influo de l'reakciaj partioj.

Sed, kamaradoj, malgraŭ la diferencoj en la disvolvo de l'faŝista movado en Francio kaj en Germanio, malgraŭ la momentoj, kiuj malplifaciligas la antaŭenmarŝon de l'faŝismo en Francio, estus miopeco ne vidi tie la senĉesan kreskon de l'fasisma danĝero kaj subtaksi la eblecon de faŝista ŝtatrenverso. En Francio estas tuta vico da momentoj, kiuj, aliflanke, favoras al la disvolvo de l'faŝismo. Ne forgesu, ke la ekonomia



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 116 von 188

krizo, komenciĝinta en Francio pli malfrue ol en aliaj kapitalismaj landoj, daŭrigas pliprofundiĝi kaj pliakriĝi, kaj tio-ĉi precipe plifaciligas la furiozadon de l'faŝisma demagogio. La franca faŝismo havas tiajn fortajn poziciojn en la armeo, en la oficiraro, kiajn la naci-socialistoj antaŭ ilia alveno al la regado ne havis en la Reichswehr. Plue, en neniu, evidente, lando la korupteco de l'parlamenta reĝimo atingis tiajn monstrajn grandecojn kaj elvokis tian indignon de la amasoj, kiel Francio. Ne forgesu ankaŭ, ke al la disvolvo de l'faŝismo kontribuas la akra timo de l'franca burĝaro perdi sian politikan kaj militan hegemonion en Eŭropo.

El ĉi-tio sekvas, ke la sukcesojn atingitajn de la antifaŝista movado en Franco, pri kiuj parolis ĉi-tie kamaradoj Thorez kaj Cachin kaj pri kiuj ni tutkore ĝojas, oni tute ne povas ankoraŭ konsideri kiel fakto, kiu montras, ke la laborulaj amasoj prosperis definitive bari la vojon al la faŝismo. Nesesas ankoraŭ fojon kun la tuta insisteco substreki la tutan gravecon de la taskoj de l'franca laborista klaso en la batalo kontraŭ la faŝismo, kiujn mi indikis jam en mia raporto.

Estas danĝere ankoraŭ fari al si iluziojn pri la malforteco de l'faŝismo en aliaj landoj, kie ĝi ne disponas larĝan amasan bazon. Ni havas la ekzemplojn de tiaj landoj, kiel Bulgario, Jugoslavio, Finnlando, kie la faŝismo, ne havante larĝan bazon, tamen venis al la regado, sin apogante je la armitaj fortoj de la ŝtato, kaj poste provis plilarĝigi sian bazon per la utiligo de l'ŝtata aparato.

Prava estis kamarado Datt, kiam li asertis ke en niaj vicoj estis tendenco trakti la faŝismon en komuna ordo ne konsiderante la konkretajn specifojn de l'faŝistaj movadoj en apartaj landoj kaj kvalifikante erare kiel faŝismo ĉiujn reakciajn entrepre-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

nojn de l'burĝaro aŭ kiel faŝista eĉ la tutan nekomunistan tendaron. Rezulte de tio-ĉi estis ne plifortigata, sed male, malplifortigata la batalo kontraŭ la faŝismo.

Sed ankoraŭ nun estas restoj de skemeca traktmaniero rilate la faŝismon. Cu ne elmontriĝo de tia skemeca traktmaniero estas la aserto de apartaj kamaradoj, ke la „nova ordo" de Roosevelt prezentas per si ankoraŭ pli klaran akran formon, de l'evoluo de la burĝaro en la direkton de l'faŝismo ol, ekzemple, la „nacia registaro" de Britio? Estas necesa konsiderinda porcio da skematismo por ne vidi, ke la plej reakciaj sferoj de l'usona financa kapitalo, atakantaj Roosevelt'on, ĝuste prezentas per si antaŭ ĉio tiun forton, kiu stimulas kaj organizas la faŝistan movadon en Usono. Ne vidi la naskiĝantan en Usono veran faŝismon malantaŭ la hipokritaj frazoj de tiaj sferoj pri la „defendo de l'demokratiaj rajtoj de l'usonaj civitanoj" — tio-ĉi signifas disorganizi la laboristan klason en la batalo kontraŭ ties plej kruda malamiko.

En la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj ne povas temi pri tiaspeca faŝismo, kian ni kutimas vidi en Germanio, Italio kaj aliaj kapitalismaj landoj. Ĉi-tie necesas elstudi kaj konsideri tute apartajn ekonomiajn, politikajn kaj historiajn kondiĉojn, konforme al kiuj la faŝismo akceptas kaj akceptos siaspecajn formojn.

Ne scipovante konkrete trakti la aperajojn de l'vivanta realo, iuj kamaradoj, suferantaj je maldiligenteco de l'penso, anstataŭas la peneman kaj konkretan studadon de l'r e a l a j cirkonstancaro kaj kunrilato de klasaj fortoj per komunaj, nenion dirantaj f o r m u l o j. Ili almemorigas ne s n i p e r o j n[39], kiuj precize trafas la celon, sed tiajn „artlertajn" pafistojn, kiuj sistemece kaj senmanke batas p r e t e r



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 118 von 188

la celon, trafante jen pli alten, jen pli malalten, jen tro malproksimen, jen tro proksimen. Kaj ni deziras, kamaradoj, kiel komunistaj agantoj de l'laborista klaso, kiel revolucia avangardo de l'laborista klaso, esti tiaj sniperoj, kiuj senmanke efektive trafas la celon. (Longdaŭraj aplaŭdoj).

## UNUECA PROLETARA FRONTO — ANTIFAŜISTA POPOLA FRONTO.

Iuj kamaradoj vane rompas al si la kapon super la demando, de kio komenci: de l'unueca fronto de l'proletaro aŭ de l'antifaŝista popola fronto?

Unuj diras: alpaŝi al la starigo de antifaŝista popola fronto oni povas ne pli frue ol estos organizita firma unueca fronto de l'proletaro.

Sed ĉar la starigo de l'unueca proletara fronto kunpuŝiĝas je la kontraŭstaro de l'socialdemokratio en pluraj landoj, estas preferinde komenci rekte de l'popola fronto kaj nur sur ĉi-bazo poste disvolvi la unuecan fronton de l'laborista klaso, — rezonas aliaj.

Kaj tiuj kaj aliuj, evidente, ne komprenas, ke la unueca fronto de l'proletaro kaj la antifaŝista popola fronto per la viva dialektiko de l'batalo estas ligitaj, interplektiĝas, transiras en la procedo de l' praktika batalo kontraŭ la faŝismo unu en la alian kaj tute ne estas apartigitaj unu de l'alia per ĉina muro.

Ja oni ne povas serioze opinii, ke estas ebla la vera realigo de antifaŝista popola fronto sen la starigo de l'unueco de la laborista klaso mem, kiu estas la kondukanta forto de tiu-ĉi popola fronto. Samtempe la plua disvolvo de l'unueca proleta fronto



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 119 von 188

dependas en konsiderinda grado de ĝia transformiĝo je popola fronto kontraŭ la faŝismo.

Imagu al vi, kamaradoj, tian skememulon, kiu staras antaŭ nia rezolucio kaj kun la pasieco de vera skolastikulo, konstrukcias sian skemon:

komence la unueca fronto de l'proletaro malsupre sur loka skalo;

poste la unueca fronto malsupre sur regiona skalo;

post tio la unueca fronto supre, trapasanta la samajn gradojn;

plue — la unueco de l'sindikata movado;

post ĝi — la aligo de l'aliaj antifaŝistaj partioj;

post tio-ĉi la disvolvitan popolan fronton de supre kaj malsupre;

tuj post ĝi la movadon oni devas levi sur pli altan ŝtupon, politikigi ĝin, revoluciigi kaj tiel plu, kaj simile. (Rido).

Vi diras, kamaradoj, ke tio-ĉi estas plej pura sensencajo. Mi konsentas kun vi. Sed ĝuste en tio estas la malfeliĉo, ke simila sektaneca sensencajo en tia aŭ alia formo tre ofte trovas ankoraŭ, bedaŭrinde, lokon en niaj vicoj.

Kaj kiel statas la afero en realo? Certe, ni ĉie devas ellukti larĝan tutpopolan fronton de batalo kontraŭ la faŝismo. Sed en tuta vico da landoj ni ne iros pli malproksimen ol ĝis komunaj paroladoj pri popola fronto, se ni ne scipovos per la mobilizo de l' laboristaj amasoj rompi la kontraŭstaron de l' social-demokratio al la unueca fronto de batalo de l' proletaro. Tiel statas la demando antaŭ ĉio en Britio, kie la laborista klaso faras la plimulton de l' loĝantaro, kie la britiaj trade-union'oj kaj la labora partio kondukas post si la ĉefan amason de l' laborista klaso. Tiel statas la demando en Belgio, en la skandinavaj landoj, kie membrokvante-malgrandajn komunistajn partiojn kontraŭstaras fortaj amasaj



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 120 von 188

sindikatoj kaj membrare-grandaj social-demokrataj partioj.

La komunistoj farus ĉi-tie grandegan politikan eraron, se ili sin kaŝus de la batalo por la starigo de unueca proletara fronto malantaŭ komunaj paroladoj pri popola fronto, kiu ne povas esti starigita sen la partopreno de l' amasaj organizoj de l' laborista klaso. Por atingi en tiuj-ĉi landoj veran popolan fronton, la komunistoj devas plenumi grandegan politikan kaj organizan laboron en la laboristaj amasoj. Ili devas venki la antaujuĝojn de tiuj-ĉi amasoj, konsiderantaj siajn amasajn reformistajn organizojn jam kiel la enkorpiĝo de l' proletara unueco, konvinki tiujn-ĉi amasojn ke la starigo de unueca fronto kun la komunistoj signifas la transiron de tiuj-ĉi amasoj sur la poziciojn de l' klasa batalo, ke nur tia transiro garantias la sukcesplenecon de l' batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj la faŝismo. Ni superos tiujn-ĉi malfacilojn ne per tio, ke ni metos antaŭ si pli larĝajn taskojn. Male, batalante por la forigo de l'malfaciloj, ni preparas ne en vortoj, sed en realo la kreon de vera tutpopola fronto de batalo kontraŭ la faŝisma, kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, kontraŭ la minaco de imperalista milito.

Aliel statas la demando en tiaj landoj kiel Polio, kie apud la laborista movado disvolviĝas forta kamparana movado, kie la kamparanaj amasoj havas siajn organizojn, radikaliĝantaj sub la influo de l' agrara krizo, kie la nacia subpremo elvokas indignon inter la naciaj minoritoj. Ĉi-tie la disvolvo de l' tutpopola fronto de batalo marŝos paralele kun la disvolvo de l' unueca proletara fronto, kaj iam en tiatipaj landoj la movado de l'tutpopola fronto povas eĉ devanci la movadon de l' laborista fronto.

Prenu tian landon, kiel Hispanio, kiu troviĝas en procezo de burĝdemokrata revolucio. Ĉu oni povas



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

ĉi-tie diri, ke la organizo de l' dissplitigita proletaro postulas la starigon de kompleta unueco de batalo de l' laborista klaso antaŭe oi krei laborist-kamparanan fronton kontraŭ Leroux kaj Gil Robles? Per tia starigo de l' demando ni izoligus la proletaron de l' kampularo, fakte demetus la lozungon de agrara revolucio, plifaciligus al la malamikoj de l' popolo la eblecon disigi la proletaron kaj la kampularon kaj kontraŭstarigi la kampularon al la laborista klaso. Kaj tio-ĉi, kiel oni scias, estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de l' malvenko de la laborista klaso dum la oktobraj eventoj de 1934.

Tamen oni ne povas forgesi jenon: en ĉiuj landoj, kie la proletaro estas relative malmultnombra, kie superas la kampularo kaj la etburĝaj tavoloj de l' urbo, en tiuj-ĉi landoj estas des pli necese streĉi ĉiujn fortojn por la starigo de firma unueca fronto de l' laborista klaso mem, por ke ĝi povu okupi sian lokon kiel gvidanta faktoro rilate al ĉiuj laboruloj.

Do, kamaradoj, ĉe la solvo de l' demando pri proletara fronto kaj fronto popola oni ne povas doni ĉionelĉerpajn receptojn por ĉiuj okazoj de la vivo por ĉiuj landoj kaj por ĉiuj popoloj. La universalismo en tia afero, la apliko de la samaj receptoj por ĉiuj landoj estas egalvalida, permesu diri, al malklereco. Kaj la malklerecon oni devas bati eĉ tiam, kaj precipe tiam, kiam ĝi elpaŝas en la tego de universalaj skemoj. (Aplaŭdoj).

## PRI LA ROLO DE L' SOCIAL-DEMOKRATIO KAJ ĜIA RILATO AL LA UNUECA FRONTO DE L' PROLETARO

Kamaradoj! El la vidpunkto de niaj taktikaj taskoj gravan signifon havas la ĝusta respondo al la demando pri tio, ĉu estas ankoraŭ kaj kie estas



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 122 von 188

la socialdemokratio la ĉefa apogilo de l' burĝaro nunmomente.

Kelkaj el la kamaradoj elpaŝintaj en la debatoj (k-doj Florin, Datt) tuŝis tiun-ĉi demandon, sed pro ĝia graveco necesas doni al ĝi pli kompletan respondon. Ĝi estas demando, kiun metas kaj ne povas ne meti precipe la socialdemokrataj laboristoj.

Necesas konsideri, ke en tuta vico da landoj aliiĝis aŭ aliiĝas la pozicio de l' socialdemokratio en la burĝa ŝtato kaj en certa grado ankaŭ en ĝia rilato al la burĝaro.

Unue, la krizo radikale disŝanceligis la situacion de l' plej bonstataj tavoloj de la laborista klaso, de la tiel nomata laborista aristokratio, je kiu, kiel oni scias, precipe sin apogas la socialdemokratio. Kaj tiuj-ĉi tavoloj pli kaj pli komencas revizii siajn antaŭajn opiniojn pri la celkonformeco de l' politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro.

Due, en vico da landoj, kiel mi jam menciis en la raporto, la burĝaro mem estas devigita rezigni je la burĝa demokratio kaj sin turni al terorisma formo de sia diktaturo, senigante la socialdemokration ne nur je ĝia antaŭa pozicio en la ŝtata sistemo de l' financa kapitalo, sed en certaj kondiĉoj ankaŭ je ĝia legaleco, submetante ĝin al persekutoj kaj eĉ al disrompo.

Trie, sub la influo de l' lecionoj de la malvenko de laboristoj en Germanio, Aŭstrio kaj Hispanio, malvenko, kiu estas precipe la rezulto de l' socialdemokrata politiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro, kaj aliflanke, sub la influo de l' triumfo de socialismo en Sovet-Union, rezulte de la bolŝevista politiko kaj aplikado de viva revolucia marksismo — la socialdemokrataj laboristoj revoluciiĝas, komenciĝas ilia ekturniĝo al la klasa batalo kontraŭ la burĝaro.

La komplekso de tiuj-ĉi kaŭzoj faras pli malfaci-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 123 von 188

ligita, kaj en kelkaj landoj ec rekte malebla por la socialdemokratio la pluan konservadon de ĝia antaŭa rolo de apogilo de l' burĝaro.

La nekompreno de ĉi-tio estas precipe malutila en tiuj landoj, kie la fasista diktaturo senigis la socialdemokration de ĝia legaleco. El tiu-ĉi vidpunkto ĝusta estis la sinkritiko de tiuj germanaj kamaradoj, kiuj en iliaj paroladoj notis la neceson ĉesi sin kroĉi je la litero de malnoviĝintaj formuloj kaj decidoj, koncernantaj la socialdemokration, ĉesi ignori la ŝanĝojn en ĝia situacio. Estas klare, ke tia ignorado, kondukas al la kripligo de nia linio de starigo de unueco de l' laborista klaso kaj plifaciligas al la reakciaj gvidantoj de l' socialdemokratio ilian sabotadon de l'unueca fronto.

Sed la procezo de revoluciiĝo interne de l'socialdemokrataj partioj disvolviĝas neegalmezure. Oni ne povas prezenti al si la aferon tiel, ke la revoluciiĝantaj laboristoj tuj transiros amase sur la poziciojn de konsekvencema klasa batalo kaj sen iuj ajn interspacaj etapoj rekte unuiĝos kun la komunistoj. Tio-ĉi estos en pluraj landoj pli-malpli malfacila, pli-malpli komplika kaj longdaŭra procezo, en ĉiu okazo esencmaniere dependanta de niaj ĝustaj politiko kaj taktiko. Ni devas konsideri ankaŭ la eblecon de tio, ke iuj socialdemokrataj partioj kaj organizoj, transirante de l' pozicio de klasa kunlaborado kun la burĝaro al la pozicio de klasa batalo, plue ekzistos ankoraŭ certan tempon kiel memstaraj organizoj kaj partioj. Kaj, certe, en tia okazo ne povas eĉ temi pri tio, ke tiaj socialdemokrataj partioj aŭ organizoj estu rigardataj kiel apogilo de l'burĝaro.

Oni ne povas esperi, ke tiuj socialdemokrataj laboristoj, kiuj troviĝas sub la influo de kutima, dum jardekoj inokulita al ili, ideologio de klasa kunlabo-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 124 von 188

rado kun la burĝaro, adiaŭos simple mem tiun-ĉi ideologion sub la efiko de nuraj objektivaj kaŭzoj. Ne. Estas nia, de l' komunistoj, tasko helpi al ili liberiĝi je la potenco de l' reformisma ideologio. La klarigado de l'principoj kaj programoj de l'komunismo devas esti farata kamaradece pacience kaj konforme al la nivelo de disvolviĝo de apartaj socialdemokrataj laboristoj. Nia kritiko de l' socialdemokratismo devas estiĝi pli konkreta kaj sistemeca. Ĝi devas sin bazi sur la sperto de socialdemokrataj amasoj mem. Antaŭ ĉio sur la bazo de l'sperto de komuna batalo brak-ĉe-brako kun la komunistoj estas eble kaj necese plifaciligi kaj plirapidigi al la socialdemokrataj laboristoj ilian revolucian disvolviĝon. Ne estas pli efika rimedo por la elviviĝo ĉe la socialdemokrataj laboristoj de iliaj hezitoj kaj duboj, ol la partopreno en la proletara unueca fronto.

Ni faros ĉion de ni dependan por plifaciligi ne nur al la socialdemokrataj laboristoj, sed ankaŭ al tiuj aktivuloj de la socialdemokrataj partioj kaj organizoj, kiuj sincere deziras transiri al revolucia klasa pozicio, komunan laboron kun ni kaj batalon kontraŭ la klasa malamiko. Sed samtempe ni deklaras: tiuj socialistaj aktivuloj, elvicaj funkciuloj kaj laboristaj, kiuj daŭrigas subteni la skismigan rolon de l'reakciaj gvidantoj de la socialdemokratio kaj elpaŝi kontraŭ la unueca fronto, kiuj tiamaniere rekte aŭ malrekte helpas al la klasa malamiko, per tio mem prenas sur sin antaŭ la laborista klaso respondecon ne malpli grandan, ol la historia respondeco de tiuj, kiuj subtenis la socialdemokratan politikon de klasa kunlaborado, politikon, kiu en pluraj eŭropaj landoj pereigis la revolucion de 1918 kaj purigis la vojon al la faŝismo.

La demando pri la rilato al la unueca fronto estas



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 125 von 188

la interdekliva linio inter la reakcia parto de l' socialdemokratio kaj ĝiaj revoluciiĝantaj tavoloj. Nia helpo al la revoluciiĝanta parto estos des pli efika, ju pli intensa estos nia batalo kontraŭ la reakcia tendaro de l' socialdemokratio, troviĝanta en bloko kun la burĝaro. Kaj interne de l' maldekstruma tendaro la memdifino de apartaj ĝiaj elementoj marŝos des pli rapide, ju pli rezolute la komunistoj batalos por la unueca fronto kun la socialdemokrataj partioj. La praktiko de l' klasa batalo kaj la partopreno de l' socialdemokratoj en la movado de l' unueca fronto montros, kiu en tiu-ĉi tendaro restas „maldekstruma" en la paroloj kaj kiu estas efektive maldekstruma.

## PRI REGISTARO DE L' UNUECA FRONTO

Se la rilato de l' socialdemokratio al la praktika realigo de l' unueca fronto de l' proletaro estas ĝenerale la ĉefa indikilo de tio, ĉu aliĝis kaj en kiu mezuro la antaŭa rolo de l'socialdemokrata partio kaj de apartaj ĝiaj partoj en la burĝa ŝtato, do precipe forta indikilo de tio-ĉi estos la *rilato de l' socialdemokratio al la demando pri registaro de l' unueca fronto*.

En tia situacio, kiam la demando pri la kreo de registaro de l' unueca fronto ekstaros en la tagordo kiel senpera praktika tasko, tiu-ĉi demando fariĝos la decida prova ŝtono por la politiko de l'socialdemokratio de la konsiderata lando: aŭ kune kun la faŝistiĝanta burĝaro kontraŭ la laborista klaso aŭ kune kun la revolucia proletaro kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio ne en paroloj, sed en realo. Tiel estos metita la neevitebla demando, kiel en la momento de l'kreo, tiel dum la esto ĉe la regado de l'registaro de la unueca fronto.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 126 von 188

Pri la karaktero kaj la kondiĉoj de kreo de registaro de l' unueca fronto aŭ de l'antifaŝista popola fronto, al mi ŝajnas, kamaradoj, en la raporto estas jam dirita tio, kio estas necesa por taktika sin-orientado. Deziri, ke ni krom tio fiksu ĉiujn eblajn formojn kaj ĉiujn kondiĉojn por la kreo de tia registaro—tio-ĉi signifas flankeniĝi al senfruktaj divenprovoj.

Mi dezirus averti kontraŭ ĉiaj simplismo kaj skemismo en tiu-ĉi demando. La vivo estas pli komplika ol ĉiaj skemoj. Estas neĝuste, ekzemple, priprentri la aferon tiel ke la registaro de l' unueca fronto estas n e p r a e t a p o sur la vojo al la starigo de l' proletara diktaturo. Tio-ĉi estas same malĝuste, kiel malĝuste estis antaŭe prezenti la aferon tiel, ke en la faŝismaj landoj estos n e n i u j i n t e r s p a c a j e t a p o j kaj la faŝista diktaturo estos nepre senpere anstataŭita de proletaro diktaturo.

La esenco de l' demando reduktiĝas al tio, ĉu estos la proletaro mem preta en la decida momento al la senpera renverso de l' burĝaro kaj al la starigo de sia regado kaj ĉu ĝi povos certigi al si en tiu ĉi okazo la subtenon de siaj aliancanoj. Aŭ la movado de l' unueca fronto kaj antifaŝista popola fronto estos ĉe la konsiderata etapo nur kapabla subpremi aŭ renversi la faŝismon. En la lasta okazo rezigni je la kreo kaj subteno de l' registaro de l' unueca aŭ popola fronto pro tio ke la movado ne povus iri pli malproksimen, estus neallasebla politika miopeco, sed ne serioza revolucia politiko.

Estas ne malfacile ankaŭ kompreni, ke la kreo de registaro de l' unueca fronto en la landoj, kie la faŝismo ne estas ankoraŭ ĉe la regado, tio-ĉi estas io a l i a, ol en la landoj de faŝisma diktaturo. En la lastaj landoj ĝi estas ebla n u r e n l a p r o c e d o d e r e n v e r s o d e l' f a ŝ i s m a r e g a d o. En la

landoj, kie disvolviĝas burĝdemokratia revolucio, la registaro de l' unueca fronto povus estiĝi registaro de l' demokratia diktaturo de l' laborista klaso kaj de l' kampularo.

Kiel mi jam menciis en la raporto, la komunistoj ĉiurimede subtenos la registaron de l' unueca fronto, je kiom ĝi efektive batalos kontraŭ la malamikoj de l' popolo, prezentos liberon de agado al la komunista partio kaj al la laborista klaso. Kaj la demando pri la partopreno de l' komunistoj en la registaro dependas ekskluzive de l' konkreta cirkonstancaro. La demandoj de tia speco estos solvatoj en ĉiu aparta okazo. Neniajn novajn receptojn oni povas doni ĉi-tie anticipe.

## PRI LA RILATO AL LA BURĜA DEMOKRATIO

En sia parolado k-do Lenski menciis, ke en la pola partio, mobilizanta la amasojn kontraŭ la atako de l'faŝismo al la rajtoj de l' laboruloj, „tamen ekzistis timo je pozitiva formuligo de demokratiaj revendikoj por ne krei demokratiajn iluziojn inter la amasoj". Tia timo je pozitiva formuligo de demokratiaj revendikoj ekzistas en tia aŭ alia formo ne nur en la sola pola partio.

El kie devenas tiu-ĉi timo, kamaradoj? El malĝusta, antidialektika meto de l' demando pri la rilato al la burĝa demokratio. Ni, komunistoj, estas neŝanceligeblaj adeptoj de l' demokratio soveta, kies grandecan sperton donis la proletara diktaturo en Sovet-Unio, kie en la sama momento, kiam en la kapitalismaj landoj estas likvidataj la lastaj restoj de l' burĝa demokratio, — decido de l' VII-a Kongreso de Sovetoj proklamas la enkondukon de egalaj, direktaj kaj sekretaj elektoj. Tiu-ĉi socialista demokratio supozas la venkon de l' proletara revolucio,

la transformon de l' privata propreco pri la produktiloj je socia, la transiron de l' superanta plimulto de la popolo sur la vojon de l' socialismo. Tiu-ĉi demokratio ne prezentas el si finfarintan formon, ĝi disvolviĝas kaj disvolviĝos laŭmezure de l' pluaj sukcesoj de l' socialisma konstruado, kreado de senklasa socio kaj supervenko je la postvivaj'oj de l' kapitalismo en la ekonomio kaj la konscio de l'homoj.

Sed hodiaŭ milionoj da laboruloj, kiuj vivas en la kondiĉoj de kapitalismo, devas difini sian rilaton al tiuj formoj, en kiuj kovriĝas en diversaj landoj la dominado de l' burĝaro. Ni ne estas anarkistoj kaj al ni tute ne estas indiferente, kia politika reĝimo ekzistas en la lando konsiderata: burĝa diktaturo en la formo de burĝa demokratio, eĉ kun la plej reduktitaj rajtoj kaj liberoj, aŭ burĝa diktaturo en ties malkaŝa, faŝisma formo. Estante adeptoj de l' soveta demokratio, ni defendos ĉiun spanon da demokratiaj akiroj, kiujn la laborista klaso elŝiris dum jaroj da obstina batalo, kaj rezolute luktos por ilia plivastigo.

Kiom da oferoj alportis la laborista klaso de Britio ĝis ĝi elbatalis la rajtojn pri strikoj, pri legala ekzistado de siaj trade-union'oj, la liberon de kunvenoj, preso, la plivastigon de l' elektorajtoj kaj ceteran! Kiom da mildekoj da laboristoj fordonis sian vivon en la revoluciaj bataloj en Francio en la 19-a jarcento por elbatali la elementajn rajtojn kaj la legalajn eblecojn organizi siajn fortojn por la batalo kontraŭ la ekspluatistoj! La proletaro de ĉiuj landoj elverŝis multe da sango por la konkero de l' burĝdemokratiaj liberoj kaj estas kompreneble, ke ĝi per ĉiuj fortoj batalos por ilin konservi.

Nia rilato al la burĝa demokratio ne estas en ĉiuj kondiĉoj la sama. Ekzemple, dum la Oktobra revolucio la rusaj bolŝevikoj kondukis batalon ne je la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 129 von 188

vivo, sed je la morto, kontraŭ ĉiuj politikaj partioj, kiuj elpaŝis kontraŭ la starigo de l' proletara diktaturo sub la flago de defendo de l' burĝa demokratio. La bolŝevikoj batalis tiam kontraŭ tiuj-ĉi partioj ĉar la standardo de burĝa demokratio tiam fariĝis standardo de mobilizo de ĉiuj kontraŭ-revoluciaj fortoj por la batalo kontraŭ la venko de l' proletaro. Alia situacio estas nun en la kapitalismaj landoj. Nun la faŝista kontraŭrevolucio atakas la burĝan demokration, aspirante starigi super la laboruloj reĝimon de plej barbara ekspluatado kaj subpremo. Nun la laborulaj amasoj en pluraj kapitalismaj landoj estas devigitaj elekti konkrete por hodiaŭ ne inter la proletara diktaturo kaj la burĝa demokratio, sed inter la burĝa demokratio kaj la faŝismo.

Due, nun estas alia situacio ol estis, ekzemple, en la epoko de stabiliĝo de l' kapitalismo. Tiam ne estis tiom aktuala la faŝisma danĝero kiel nuntempe. Tiam la revoluciaj laboristoj havis en vico da landoj antaŭ si la burĝan diktaturon en formo de burĝa demokratio, kontraŭ kiu ili koncentrigis la ĉefan fajron. En Germanio ili batalis kontraŭ la Weimar'a respubliko ne tial ke tio estis respubliko, sed ĉar ĝi estis burĝa respubliko, kiu subpremis la revolucian movadon de l' proletaro, precipe en la jaroj 1918-20, 1923.

Sed ĉu la komunistoj povis resti sur tiu ĉi pozicio ankaŭ tiam, kiam la faŝista movado komencis levi la kapon, kiam, ekzemple en 1932 en Germanio la faŝistoj organizis kaj armis milcentojn da ŝturmuloj kontraŭ la laborista klaso? Certe, ne. La eraro de l' komunistoj en pluraj landoj, kaj speciale en Germanio, estis en tio, ke ili ne konsideris la okazintajn aliiĝojn, kaj daŭrigis ripeti tiujn lozungojn kaj resti sur tiuj taktikaj pozicioj, kiuj estis ĝustaj kelkajn jarojn antaŭe, precipe en la momento, kiam la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 130 von 188

batalo por la proletara diktaturo havis aktualan karakteron kaj kiam sub la standardo de l' Weimar'a respubliko, kiel tio-ĉi estis en 1918-20, grupiĝis la tuta germana kontraŭ-revolucio.

Kaj tiu cirkonstanco, ke oni estas devigita ankoraŭ hodiaŭ noti en niaj vicoj la eneston de timo je la elstarigo de pozitivaj demokratiaj revendikoj, — tio-ĉi atestas nur tion, je kiom niaj kamaradoj ankoraŭ ne ekmastris la marksist-leninistan metodon en la rilato al tiaj gravaj demandoj de nia taktiko. Kelkiuj diras ke la batalo pro la demokratiaj rajtoj povas deturni la laboristojn de la batalo pro la proletara diktaturo. Ne senutile estos rememorigi, kion diris koncerne tio-ĉi k-do Lenin:

„Estus enradika eraro opinii, ke la batalo pro la demokratio estas kapabla deturni la proletaron de l'socialista revolucio aŭ ŝirmi, ombrumi ĝin k.t.p. Male, kiel ne estas ebla triumfoplena socialismo, ne realiginta kompletan demokration, tiel ne povas preparigi al la venko super la burĝaro proletaro, ne kondukanta ĉiuflankan, konsekvenceman kaj revolucian batalon pro la demokratio" [40].

Tiujn-ĉi vortojn devas firme enmemorigi ĉiuj niaj kamaradoj, konsiderante ke el la malgrandaj movadoj pro la defendo de l' elementaj rajtoj de la laborista klaso en la historio elkreskis grandaj revolucioj. Sed por scipovi kunigi la batalon pro la demokratiaj rajtoj kun la batalo de l' laborista klaso pro socialismo, necesas antaŭ ĉio liberiĝi je la skemista traktmaniero de l' demando pri la defendo de l' burga demokratio. (A p l a ŭ d o j).

## HAVI ĜUSTAN LINION — ESTAS ANKORAU NESUFIĈE.

Kamaradoj! La ellaboro de ĝusta linio estas, memkompreneble, la plejgravo por la Komunista Internacio



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 131 von 188

kaj ĉiu el ĝiaj sekcioj. Sed nura ĝusta linio estas ankoraŭ nesufiĉa por la konkreta gvidado de l' klasa batalo.

Por tio-ĉi estas necesa la plenumo de pluraj kondiĉoj, antaŭ ĉio de jenaj:

La unua — ĝi estas la organiza certigo de l' realigo de la akceptitaj decidoj en la tuta praktika laboro kaj la rezoluta supervenko de ĉiuj obstakloj, starantaj sur la vojo. Tion, kion diris kamarado Stalin en la XVII-a kongreso de TKP(b) pri la kondiĉoj de l' realigo de la linio de l' partio, oni povas tute kaj plene reporti ankaŭ al la decidoj, akceptataj de nia kongreso:

„Kelkiuj opinias, — diris kamarado Stalin, — ke estas sufiĉe ellabori ĝustan linion de l' partio, proklami ĝin al ĉies aŭdo, tekstigi ĝin en la formo de tezoj kaj rezolucioj kaj voĉdone akcepti ĝin unuanime por ke la venko venu mem, tiel diri, spontane. Tio ĉi, certe, estas malĝuste. Tio-ĉi estas granda eraro. Tiel povas opinii nur nekorekteblaj burokratoj kaj kancelariuloj...

... Bonaj rezolucioj kaj deklaroj pro la ĝenerala linio de l' partio — tio-ĉi estas nur la komenco de l' afero ĉar ili signifas nur la deziron venki, sed ne la venkon mem. Post tio ke estas donita ĝusta linio, post tio ke estas donita ĝusta solvo de l' problemo, la sukceso de l'afero dependas de l' organiza laboro, de l' organizo de la batalo por la realigo de l' linio de la partio, de l' ĝusta alelekto de homoj, de l' kontrolo super la plenumado de la decidoj de l' gvidantaj organoj. Sen tio-ĉi la ĝusta linio de l' partio kaj la ĝustaj decidoj riskas suferi seriozan malutilon. Pli ol tio: post tio ke estas donita la ĝusta politika linio, la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 132 von 188

organiza laboro decidas ĉion, inkluzive la sorton de l' politika linio mem, — ĝian plenumiĝon aŭ ĝian fiaskon“ [41].

Estas dubinde, ĉu necesas ion aldoni al tiuj-ĉi rimarkindaj vortoj de kamarado Stalin, kiuj devas estiĝi la gvidanta principo en la tuta laboro de niaj partioj.

Alia kondiĉo — ĝi estas la scipovo fari la decidojn de Komintern kaj de ĝiaj sekcioj — decidoj de l' plej vastaj amasoj. Tio-ĉi estas des pli necese nun, kiam antaŭ ni staras la tasko pri kreo de unueca fronto de l' proletaro kaj partoprenigo de l' plej vastaj amassoj en la antifaŝista popola fronto. La politika kaj taktika genio de Lenin kaj Stalin plej evidente kaj klarege elmontriĝis en la majstra scipovo alkonduki la amasojn per ilia propra sperto al la kompreno de l' ĝusta linio kaj de l' lozungoj de la partio. Se trarigardi la tutan historion de l' bolŝevismo, tiu-ĉi riĉega trezorujo de politika strategio kaj taktiko de l' revolucia laborista movado, oni povas konvikiĝi ke la bolŝevikoj neniam substituis al la metodoj de gvidado de l' amasoj metodojn de gvidado de l' partio.

Kamarado Stalin indikis kiel unu el la specifecoj de l' taktiko de la rusaj bolŝevikoj en la periodo de preparado de l' Oktobro, ke ili scipovis ĝuste difini tiujn vojojn kaj turniĝojn, kiuj nature alkondukas la amasojn al la lozungoj de l' partio, al la „sojlo de l' revolucio“ mem, helpante al ili eksenti, kontroli, ekkoni per la propra sperto la ĝustecon de tiuj-ĉi lozungoj; ke ili ne konfuzis la gvidadon de l' partio kun la gvidado de l' amasoj kaj klare vidis la diferencon inter gvidado de l' unua speco kaj gvidado de l' dua speco, ellaborinte tiamaniere la taktikon ne nur kiel sciencon pri la gvidado de l'



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 133 von 188

partio, sed ankaŭ pri la gvidado de milionaj amasoj da laboruloj.

Plue, estas necese konsideri, ke la asimilo de niaj decidoj per la vastaj amasoj estas ne ebla se ni ne ellernos paroli en lingvo komprenebla por la amasoj. Ni tute ne ĉiam scipovas paroli simple, konkrete, en imagoj, proksimaj kaj kompreneblaj por la amasoj, ĉiam ankoraŭ ni ne povas rezigni je ellernitaj kaj abstraktaj formuloj. Efektive, ni enrigardu niajn flugfoliojn, gazetojn, rezoluciojn kaj tezojn, kaj vi vidos, ke ili estas verkitaj en tia lingvaj'o, tiom peze vortigitaj, ke ili estas malfacilaj por la kompreno eĉ de l' funkciuloj de niaj partioj, ne parolante jam pri vicanaj laboristoj.

Se pripensi, kamaradoj, ke, precipe en la faŝismaj landoj, la laboristoj, disvastigantaj kaj legantaj tiujnĉi flugfoliojn, riskas la vivon, tiam fariĝas por ni tute klara la neceso skribi por la amasoj en komprenebla por ili lingvaj'o, por ke la tiumaniere alportataj oferoj ne pereu vane.

En ne malpli granda grado tio-ĉi koncernas niajn buŝajn agitadon kaj propagandon. En tiu-ĉi rilato oni devas kun la tuta sincereco konfesi, ke la faŝistoj ofte okaziĝas pli lertaj kaj elastaj ol multaj niaj kamaradoj.

Mi rememoras, ekzemple, kunvenon de senlaboruloj en Berlin antaŭ la alveno de Hitler al la regado. Tio-ĉi estis dum la proceso de l' famaj aferistoj kaj spekulistoj, la fratoj Skkarek, daŭrinta kelkajn monatojn. La naci-socialista oratoro elpaŝinta en la kunveno utiligis tiun-ĉi proceson por siaj demagogiaj celoj. Li menciis tiujn fiaferojn, koruptojn kaj aliajn krimojn, kiujn faris la fratoj Sklarek, akcentis ke la proceso kontraŭ ili daŭras monatojn, elkalkulis, kiom da milcentoj da markoj ĝi jam kostis al



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

la germana popolo, kaj sub la laŭtaj aplaŭdoj de l' ĉeestintoj deklaris ke oni devus tiajn banditojn, kiel la Sklarek'oj sen iuj ajn prokrastadoj pafekzekuti, kaj la monon, elspezitan por la proceso, fordoni por la senlaboruloj.

Leviĝas komunisto kaj petas la parolon. La prezidinto komence rifuzas, sed sub la premo de l' ĉeestantoj, kiuj deziris aŭdi la komuniston, estas devigita prezenti al li la parolon. Kiam la komunisto leviĝis sur la tribunon, ĉiuj ĉeestintoj streĉis la atenton atendante, kion do diros la komunista oratoro? Nu, kaj kion li diris?

„Kamaradoj! — deklaris li per forta kaj firma voĉo, — j'us finiĝis la plenkunsido de l' Komunista Internacio. — Ĝi indikis la vojojn al la savo de l' laborista klaso. La ĉefa tasko, kiun ĝi metas antaŭ ni, estas, kamaradoj, „l a b a t a l a k i r o d e l a p l i m u l t o d e la l a b o r i s t a k l a s o". (R i d o). La plenkunsido indikis ke la movadon de l' senlaboruloj oni devas „politikigi". (Rido). La plenkunsido alvokas levi ĝin sur la s u p e r a n ŝ t u p o n (rido)...".

Kaj en la sama spirito la oratoro parolis plue, evidente opiniante ke li „klarigas" la aŭtentajn decidojn de l' plenkunsido.

Ĉu povis tia parolado entuziasmigi la senlaborulojn? Ĉu povis ilin kontentigi ke oni intencas ilin komence politigi, plue revoluciigi kaj poste mobilizi por levi ilian movadon sur la superan ŝtupon? (R i d o. A p l a ŭ d o j).

Sidante en unu el la anguloj, mi kun ĉagreniĝo observis persone, kiel la ceestintaj senlaboruloj, kiuj tiom forte deziris aŭdi la komuniston, por elscii de li, kion ili konkrete faru, — komencis oscedi kaj elmontri evidentan seniluziiĝon. Kaj min tute ne mirigis, kiam fine la prezidinto maldelikate senigis nian



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

oratoron je la parolrajto sen iu ajn protesto de l' kunveno...

Tio-ĉi, bedaŭrinde, estas ne ununura okazo en nia agitado. Tiaj okazoj havis lokon ne nur en Germanio. Tiel agiti, kamaradoj, signifas agiti kontraŭ si. Ĉu ne estas la tempo fini fojon por ĉiam kun tia, permesu diri, infaneca metodo de agitado, por ne apliki pli fortain vortojn.

Dum mia raporto la prezidinto kamarado Kuusinen ricevis el la kongreshalo karakterizan leteron, adresitan al mi. Mi ĝin prelegos:

„En via parolado en la kongreso mi petas tuŝi unu demandon, nome: ke plue ĉiuj rezolucioj kaj decidoj de Komintern estu skribitaj tiel, ke ne nur preparitaj komunistoj povu kompreni, sed ke ĉiu laborulo, sen ajna prepariteco, legante la materialojn de Komintern, tuj komprenu, kion volas la komunistoj kaj kian utilon donas la komunismo al la homaro. Pri tio-ĉi forgesas iuj partiaj suprularoj. Necesas rememorigi al ili, kaj ankoraŭ tre forte. Kaj ke la agitadon por la komunismo oni faru en komprenebla lingvaĵ'o".

Kiu estas la aŭtoro de ĉi-letero mi precize ne scias. Sed mi ne dubas pri tio, ke ĉi kamarado esprimis per sia letero la opinion kaj deziron de milionoj da laboristoj. Multaj niaj kamaradoj opinias, ke ili des pli bone agitas kaj propagandas, ju pli, ili uzas da bombastaj vortoj, nekompreneblaj por la amasoj formuloj kaj tezoj, forgesante pri tio, ke ĝuste la plej grandaj gvidantoj kaj teoriuloj de l' laborista klaso de nia epoko — L e n i n kaj S t a l i n ĉiam parolis kaj verkis en plej komprenebla por la vastaj amasoj lingvaj'o.

Necesas firme enmemorigi al ĉiu el ni, kiel leĝon, kiel bolŝevistan leĝon, la elementan regulon:

K i a m v i v e r k a s a ŭ p a r o l a s, n e c e s a s ĉ i-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 136 von 188

am pensi pri tiu vicana laboristo, kiu devas vin kompreni, ekkredi al via alvoko kaj kun preteco sekvi vin! Necesas pensi pri tiu, por kiu vi verkas kaj al kiu vi parolas. (Aplaŭdoj).

## PRI KADROJ [42].

Kamaradoj, niaj plej bonaj decidoj restos sur la papero, se ne estas tiuj homoj, kiuj scipovu ilin realigi. Tamen, bedaŭrinde, mi devas konstati, ke unu el la plej gravaj demandoj, la demando pri la kadroj, pasis en nia kongreso preskaŭ sen ia atento.

La raporto de l' Ekzekutivo de Komintern estis debatita en la daŭro de 7 tagoj, parolis multego da oratoroj el diversaj landoj, kaj nur unuopuloj preterire haltis ĉe tiu-ĉi treege esenca demando de niaj partioj kaj laborista movado. Niaj partioj en ilia praktiko tute ankoraŭ ne ekkonsciis, ke la homoj, la kadroj decidas pri la afero. Ili ne scipovas, kiel instruas nin k-do Stalin, kreskigi la kadrojn, „kiel la ĝardenisto kreskigas ŝatelektitan fruktarbon", „aprezi [43] la homojn, aprezi la kadrojn, aprezi ĉiun laboranton, kapablan alporti utilon al nia komuna afero".

La malŝata rilato al la demando pri kadroj estas des pli neallasenda ke ni senĉese perdas parton de niaj plej valoraj kadroj en la batalo, ĉar ni estas ne scienca societo, sed batala movado, kiu konstante troviĝas ĉe la fajrolinio. Ĉe ni la plej energiaj, la plej kuraĝoplenaj kaj konsciaj elementoj estas en la unuaj vicoj. La malamiko ĉasas ĝuste ilin, la avangardulojn, mortigas ilin, j'etas en malliberejojn, en koncentrajn tendarojn, submetas ilin al suferigaj torturoj, precipe en la faŝismaj landoj. Tio sekvigas kun precipa akreco la neceson je konstante rekom-

pletigo, kreskigo, eduko de novaj kadroj, same kiel je zorgema gardado de l' havataj kadroj.

La demando pri kadroj akiras precipan akrecon ankoraŭ tial ke sub nia influo disvolviĝas la amasa movado de l' unueca fronto, kiu elstarigas multajn milojn da novaj proletaj aktivuloj. Dum tio en la vicojn de niaj partioj alfluas ne nur junaj revoluciaj elementoj, revoluciiĝinaj laboristoj, neniam antaŭe partoprenintaj en politika movado. Al ni ofte iras ankaŭ eksaj membroj kaj aktivuloj de l' socialdemokrataj partioj. Tiuj-ĉi novaj kadroj postulas al si specialan atenton, precipe en la nelegalaj partioj, des pli ke tiuj-ĉi teorie malforte preparitaj kadroj ne malofte en sia praktika laboro jam ekstaras antaŭ seriozaj politikaj problemoj, kiujn ili mem devas solvi.

La demando pri ĝusta politiko de kadroj estas por niaj partioj, kaj ankaŭ por la komjunularo kaj por ĉiuj amasaj organizaj, por la tuta revolucia laborista movado la plej aktuala problemo.

En kio estas ĝusta politiko de kadroj?

Unue, necesas koni la homojn. En niaj partioj, kiel regulo, ne estas sistemeca pristudado de l' kadroj. Nur en la lasta tempo la kompartioj de Francio kaj Polio, kaj en Oriento — la komunista partio de Ĉinio atingis certajn sukcesojn en ĉi-direkto. En sia tempo la germana kompartio — antaŭ la nelegaleco — ankaŭ entreprenis la studadon de siaj kadroj. Kaj la sperto de tiuj-ĉi partioj montris ke apenaŭ oni komencis studi la homojn, oni malkovris laborantojn, kiujn oni antaŭe ne rimarkis, aliflanke — la partioj komencis puriĝi je fremdaj elementoj, malutilaj ideologie kaj politike. Sufiĉas mencii la ekzemplon de Selor kaj Barbet en Francio, kiuj, kiam oni prenis ilin sub la bolŝevistan mikroskopon, evidentiĝis agentoj de l' klasa malamiko kaj estis



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 138 von 188

elj'etitaj el la partio. En Polio, kaj ankaŭ en Hungario, la kontrolo de l' kadroj plifaciligis la malkovron de provokistaj nestoj, peneme ŝirmantaj agentojn de l' malamiko.

Due, estas necesa ĝusta avansigo de l' kadroj. La avansigo devas esti ne okaza, sed unu el la normalaj funkcioj de l' partio. Estas malbone, es a avansigo estas farata nur el konsideroj internpartiaj, ne konsiderante, ĉu la avansigita komunisto havas ligon kun la amasoj. La avansigo devas okazi sur la bazo de konsiderado kaj de l' internpartiaj interesoj kaj de l' populareco de la avansigataj kadroj en la amasoj. Ni havas en niaj partioj ekzemplojn de avansigo, kiuj donis bonegajn rezultojn. En la prezidio de nia kongreso, ekzemple, sidas la hispana komunistino k-dino Dolores. Du jarojn antaŭe ŝi estis ankoraŭ ĉe la laboro en la bazo. En la unuaj ekluktoj kontraŭ la klasa malamiko ŝi elmontris sin bonega agitistino kaj batalantino. Avansigita plue en la gvidantaron de l' partio, ŝi montris sin plej inda membro da ĝi. (Aplaŭdoj).

Mi povus mencii vicon da similaj okazoj ankaŭ en kelkaj aliaj landoj.

Sed en la plimulto el okazoj la avansigo estas farata neorganizite, okaze kaj tial ne ĉiam sukcese. Iufoje estas avansigataj kiel gvidantoj rezonemuloj, frazemuloj, babiluloj, rekte malutilantaj al la afero.

Trie, estas necesa sperta utiligo de l' kadroj. Necesas scipovi trovi kaj utiligi la valorajn kvalitojn en ĉiu aparta aktivulo. Idealaj homoj ne estas: necesas ilin preni tiaj kiaj ili estas, korektante iliajn malfortecojn kaj mankojn. Ni konas en niaj partioj kriantajn ekzemplojn de malĝusta utiligo de bonaj, honestaj komunistoj, kiuj povus alporti seriozan utilon, se ili estus starigitaj ĉe pli konforma por ili laboro

Kvare, estas necesa pli ĝusta dislokado de l' kadroj. Antaŭ ĉio estas necese, ke en la plej gravaj ĉeneroj de nia movado estu fortaj homoj, ligitaj kun la amaso, elirintaj el ĝia sino, iniciativaj kaj firmaj; por ke en la plej grandaj centroj estu konforma kvanto da tiaj aktivuloj. En la kapitalismaj landoj la transigo de l' kadroj de unu loko al alia — estas afero ne facila. Tiu-ĉi tasko tie kunpuŝiĝas je tuta vico da obstakloj kaj malfaciloj, en tiu nombro ankaŭ je demandoj de materiala, familia karaktero k.t.p.; malfaciloj, kiujn oni devas konsideri kaj konformmaniere supervenki, kio kutime ĉe ni tute ne estas farata.

Kvine, estas necesa sistemeca helpo al la kadroj. Tiu-ĉi helpo devas konststi el zorgema instrukciado, kamaradeca kontrolo, en la korektado de l' mankoj kaj eraroj, en la konkreta ĉiutageca gvidado de l' kadroj.

Sese, estas necesa zorgado pri la konservo de l' kadroj. Estas necese scipovi ĝustatempe dekonduki la kadrojn en postfronton, anstataŭigi per novaj, se tion-ĉi postulas la cirkonstancoj. Ni devas postuli, precipe en la nelegalaj partioj, plej grandan respondecon de l' gvidantaro por la konservo de l' kadroj. (Aplaŭdoj). La ĝusta konservo de l' kadroj supozas ankaŭ plej seriozan aranĝon de l' konspireco en la partio. En kelkaj niaj partioj multaj kamaradoj opinias, ke la partioj estas jam preparitaj al la nelegaleco per tio ke ili rekonstruiĝis nur laŭ skemo, formale. Ni devis multkoste pagi por tio, ke la efektiva rekonstruo komenciĝis nur post la transiro en la nelegalecon, sub la senperaj pezaj frapoj de l' malamiko. Rememoru kiom kare kostis la transiro en nelegalecon de l' komunista partio de Germanio! Tiu-ĉi sperto devas esti serioza averto por tiuj niaj partioj, kiuj hodiaŭ estas



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 140 von 188

ankora legalaj, sed morgaŭ povas perdi sian legalecon.

Nur ĝusta politiko de kadroj donos la eblecon al niaj partioj maksimume disvolvi kaj utiligi la fortojn de l'havataj kadroj kaj ĉerpi el la grandega rezervujo de l' movado de la amasoj konstante novajn kaj plej bonajn aktivajn elementojn.

Per kia ĉ e f a k r i t e r i o ni devas nin gvidi ĉe la elekto de kadroj?

La unua: p l e j p r o f u n d a s i n d o n e m o p o r la afero de l' laborista klaso, fideleco al la partio, spertita en la bataloj, en prizonoj, ĉe la juĝo — antaŭ la faco de l'kl sa malamiko.

La dua: la plej intima l i g i t e c o k u n l a a m a s o j: vivi per la interesoj de l'amasoj, senti la pulson de la vivo de l'amasoj, iliajn humorojn kaj bezonojn. La aŭtoritato de l'gvidantoj de niaj partiaj organizoj devas esti antaŭ ĉio bazita sur tio ke la amaso vidas en ili siajn kondukistojn, konvinkiĝas per la propra sperto pri ilia kapableco kiel gvidantoj, pri ilia rezoluteco kaj sindonemo en la batalo.

La tria: la k a p a b l o m e m s t a r e s i n o r i e n t i en l a c i r k o n s t a n c a r o kaj ne timi l a r e s p o n d e c o n p r o l a d e c i d o j. Tiu ne estas bolŝeviko, kiu ne povas elmontri iniciativon, kiu rezonas: „mi plenumos tion, kion oni al mi diros". Nur tiu estas vera bolŝevista gvidanto, kiu ne perdas la kapon en la momentoj de malvenko, ne trofieriĝas en la momentoj de sukceso, kiu elmontras nerompeblan firmecon en la realigo de l'decidoj. La kadroj disvolviĝas kaj kreskas, kiam ili estas metataj antaŭ la neceso memstare solvi konkretajn taskojn de l'batalo kaj sentas sur si la tutan respondecon por tio-ĉi.

Kvare: la d i s c i p l i n i t e c o kaj bolŝevista hardi-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

teco, kiel en la batalo kontraŭ la klasa malamiko, tiel en la nepacigebleco kontraŭ ĉiuj deviadoj je la linio de l'bolŝevismo.

Ni devas, kamaradoj, des pli forte substreki la neceson de tiuj-ĉi kondiĉoj de ĝusta alelekto de kadroj, ĉar en la praktiko tre ofte estas farata prefero al tiu kamarado, kiu, scipovas literature skribi, bele paroli, sed ne estas homo de afero kaj ne taŭgas por la batalo, kontraŭ alia kamarado, kiu, eble, ne tiom bone scipovas skribi kaj oratori, sed estas firma, iniciativa, ligita kun la amasoj, kapabla iri al la batalo kaj konduki aliajn al la lukto. (*Aplaŭdoj*). Ĉu malmulte estas da okazoj kiam la sektano, doktrinulo, rezonemulo, elpuŝas la fidelan amasulon, la veran laboristan kondukanton?

Niaj gvidantaj kadroj devas kunigi la scion de tio, *kion* ili devas fari, kun la *bolŝevista eltenemo* kaj *revolucia karaktero* kaj *volo al la realiĝo de tio-ĉi*.

En konekso kun la demando pri kadroj permesu, kamaradoj, al mi halti ĉe tiu grandega rolo, kiun estas alvokita ludi IRH rilate la kadrojn de l' laborista movado. Per la materiala kaj morala helpo, kiun la organizoj de IRH havigas al la malliberigitoj kaj iliaj familioj, al la politikaj elmigrintoj kaj persekutitaj revoluciuloj kaj antifaŝistoj estas savitaj la vivoj kaj konservitaj la fortoj kaj la batalkapablo de miloj kaj miloj da plej valoraj batalantoj de l' laborista klaso en diversaj landoj. Tiu el ni, kiu sidis en prizono, senpere spertis mem je si la grandegan signifon de la agado de IRH. (*Aplaŭdoj*).

IRH per sia agado konkeris al si la amon, la aldonitecon kaj la profundan dankemon de milcentoj da proletoj kaj revoluciaj elementoj de l' kampularo kaj intelektularo.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 142 von 188

En la nunaj kondiĉoj, en kondiĉoj de progresanta burĝa reakcio, furiozanta faŝismo, pliakriĝo de l'klasbatalo, la rolo de IRH treege plikreskas. Antaŭ IRH staras nun la tasko transformiĝi je vere amasa organizo de l' laboruloj en ĉiuj kapitalismaj landoj (aparte en faŝismaj landoj, akomodiĝante al la specialaj kondiĉoj de tiuj-ĉi landoj). Ĝi devas fariĝi, tiel diri, siaspeca „ruĝa kruco" de l' unueca fronto proletara kaj de l' antifaŝista popola fronto, enmembranta milionojn da laboruloj, — „ruĝa kruco" de l' armeo de la laborulaj klasoj, batalanta kontraŭ la faŝismo, por la paco kaj socialismo. Por ke IRH povu sukcese plenumi tiun-ĉi sian rolon, ĝi devas krei milojn da propra aktivularo, multnombrajn proprajn kadrojn, Ruĝ-helpajn kadrojn, respondantaj per sia karaktero kaj siaj kapabloj al la speciala inklino de tiu-ĉi treege grava organizo.

Kaj ĉi-tie necesas kun la tuta akreco kaj kategorieco diri: se la burokratismo, la senanima rilato al homoj, en la laborista movado estas ĝenerale malutila, en la agadsfero de IRH ĝi estas malbono apudlima al krimo. (Aplaŭdoj). La batalantoj de l' laborista klaso, la viktimoj de l'reakcio kaj faŝismo, suferantaj en la torturejoj kaj koncentraj tendaroj, la politikaj elmigrintoj kaj iliaj familioj devas renkonti la plej atentegan kaj zorgan rilaton de la organizoj kaj funkciuloj de IRH. (Daŭraj aplaŭdoj). IRH devas ankoraŭ pli bone kompreni kaj plenumi sian devon en la afero de helpo al la batalantoj de l' proletara kaj antifaŝista movado kaj precipe en la afero de l' fizika kaj morala konservo de l'kadroj de laborista movado. Kaj la komunistoj kaj revoluciaj laboristoj, partoprenantaj en la organizo de IRH, devas senti ĉe ĉiu paŝo la grandegan respondecon antaŭ la laborista klaso kaj antaŭ la Komunista Internacio, kiu kuŝas sur ili por la



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

sukcesplena plenumo de la rolo kaj taskoj de IRH. (Aplaŭdoj).

Kamaradoj, kiel oni scias, la plej bona eduko de l'kadroj ricevigas en la procedo de l'batalo, de la supervenkado de l' malfaciloj kaj elprovoj, kaj ankaŭ per la pozitivaj kaj negativaj ekzemploj. Ni havas centojn da ekzemploj de modela konduto dum la strikoj, demonstracioj, en malliberejoj, dum procesoj. Ni havas milojn da heroojn, sed, bedaŭrinde, ankaŭ ne malmulte da okazoj de malkuraĝo, malfirmeco kaj eĉ dizertado. Kaj oni ofte forgesas pri tiuj kaj aliaj, ne edukas per ili, ne montras, kion imiti, kion malakcepti. Necesas studi la konduton de l'kamaradoj kaj laboristaj aktivuloj dum la klasaj kunpuŝiĝoj, dum la esplordemandadoj en la polico, en prizonoj kaj koncentraj tendaroj, ĉe la jugo k.t.p. El tio necesas dedukti la pozitivan, necesas montri modelojn por imito kaj dej'eti la putran, nebolŝevistan, filistran. Depost la Leipzig'a proceso ni havis tutan vicon da elpaŝoj de niaj kamaradoj ĉe la burĝa kaj faŝista juĝo, kiuj montris, ke ĉe ni kreskas multnombraj kadroj, bonege komprenantaj, kion signifas la bolŝevista sinteno ĉe la jugo.

Sed ĉu multaj eĉ el vi, kongresanoj, scias pri la proceso de l'fervojistoj en Rumanio, pri la proceso de l'senkapigita de l'faŝistoj Fite Schultze en Germanio, pri la proceso de l'kuraĝa japana kamarado Itikava, pri la proceso de l'bulgaraj revoluciaj soldatoj kaj pri multaj aliaj procesoj, kie estis montritaj plej indaj modeloj de proleta heroismo? (Varmegaj aplaŭdoj. Ĉiuj leviĝas).

Tiajn plej indajn modelojn de proleta heroismo oni devas popularigi, montri kontraŭstare al malkuraĝo, filistreco kej ĉiaspeca putreco kaj malforteco en niaj vicoj kaj en la vicoj de l'laborista klaso.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 144 von 188

Necesas plej vastmaniere utiligi tiujn-ĉi ekzemplojn por la edukado de l'kadroj de la laborista movado.

Kamaradoj! Ĉe ni la partiaj gvidantoj ofte plendas ke m a n k a s h o m o j, mankas por la agitado kaj propagando, mankas por la gazeto, mankas por la sindikatoj, mankas por la laboro meze de l' junularo, meze de l'virinoj. Mankas kaj mankas, da homoj ne estas. Ni povas al tio-ĉi respondi per la malnovaj kaj eterne novaj vortoj de Lenin:

„D a h o m o j n e e s t a s k a j—d a h o m o j e s t a s a m a s o. Da homoj estas amaso ĉar la laborista klaso kaj la ĉiam pli kaj pli diversaj tavoloj de l'socio eligas ĉiam pli kaj pli multe da malkontentuloj, protestemuloj... Kaj samtempe da homoj ne estas ĉar... ne estas organizaj talentoj, kapablaj starigi tian vastan kaj samtempe unuecan kaj harmonian laboron, kiu ebligu aplikon al ĉiu, eĉ plej malmultasignifa forto" [44].

Tiujn-ĉi vortojn de Lenin oni devas profunde enlerni kaj kiel ĉiutagecan direktivon plenumi al niaj partioj. Da homoj estas multe, necesas ilin malkovri en niaj propraj organizoj, dum la strikoj kaj demonstracioj, en diversaj amasaj organoj de l'unueca fronto, necesas helpi al ili kreski en la procedo de l'laboro kaj batalo, necesas ilin meti en tian situacion, ke ili povu efektive utili al la laborista klaso.

Kamaradoj, ni, komunistoj estas homoj de l'afero. Antaŭ ni estas starigita la tasko de l'praktika batalo kontraŭ la ofensivo de l'kapitalo, kontraŭ la faŝismo kaj minaco de imperialista milito, batalo por la renverso de l'kapitalismo. Ĝuste tiu-ĉi p r a k t i k a tasko metas al la komunistaj kadroj la postulojn de nepra sinarmado per r e v o l u c i a t e o r i o. S t a l i n, tiu-ĉi grandega majstro de l' r e v o l u c i a a f e r o, i n s t r u a s n i n: „La teorio... donas al la praktikuloj la forton de l'sin-orientado, la klarecon de l'



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 145 von 188

perspektivo, la certecon en la laboro, la kredon pri la triumfo de nia afero".

Sed la vere revolucia teorio estas nepacigeble malamika al ĉia kastrita teoriumado, al ĉia senfrukta ludo je abstraktaj determinoj. „Nia teorio ne estas dogmo, sed gvidilo al ago" — diris Marx kaj diris Lenin. Jen tia teorio estas necesa al niaj kadroj, necesa, kiel la pano porekzista, kiel aero, kiel akvo. Kiu efektive volas elpeli el nia laboro la mortigantan skemismon, la malutilan skolastikon, tiu devas elbruligi ilin per la ardanta fero — kiel de l' praktika efika batalo kune kun la amasoj kaj ĉe la kapo de l'amasoj, tiel ankaŭ per senlaca laboro super la asimilo de l' potenca, fruktodona, ĉiuforta bolŝevista teorio, instruo de Marx-Engels-Lenin-Stalin. (Aplaŭdoj).

En konekso kun tio-ĉi mi konsideras necesa haltigi vian atenton ĉe la laboro de niaj partiaj lernejoj. Ne skolastikulojn, rezonemulojn kaj majstrojn pri citaĵ'oj devas prepari niaj lernejoj. Ne! Praktikaj avangardaj batalantoj por la afero de l' laborista klaso devas eliri el iliaj muroj. Avangardaj batalantoj ne nur per sia braveco, preteco al sinofero, sed ankaŭ per tio, ke ili vidas pli malproksimen, scias pli bone, ol la vicanaj laboristoj, la vojon al la emancipo de l' laboruloj. Ĉiuj sekcioj de l' Komunista Internacio devas, ne prokrastante longe la aferon, sin okupi pri la serioza starigo de l' partiaj lernejoj, kiel forĝejoj de tiaj kadroj—de batalantoj.

La ĉefa tasko de niaj partiaj lernejoj, ŝajnas al mi, estas en tio, ke ili instruu la troviĝantajn en ili partianojn kaj komjunulojn al la apliko de l' marksist-leninista metodo en la konkreta cirkonstancaro de l' konsiderata lando, al la konsiderataj kondiĉoj, al la batalo ne kontraŭ la malamiko „ĝenerale", sed kon-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 146 von 188

traŭ la konsiderata konkreta malamiko. Por tio-ĉi necesas studi ne la literon de l' leninismo, sed ties vivan, revolucian spiriton.

Oni povas dumaniere prepari kadrojn en niaj partiaj lernejoj.

La unua maniero: la homojn oni preparas abstrakte teoriece, penas doni al ili laŭeble plej grandan sumon da sekaj scioj, ekzercigas ilin en la scipovo literature verki tezojn kaj rezoluciojn kaj nur preterpasante tuŝas la problemojn de tiea lando, de tiea laborista movado, de ĝiaj historio, tradicioj kaj sperto de tiea komunista partio. Nur preterpasante.

La dua maniero: tia teoria lernado, ĉe kiu la asimilo de l' ĉefaj principoj de marksism-leninismo estas bazata sur la praktika studado fare de l' kursano de l' radikaj problemoj de batalo de la proletaro en lia lando, tiel ke li, reveninte denove al la praktika laboro, povu memstare sin orienti, povu estiĝi memstara praktika organizanto, gvidanto, kapabla konduki la amasojn al la batalo kontraŭ la klasa malamiko.

Ne ĉiuj elirintoj el niaj partiaj lernejoj montriĝis taŭgaj. Multe da frazoj, da abstraktaĵ'oj, da libreco, eksteraĵ'a instruiteco. Kaj ni bezonas efektivajn, vere bolŝevistajn organizantojn kaj gvidantojn de l' amasoj. Tion-ĉi ni bezonas urĝege hodiaŭ. Tia kursano eĉ ne povu, eble, verki bonaj tezojn, kvankam ankaŭ tion-ĉi ni tre bezonas, sed li devas scipovi organizi kaj gvidi, ne timante la malfacilojn, sciante ilin supervenki.

La revolucia teorio—ĝi estas la ĝeneraligita, resumigita sperto de l' revolucia movado; la komunistoj devas zorge utiligi en siaj landoj ne nur la sperton de l' pasinto, sed ankaŭ la sperton de l'nuna batalo de aliaj taĉmentoj de l' internacia laborista movado. Tamen ĝusta utiligo de sperto neniel sig-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 147 von 188

nifas la mekanikan transporton en preta aspekto de l' formoj kaj metodoj de batalo el unuj kondiĉoj en aliajn, el unu lando en alia, kio oftokaze havas lokon en niaj partioj. La nuda imitado, la simpla kopiado de l' metodoj kaj formoj de laboro eĉ de l' Sovet-Unia komunista partio en landoj, kie regas ankoraŭ la kapitalismo, povas, spite ĉiuj bonaj intencoj, alporti ne utilon, sed malutilon, kiel ofte tio efektive jam okazis. Ĝuste el la sperto de l'rusaj bolŝevikoj ni devas lerni la vivan kaj konkretan aplikon de l' unueca internacia linio al la specifoj de ĉiu lando, lerni la senkompatan elpelon, malhonorigon, publikan primokon de l' frazo, ŝablono, pedantismo kaj doktrineco.

Necesas, kamaradoj, lerni, lerni konstante, ĉe ĉiu paŝo, en la procedo de l' batalo, en libero kaj en prizono. Lerni kaj batali — batali kaj lerni. Necesas scipovi kunigi la grandan instruon de Marx-Engels-Lenin-Stalin kun stalineca firmeco en la laboro kaj batalo, kun stalineca principa nepacigeblo al la klasa malamiko kaj al la deirantoj de la linio de l' bolŝevismo, kun stalineca sentimeco pri la malfaciloj, kun stalineca realismo. (Aplaŭdoj).

* * *

Kamaradoj! Neniam, al neniu internacia kongreso de l' komunistoj la monda socia opinio elmontris tiom viglan intereson, kian ni vidas nun rilate al nia kongreso. Sen troigo oni povas diri, ke ne estas iu serioza gazeto, iu politika partio, iu iom ajn serioza politika kaj socia aganto, kiuj ne sekvu atentostreĉe la iradon de l' kongreso,

La rigardoj de milionoj da laboristoj, kamparanoj, urba etpopolo. oficistoj kaj intelektuloj, koloniaj popoloj kaj subpremitaj nacioj estas direktitaj al



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 148 von 188

Moskvo, al la granda ĉefurbo de l' u n u a, sed ne l a s t a ŝtato de l' internacia proletaro. (A p l a ŭ d o j). En tiu-ĉi fakto ni vidas la konfirmon de l' grandega graveco kaj aktualeco de l' demandoj pritraktataj de l' kongreso, kaj de ĝiaj decidoj. La freneza hurlo de l' faŝistoj el ĉiuj landoj, precipe de l' furioza germana faŝismo nur konfirmas ke ni per niaj decidoj bone trafis la celpunkton. (A p l a ŭ d o j).

En la malluma nokto de l' burĝa reakcio kaj faŝismo, en kiu la klasa malamiko penas teni la laborulojn de l' kapitalismaj landoj, la Komunista Internacio — la internacia partio de l' bolŝevikoj — altas kiel lumturo, indikanta al la tuta homaro la solan ĝustan vojon al la emancipo je la jugo de l' kapitalo, je la faŝisma barbareco kaj teruroj de l' imperialista milito.

La starigo de unueco de agoj de l' laborista klaso estas la decida etapo sur tiu-ĉi vojo.

Jes, de la unueco de agado de l' organizoj de la laborista klaso ĉiutendeca, kunigo de ĝiaj fortoj en ĉiuj regionoj de ĝia agado kaj sur ĉiuj terenoj de ĝia klasa batalo.

La laborista klaso devas elbatali la u n u e c o n d e s i a j s i n d i k a t o j. Vane iuj reformistaj sindikat-gvidantoj provas timigi la laboristojn per la fantomo de neniigo de l' sindikata demokratio rezulte de l' interveno de la komunista partio en la aferoj de l' unuigitaj sindikatoj, rezulte de l' ekzisto de komunistaj frakcioj interne de l' sindikatoj. Prezenti nin, komunistojn, kiel malamikoj de l' sindikata demokratio — estas plej pura absurdo. Ni defendas kaj konsekvenceme batalas por la rajto de l' sindikatoj mem solvi siajn demandojn. Ni estas eĉ pretaj rezigni je la kreo de komunistaj frakcioj en la sindikatoj, se tio-ĉi estas necesa en la interesoj de l' sindikata unueco. Ni estas pretaj inter-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 149 von 188

konsenti pri la sendependeco de l' unuigataj sindikatoj je ĉiuj politikaj partioj. Sed ni estas rezolute kontraŭ ĉia dependeco de l' sindikatoj je la burĝaro, kaj ni ne rezignas je nia principa vidpunkto pri la neallaseblo de neŭtrala pozicio de l' sindikatoj rilate la klasan batalon inter la proletaro kaj la burĝaro.

La laborista klaso devas atingi la unuecon de ĉiuj fortoj de l' laborista junularo kaj de ĉiuj organizoj de l' antifaŝista junularo kaj elbatali tiun parton de l' laborula junularo, kiu trafis sub la diskomponigan influon de l' faŝismo kaj aliaj malamikoj de l' popolo.

La laborista klaso devas atingi kaj ĝi atingos la unuecon de agoj en ĉiuj regionoj de la laborista movado. Kaj tio-ĉi okazos des pli rapide, ju pli rezolute kaj firme ni, komunistoj kaj la revoluciaj laboristoj de ĉiuj kapitalismaj landoj, aplikos en realo la akceptatan de l' kongreso novan taktikan orientumon rilate la plej gravajn aktualajn demandojn de l' internacia laborista movado.

Ni scias, ke sur nia vojo estas multe da malfaciloj. Nia vojo estas ne asfaltita strato, nia vojo ne estas superŝutita de rozoj. Ne, la laborista klaso devos supervenki ne malmulte da obstakloj, obstakloj ankaŭ en sia propra medio, kaj antaŭ ĉio ĝi devos sennocigi [45] ĝisfine la skismigan rolon de la reakciaj elementoj de l' social-demokratio. Ĝin atendas multnombraj oferoj sub la frapoj de l' burĝa reakcio kaj faŝismo. Ĝia revolucia ŝipo devos pasi trans multego da rifoj, por atingi la savajn bordojn.

Sed la laborista klaso en la kapitalismaj landoj estas nun jam ne tia, kia ĝi estis en 1914, en la komenco de l' imperialista milito, kaj ne tia, kia ĝi estis en 1918, fine de l' milito. La laborista klaso



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 150 von 188

havas post si riĉan 20-jaran sperton de batalo kaj revoluciaj elprovoj, la maldolĉajn lecionojn de pluraj malvenkoj aparte en Germanio, en Aŭstrio, en Hispanio.

La laborista klaso havas antaŭ si la inspirantan ekzemplon de Sovet-Unio, la lando de l' venkinta socialismo. Ekzemplon de tio, kiel oni povas venki la klasan malamikon, starigi sian regadon kaj konstrui la socialisman socion.

La burĝaro jam ne dominas sendivide en la tuta mondo. Sur unu sesono de l' terglobo regas la venkinta laborista klaso. Sur grandega parto de l' teritorio de la granda Ĉinio regas la sovetoj.

La laborista klaso havas fortan, solidaran revolucian avangardon: la Komunistan Internacion. Ĝi havas elprovitan kaj agnoskitan grandan kaj saĝan gvidanton Stalin. (Tondro da aplaŭdoj, ĉiuj leviĝas, salutaklamoj el la vicoj de ĉiuj delegitaroj).

Al la profito de l' laborista klaso, kamaradoj, agas la tuta marŝo de l' historia evoluo. Vanaj estas la penoj de l' reakciuloj, de l' faŝistoj de ĉiuj speckoloroj, de la tuta mondburĝaro turni retren la radon de l' historio. Ne, tiu rado turniĝas al la tutmonda Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, al la definitiva triumpo de l' socialismo en la tuta mondo. (Varmegaj kaj daŭraj aplaŭdoj).

Solaj'o mankas ankoraŭ al la laborista klaso de l' kapitalismaj landoj: unueco en ĝiaj propraj vicoj.

Do des pli forte de tiu-ĉi tribuno eksonu tra la tuta mondo la batala alvolko de l' Komunista Internacio, la alvoko de Marx kaj Engels, Lenin kaj Stalin:

—Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu vin!



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

(Varmegaj kaj daŭraj aplaŭdoj. Ovacioj de la tuta halo, ekkrioj „hura", „Rot Front", „bansŭej". Ĉiuj leviĝas kaj kantas la „Internacion".

Ekkrioj de la germana delegitaro, trifoja „rot Front".

Ekkrioj de la ĉina delegitaro.

En diversaj lingvoj eksonas la ekkrioj „Vivu kamarado Stalin!", „Vivu kamarado Dimitrov!". La delegitaroj de apartaj landoj kantas siajn batalkantojn.

Kiam por momento mallaŭtiĝas la ovacioj, k-do Manuilskij eksonigas: „Vivu la fideia, elprovita kunbatalanto de l' granda Stalin, la ŝipdirektisto de l', Komintern, kamarado Dimitrov!"

Bruaj, longe ne ĉesantaj aplaŭdoj, hurakriojtransirantaj al ovacio, kiu daŭras 15-20 minutojn).

---



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 153 von 188

# LA OFENSIVO DE L' FAŜISMO KAJ LA TASKOJ DE L' KOMUNISTA INTERNACIO EN LA BATALO POR LA UNUECO DE L' LABORISTA KLASO KONTRAŬ LA FAŜISMO

REZOLUCIO LAU LA RAPORTO DE K-DO DIMITROV, AKCEPTITA DE L' VII KONGRESO DE KOMINTERN LA 20-n DE AUGUSTO 1935

* * *

## I. LA FAŜISMO KAJ LA LABORISTA KLASO.

I. La VII Kongreso de l' Komunista Internacio konstatas, ke la sekvantaj aliĝoj en la monda situacio determinas la dislokigon de l' klasaj fortoj sur la internacia areno kaj la taskojn de l' monda laborista movado:

a) La definitiva kaj senreturna venko de l' socialismo en la Lando de Sovetoj, venko de tutmonda signifo, gigante levinta la potencon kaj rolon de USSR kiel apogilo de l' ekspluatitoj kaj subpremitoj de la tuta mondo kaj inspiranta la laborulojn al la batalo kontraŭ la kapitalisma ekspluato, burĝa reakcio kaj faŝismo, por la paco, por libero kaj sendependeco de l' popoloj.

b) La plej granda en la historio de l' kapitalismo ekonomia krizo, el kiu la burĝaro provis eliri per la ruinigo de l' popolaj amasoj, kondamnante



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

al malsato kaj formorto miliondekojn da senlaboruloj, malaltigante ĝis neaŭditaj dimensioj la vivnivelon de l' laboruloj. Malgraŭ la kresko de l' industria produktado en pluraj landoj kaj la pligrandigo de l' profitoj de la financaj magnatoj, la monda burĝaro entute prosperis nek eliri el la krizo kaj depresio, nek reteni la pluan pliakriĝon de l' kontradikcioj de kapitalismo. En kelkaj landoj (Francio, Belgio k.a.) la krizo daŭras, en aliaj ĝi transiras en staton de depresio, kaj en tiuj landoj, kie la produktado transpaŝis la antaŭkrizan nivelon (Japanio, Britio), maturiĝas novaj ekonomiaj ekskuoj.

c) La ofensivo de l' faŝismo, la alveno al regado de l' faŝistoj en Germanio, la kresko de l' minaco de nova monda imperialista milito kaj de atako kontraŭ USSR, per kiuj la kapitalista mondo serĉas elvojon el la senelirejo de siaj kontradikcioj.

ĉ) Politika krizo, esprimiĝinta en la armita batalo de l' laboristoj en Aŭstrio kaj Hispanio kontraŭ la faŝistoj, kiu ne venigis ankoraŭ al la venko de l' proletaro super la faŝismo, sed malhelpis al la burĝaro plifirmigi sian faŝisman diktaturon; potenca antifaŝista movado en Francio, komenciĝinta en la februara demonstracio kaj ĝenerala striko de l' proletaro en 1934.

d) La revoluciiĝo de l' laborulaj amasoj en la tuta kapitalisma mondo, okazanta sub la influo de la venko de socialismo en USSR kaj de l'monda ekonomia krizo, kaj ankaŭ sur la bazo de l' lecionoj de la portempa malvenko de l' proletaro en la centro de Eŭropo, en Germanio, same kiel en Aŭstrio kaj en Hispanio — en landoj, kie la plimulto de l' organizitaj laboristoj subtenis la socialdemokration. Kreskas fortega aspiro al la unueco de agado en la interna-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 155 von 188

cia laborista klaso. Plivastiĝas la revolucia movado en la kolonia landoj kaj la soveta revolucio en Ĉinio. La proporcio de l' klasaj fortoj sur monda skalo pli kaj pli aliiĝas en la flankon de l' plikresko de la fortoj de l' revolucio.

En tiu-ĉi cirkonstancaro la reganta burĝaro pli kaj pli serĉas savon en la faŝismo, en la starigo de la malkaŝa, terorisma diktaturo de l' plej reakciaj, de l' plej ŝovinistaj kaj plej imperialistaj elementoj de la financa kapitalo, celante la realigon de ekskluzivaj rabaj agoj kontraŭ la laboruloj, preparadon de rabula, imperialista milito, atakon kontraŭ Sovet-Unio, sklavigon kaj dividon de Ĉinio, kaj sur la bazo de ĉio-tio — la eviton de revolucio. La financa kapitalo aspiras bridi la indignon de l' etburĝaj amasoj kontraŭ la kapitalismo per sia faŝista agentaro, demagogie akomodanta siajn lozungojn al la humoroj de tiuj tavoloj. Kreante tiamaniere por si amasan bazon kaj direktante tiujn-ĉi tavolojn kiel reakcian forton kontraŭ la laborista klaso, la faŝismo venigas al ankoraŭ pli granda servutigo de ĉiuj laboruloj al la financa kapitalo. En pluraj landoj la faŝimo estas jam ĉe la regado. Sed la kresko de l' faŝismo kaj ĝia venko atestas ne nur la malfortecon de la laborista klaso, disorganizita rezulte de l' skismiga politiko de klasa kunlaborado de l' socialdemokratio kun la burĝaro, sed ankaŭ la malfortecon de l' burĝaro mem, kiu spertas timon je la realigo de unueco de batalo de l' laborista klaso, timon je la revolucio kaj ne estas plu kapabla reteni sian diktaturon per la majnovaj metodoj de burĝa demokratio.

2. La plej reakcia speco de faŝismo estas la faŝismo de germana tipo, arogante nomanta sin naci-socialismo, sed havanta absolute nenion komunan kun socialismo, nek kun la defendo de l' veraj naciaj interesoj de l' germana popolo, kaj nur plenumanta



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 156 von 188

la rolon de lakeo de l' grandburĝaro kaj estanta ne nur burĝa naciismo, sed ankaŭ besta ŝovinismo.

Antaŭ la faco de l' tuta mondo la faŝista Germanio klarvideble montras, kio atendas la popolamasojn kiam venkas la faŝismo. La furiozanta faŝista reĝimo ekstermas en prizonoj kaj koncentraj tendaroj la floron de l' laborista klaso, ĝiajn gvidantojn kaj organizantojn. Ĝi frakasis la sindikatojn, la kooperativojn kaj ĉiujn legalajn organizojn de l' laboristoj, kaj egale ankaŭ ĉiujn aliajn nefaŝistajn politikajn kaj kulturajn organizojn. Ĝi deprenis de la laboristoj la elementajn rajtojn pri defendo de iliaj interesoj ĝi transformis kulturan landon je fajrujo de obskurantismo, barbareco kaj milito. La germana faŝismo estas la ĉefa bruliganto de nova imperialista milito kaj elpaŝas kiel la frapa pugno de l' internacia kontraŭrevolucio.

3. Substrekante la kreskon de l' minaco de faŝismo en ĉiuj kapitalismaj landoj, la VII kongreso de l' Komunista Internacio avertas kontraŭ ĉia subtakso de l' faŝisma danĝero. La Kongreso ankaŭ rej'etas fatalistajn opiniojn pri la neeviteblo de la venko de l' faŝismo: tiuj opinioj estas enradike malĝustaj kaj povas naski nur pasivecon kaj malplifortigi la amasan batalon kontraŭ la faŝismo. La laborista klaso povas malhelpi al la venko de l' faŝismo, se ĝi elbatalos la realigon de l' unueco de sia batalo kaj, ĝustatempe disvolvante siajn batal-agojn, ne donos al la faŝismo plifortiĝi, se ĝi kapablos kun ĝusta revolucia gvidado kunigi ĉirkaŭ si la vastajn tavolojn de laboruloj de l' urbo kaj kamparo.

4. La venko de l' faŝismo estas nefirma. Malgraŭ la suferigaj malfaciloj, kreitaj de la faŝista diktaturo por la laborista movado, dum la regado de l' faŝismo okazas la plua disŝanceligo de la bazoj de l'



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 157 von 188

dominado de burĝaro. La internaj konfliktoj en la tendaro de l' burĝaro atingas precipan gravecon. Krulas la legalismaj iluzioj de l' amasoj. Akumuliĝas la revolucia malamo de l' amasoj. Pli kaj pli malkovriĝas la malnobleco kaj mensogeco de l' socia demagogio de l' faŝismo. La faŝismo ne nur ne alportis al la amasoj la promesitan al ili plibonigon de ilia materiala situacio, sed ankoraŭ plu pligrandigis la profitojn de l' kapitalistoj per la malplialtigo de l' vivnivelo de la laboruloj amasoj, plifortigis la ekspluaton de ili fare de areto da financaj magnatoj, efektivigis la pluan rabadon de ili al la profito de l' kapitalo. La seniluziĝo de l' etburĝaj tavoloj de l' urbo kaj laborula kamparanaro, trompitaj de l' faŝistoj, kreskas. Diskomponiĝas kaj mallarĝiĝas la amasa bazo de l' faŝismo. La kongreso tamen avertas kontraŭ danĝeraj iluzioj pri aŭtomata rompiĝo de l' faŝista diktaturo kaj rememorigas, ke nur la unueca revolucia batalo de l' laborista klaso ĉe la kapo de ĉiuj laboruloj venigos al la renverso de l' faŝista diktaturo.

5. En konekso kun la venko de l' faŝismo en Germanio kaj kresko de l' faŝisma danĝero en aliaj landoj pliakriĝis kaj pliakriĝas la klasa batalo de l' proletaro, ĉiam pli transiranta al la rezoluta rezisto al la faŝista burĝaro. En ĉiuj kapitalismaj landoj disvolviĝas la movado de unueca fronto kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj faŝismo. La furiozaj'oj de l' nacisocialista teroro en Germanio efikis kiel fortega antaŭen-puŝo ankaŭ al internacia unueca fronto de l' proletaro (Leipzig'a proceso — kampanjo por la liberigo de Dimitrov kaj kamaradoj, defendo de Thaelman k.t.p.)

Kvankam la movado de unueca fronto troviĝas ankoraŭ nur en la komenco de sia disvolviĝo, la komunistaj kaj socialdemokrataj laboristoj de Fran-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 158 von 188

cio, batalantaj brak-ĉe-brake, prosperis rebati la unuajn atakojn de l' faŝismo, kaŭzinte per tio mobilizan efikon sur la movadon de unueca fronto sur internacia skalo. La kuna armita batalo de l' socialdemokrataj kaj komunistaj laboristoj en Aŭstrio kaj Hispanio montris al la laboruloj de l' aliaj landoj ne nur heroecan ekzemplon, sed ankaŭ kompletan eblecon de sukcesa batalo kontraŭ la faŝismo, se ne estus sabotado de l' dekstruma kaj ŝanceloj de l' „maldekstrumaj" gvidantoj de l' socialdemokratio (kaj en Hispanio ankaŭ la malkaŝa perfido de l' plimulto el la anarkosindikalistaj gvidantoj), kies influo sur la amasojn senigis la proletaron je rezoluta revolucia gvidado kaj je klareco de l' celo de batalo.

6. La bankroto de l' kondukanta partio de l' II Internacio, la germana socialdemokratio, plifaciliginta per sia tuta politiko la venkon de l' faŝismo, kaj ankoraŭ la fiasko de l' „maldekstrum"-reformista socialdemokratio de Aŭstrio, kiu eĉ antaŭ la faco de l' proksimiĝinta neevitebla armita lukto kun la faŝismo detiris la amasojn de l' batalo, — treege plifortigis la seniluziiĝon de l' socialdemokrataj laboristoj pri la politiko de l' socialdemokratio. La II Internacio travivas profundan krizon. Interne de l' socialdemokrataj partioj kaj de l' tuta II Internacio okazas distavoliĝo je du ĉefaj tendaroj: krom la ekzistanta tendaro de l' reakciaj elementoj penantaj daŭrigi la politikon de klasa kunlaborado kun la burĝaro, formiĝas la tendaro de l' revoluciiĝantaj elementoj, elpaŝantaj por la starigo de unueca proletara fronto kaj ĉiam pli transirantaj sur la poziciojn de revolucia klasa batalo.

La VII Kongreso de l' Komunista Internacio salutas la aspiron de l' socialdemokrataj laboristoj al unueca fronto kun la komunistoj, vidante en tio-ĉi la kreskon de ilia klaskonscio kaj la komencon de l' su-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 159 von 188

pervenko je la skismo de l' laborista klaso en la nteresoj de sukcesa batalo kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la burĝaro.

## II. UNUECA FRONTO DE L' LABORISTA KLASO KONTRAU LA FAŜISMO.

Antaŭ la faco de grandega minaco de l'faŝismo por la laborista klaso kaj ĉiuj ĝiaj batalakiroj, por ĉiu laboruloj kaj iliaj elementaj rajtoj, por la paco kaj libero de l'popoloj, la VII Kongreso de l'Komunista Internacio deklaras, ke la realigo de unueca fronto de batalo de l'laborista klaso estas ĉe la nuna historia etapo la ĉefa, plej proksima tasko de l'internacia laborista movado. Sukcesa batalo kontraŭ la ofensivo de l'kapitalo, kontraŭ la reakciaj agoj de l'burĝaro, kontraŭ la faŝismo — la plej kruda malamiko de ĉiuj laboruloj, senigataj je ĉiuj rajtoj kaj liberoj sendiference de iliaj politikaj konvinkoj, imperative postulas starigon de unueco de ago de ĉiuj partoj de l'laborista klaso, sendepende de ilia aparteno al tiu aŭ alia organizo, ankoraŭ antaŭ tio ke la plimulto de l'laborista klaso unuiĝos sur komuna platformo de batalo por la renverso de l'kapitalismo kaj la triumfo de l'proletara revolucio. Sed ĝuste tial tiu-ĉi tasko devigas la komunistojn konsideri la aliiĝintan cirkonstancaron kaj apliki la taktikon de unueca fronto novmaniere, klopodante por interkonsenti pri kunaj agoj kun organizoj de laboruloj de diversaj tendencoj sur uzina, loka, regiona, nacia kaj internacia skaloj.

Deduktante el tio la VII Kongreso de l'Komunista Internacio proponas al la komunistaj partioj en la efektivigo de l'taktiko de unueca fronto sin gvidi per jenaj direktivoj:



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 160 von 188

1. La defendo de l'senperaj ekonomiaj kaj politikaj interesoj de l'laborista klaso, la defendo de ĝi kontraŭ la faŝismo devas esti la ekira punkto kaj konsistigi la ĉefan enhavon de l'unueca fronto de l'laboristoj en ĉiuj kapitalismaj landoj. Por enmovigi la vastajn amasojn, necesas elstarigi tiajn lozungojn kaj formojn de batalo, kiuj elsekvu el la vivbezonoj de la amasoj, el la nivelo de ilia batalkapablo ĉe la konsiderata etapo de evoluo. Ne limigante sin nur per alvokoj al la batalo pro la proletara diktaturo, la komunistoj devas indiki al la amasoj, kion ili faru hodiaŭ, por sin defendi kontraŭ la kapitalista rabado kaj faŝista barbareco. Ili devas per la kunaj agoj de l'laboristaj organizoj atingi la mobilizon de l'amasoj ĉirkaŭ programo de tiaj revendikoj, kiuj estas kalkulitaj por la efektiva transmeto de la rezultoj de l'krizo sur la ŝultrojn de l'regantaj klasoj, de tiaj revendikoj, la batalo por kies efektivigo disorganizas la faŝismon, malfaciligas la preparadon de imperialista milito, malfortigas la burĝaron kaj plifortigas la poziciojn de l'proletaro.

Preparante la laboristan klason al rapida aliigo de formoj kaj metodoj de batalo ĉe la aliiĝo de l' cirkonstancoj, necesas, laŭmezure de l'kresko de la movado, organizi la transiron el la defendo al la ofensivo kontraŭ la kapitalo, tenante kurson al la organizo de amasa politika striko, nepre certigante la partoprenon en ĝi de l'ĉefaj sindikatoj de la lando.

2. Ne rezignante eĉ por minuto je sia memstara laboro pri komunista klerigo, organizo kaj mobilizo de l'amasoj, la komunistoj devas, por la plifaciligo



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 161 von 188

al la laboristoj de la vojo al la unueco de agoj, klopodi pri kunaj elpaŝoj kun la socialdemokrataj partioj, reformistaj sindikatoj kaj aliaj organizoj de l' laboruloj kontraŭ la klasaj malamikoj de l' proletaro sur la bazo de mallongdaŭraj aŭ longdaŭraj interkonsentoj. Ĉe tio-ĉi la ĉefa atento devas esti turnita al la disvolvo sur la lokoj de amasaj elpaŝoj, kondukataj de l' bazaj organizoj per lokaj interkonsentoj.

Lojale plenumante la kondiĉojn de l' interkonsento, necesas ĝustatempe senvualigi ĉian sabotadon de l' kunaj agoj fare de personoj kaj organizoj, partoprenantaj en la unueca fronto, en okazo de subrompo de l' interkonsento senprokraste apeli al la amasoj, daŭrigante senlacan batalon por la restarigo de l' malplenumita unueco de agado.

3. La formoj de efektivigo de l' unueca proletara fronto, dependante de l' stato kaj karaktero de l' laboristaj organizoj kaj de l' konkreta cirkonstancaro, devas esti diversaj. Tiaj formoj povas esti, ekzemple, la koordinitaj kunaj agoj de laboristoj de okaz'al okazo pro konkretaj kaŭzoj, pro konkretaj revendikoj aŭ sur la bazo de komuna platformo; koordinitaj agoj en apartaj entreprenejoj aŭ en branĉoj de produktado; koordinitaj agoj sur loka, regiona, nacia kaj internacia skalo; koordinitaj agoj en la afero de l' organizo de ekonomia batalo de l' senlaboruloj, efektivigo de amasaj politikaj agoj; en la organizo de kuna sindefendo kontraŭ la faŝistaj atakoj; koordinitaj agoj en la afero de helpo al la malliberigitoj kaj iliaj familioj; en la regiono de batalo kontraŭ la socia reakcio; kunaj agoj en la afero de defendo de l' interesoj de la junularo kaj de la virinoj; en la re-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 162 von 188

giono de kooperacio, kulturo, sporto; kunaj agoj celantaj la subtenon de l' revendikoj de laborulaj kamparanoj ktp.; la kreo de laboristaj kaj laborist-kamparanaj aliancoj (Hispanio); la kreo de daŭraj koalicioj en la formo de „laborista partio“ aŭ „laborist-farmista partio“ (Usono) k.t.p.

Celante la disvolvon de l' movado de unueca fronto, kiel afero de l' amasoj mem, la komunistoj devas klopodi por la kreo de elektitaj (kaj en la landoj de faŝisma diktaturo — kunmetitaj el la plej aŭtoritataj partoprenantoj de l' movado) eksterpartiaj klasaj organoj de l' unueca fronto en la entreprenejoj, meze de l' senlaboruloj, en la laboristaj kvartaloj, meze de l' urba etpopolo kaj en la vilaĝoj. Nur tiaj organoj, kiuj certe ne devas substitui la organizojn, partoprenantajn en la unueca fronto, povos ĉirkaŭpreni per la movado de l' unueca fronto ankaŭ la grandegan neorganizitan amason de l' laboruloj, povos kontribui al la disvolvo de l' iniciativo de la amasoj en la batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj kontraŭ la faŝismo, kaj sur la bazo de ĉi-tio al la kreo de vasta laborista aktivularo de l' unueca fronto.

4. Ĉie, kie la gvidantoj de l' socialdemokratio, penante deflankigi la laboristojn de l' batalo por la defendo de iliaj ĉiutagecaj interesoj kaj subrompi la starigon de l' unueca fronto, elstarigas vaste-proklamatajn „socialistajn“ projektojn (plano de De Man k. a.), necesas malkovri la demagogian karakteron de similaj projektoj, klarigante al la laboruloj la neeblecon de efektivigo de socialismo dum la regado restas en la manoj de l' burĝaro. Samtempe tamen necesas utiligi apartajn elstarigatajn en tiuj projektoj entreprenojn, kiuj oni povas kunligi kun la vivaj revendikoj de l' laboruloj, kiel ekira punkto por la disvolvo de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 163 von 188

*amasa batalo unuecfronte, kune kun la socialdemokrataj laboristoj.*

En la landoj, kie ĉe la regado troviĝas *socialdemokrataj registaroj* (aŭ koaliciaj registaroj kun la partopreno de socialistoj), necesas, ne limigante sin per la propagandeca senvualigo de l' politiko de tia registaro, mobilizi la amasojn por la batalo pro la realigo de iliaj praktikaj vivaj klasaj revendikoj, kies efektivigon la socialdemokratoj deklaris en siaj platformoj, precipe kiam ili ankoraŭ ne staris ĉe la regado aŭ ankoraŭ ne enestis en la konsisto de l' registaro.

5. La kunaj agoj kun la socialdemokrataj partioj kaj organizoj ne nur ne ekskludas, sed, male, *faras ankoraŭ pli necesaj* seriozan bazitan kritikon de l' reformismo, socialdemokratismo kiel ideologio kaj praktiko de klasa kunlaborado kun la burĝaro kaj la paciencan klarigadon al la socialdemokrataj laboristoj de l' principoj kaj programo de l' komunismo.

Malkovrante antaŭ la amasoj la sencon de la demagogiaj argumentoj de l' dekstrumaj socialdemokrataj gvidantoj kontraŭ la unueca fronto, *plifortigante la batalon kontraŭ la reakcia parto* de l' socialdemokratio, la komunistoj devas starigi *plej proksiman kunlaboradon kun tiuj maldekstrumaj socialdemokrataj laboristoj, funkciuloj kaj organizoj, kiuj batalas kontraŭ la reformista politiko kaj estas por unueca fronto kun la komunista partio.* Ju pli intensa estos nia batalo kontraŭ la reakcia tendaro de l' socialdemokratio troviĝanta en bloko kun la burĝaro, des pli efika estos nia helpo al la revoluciiĝanta ĝia parto. Kaj interne de l' maldekstruma tendaro la memdifino de certaj ĝiaj elementoj ekmarŝos des pli rapide, ju pli rezo-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 164 von 188

lute la komunistoj batalos por unueca fronto kun la social-demokrataj partioj.

La demando pri la rilato al la praktika efektivigo de l' unueca fronto estas la ĉefa indikilo de l' veraj pozicioj de diversaj grupoj de l' socialdemokratio. En la batalo por la praktika efektivigo de l' unueca fronto tiuj social-demokrataj gvidantoj, kiuj en la paroloj elpaŝas kiel maldekstrumuloj, estos starigitaj en tian pozicion, kiam ili devos montri en realo, kiu el ili iras al la batalo kontraŭ la burĝaro kaj la dekstraj socialdemokratoj, kaj kiu estas kun la burĝaro—kontraŭ la afero de l' laborista klaso.

6. La elektaj kampanjoj—devas esti utiligitaj por la plua disvolvo kaj plifortigo de l' unueca fronto de batalo de l' proletaro. Elpaŝante ĉe la elektoj memstare, disvolvante al la amasoj la programon de l' komunista partio, la komunistoj devas klopodi pri unueca fronto kun la socialdemokrataj partioj kaj kun la sindikatoj (kaj ankaŭ kun la organizoj de laborulaj kamparanoj, metiistoj ktp.), ĉiel penante por ne allasi la elektiĝon de reakciaj kaj faŝistaj kandidatoj. Aŭtaŭ la faco de l' faŝisma danĝero, en la dependo de la kresko kaj de l' sukcesoj de l' movado de unueca fronto, kaj ankaŭ en dependo de l' ekzistanta elektosistemo, la komunistoj povas elpaŝi en la elekta kampanjo kun komuna platformo kaj kun komunaj listoj de l' anti-faŝista fronto, konservante por si la liberecon de sia politika agitado kaj kritiko.

7. Aspirante unuigi sub la gvido de l' proletaro la batalon de l' laborula kamparanaro, urba etburĝaro kaj laborulaj amasoj el la subpremitaj nacioj, la komunistoj devas klopodi pri la kreo de vasta antifaŝista popola fronto sur la bazo de l' proletara unueca fronto, elpaŝante por ĉiuj specifaj re-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 165 von 188

vendikoj de tiuj-ĉi tavoloj da laboruloj, irantaj la linion de radikaj interesoj de l' proletaro. Precipe grave estas mobilizi la laborulajn kamparanojn kontraŭ la faŝista politiko de rabado al la ĉefaj amasoj de l' kamparanaro; kontraŭ la ekspluatista politiko de prezoj de l' monopolista kapitalo kaj de l' burĝaj registaroj, kontraŭ la neelportebla ŝarĝo de l' impostoj, farmpago, ŝuldaro, kontraŭ la aŭkcia vendado de l' kamparana havaj'o, por ŝtata helpo al la ruinigita kamparanaro. Laborante ĉie meze de l' urba etburĝaro kaj intelektularo, ankaŭ same meze de l' oficistoj, necesas levi ĉi-tiujn tavolojn kontraŭ la plikresko de l' impostoj kaj de l' vivkareco, kontraŭ la prirabo de ili fare de l' monopolista kapitalo, trustoj, kontraŭ la procenta servuteco, kontraŭ la maldungoj kaj salajro-redukto al la ŝtataj kaj komunumaj oficistoj. Defendante la interesojn kaj rajtojn de l' progresema intelektularo, necesas ĉiurimede subteni ĝian movadon kontraŭ la kultura reakcio kaj plifaciligi ĝian transiron sur la flankon de l' laborista klaso en la batalo kontraŭ la faŝismo.

8. En la kondiĉoj de politika krizo, kiam la regantaj klasoj jam ne kapablas rezisti kontraŭ la potenca elano de l' amasa movado, la komunistoj devas elstarigi radikajn revoluciajn lozungojn (ekzemple, la kontrolon super la produktado, la bankoj, la dissolvon de l' polico, la anstataŭigon de ĝi per armita laborista milico k.t.p.), direktitajn al la ankoraŭ pli granda disŝanceligo de l' ekonomia kaj politika potenco de l' burĝaro kaj al la pligrandigo de l' fortoj de la laborista klaso, al la izolado de l' kompromisemaj partioj kaj alkondukantajn la laboristajn amasojn alfronte al la revolucia ekkapto de l' regado. Se ĉe tia leviĝo de l' amasa movado estos ebla kaj en la interesoj de l' proletaro necesa la kreo de registaro de l' proletara



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 166 von 188

unueca fronto aŭ antifaŝista popola fronto, kiu ne estas ankoraŭ registaro de l' proletara diktaturo, sed prenas sur sin la efektivigon de rezolutaj entreprenoj kontraŭ la faŝismo kaj reakcio, la komunista partio devas klopodi pri la kreo de tia registaro. Esenca premiso por la kreo de tia registaro estas tia situacio: a) kiam la burĝa ŝtata aparato estas forte paralizita, tiel ke la burĝaro ne estas kapabla malhelpi al la kreo de tia registaro; b) kiam la plej vastaj amasoj malkvietege elpaŝas kontraŭ la faŝismo kaj reakcio, sed ne estas ankoraŭ pretaj leviĝi por la batalo pro la soveta reĝimo: c) kiam jam konsiderinda parto de l' organizoj de la socialdemokratio kaj aliaj partioj, partoprenantaj en la unueca fronto, postulas senkompatajn agojn kontraŭ la faŝistoj kaj aliaj reakciuloj kaj estas preta batali kune kun la komunistoj per la efektivigo de tiuj-ĉi agoj.

Je kiom la registaro de l' unueca fronto efektive akceptos rezolutajn agojn kontraŭ la kontraŭ-revoluciaj financaj magnatoj kaj iliaj faŝistaj agentoj kaj neniamaniere limigos la agadon de l' komunista partio kaj la batalon de l' laborista klaso, la kom.-partio ĉiurimede subtenos tian registaron. Al tio la protopreno de l' komunistoj en la registaro de l' unueca fronto estos decidata en ĉiu aparta okazo depende l' konkreta cirkonstancaro.

## III. UNUECO DE SINDIKATA MOVADO.

Substrekante la precipan gravecon de l' starigo de unueca fronto en la regiono de l' ekonomia batalo de l' laboristoj kaj de la kreo de unueco de l' sindikata movado, kiel plej grava etapo en la plifirmigo de l' unueca fronto de l' proletaro, la kongreso imputas al la komunistoj la devon akcepti



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

ĉiujn praktikajn rimedojn por la efektivigo de l' unueco de sindikatoj sur faka kaj nacia skalo.

La komunistoj estas rezolute por la restarigo de la unueco de l' sindikatoj en ĉiu lando kaj sur internacia skalo; por unuecaj klasaj sindikatoj, kiel unu el la plej gravaj apogiloj de la laborista klaso kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj faŝismo; por unueca sindikato en ĉiu fako; por unueca asocio de l' sindikatoj en ĉiu lando; por unuecaj internaciaj asocioj de l' sindikatoj laŭ fakoj; por unueca Internacio de l' sindikatoj sur la bazo de l'klasbatalo.

En la landoj, kie ekzistas malgrandaj ruĝaj sindikatoj, oni devas klopodi pri ilia eniro en la grandajn reformistajn sindikatojn, postulante liberecon pri defendado de siaj opinioj kaj la reakcepton de la eksigitoj, kaj en la landoj, kie ekzistas paralele grandaj ruĝaj kaj reformistaj sindikatoj, pri la unuigo de ili sur egalecaj principoj, sur la bazo de platformo de batalo kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo kaj certigo de sindikata demokratio.

En la reformistaj kaj unuigitaj sindikatoj la komunistoj devas aktive labori, plifirmigi ilin kaj varbi al ili la neorganizitajn laboristojn, ĉiel klopodante por ke tiuj-ĉi organizoj fakte defendu la interesojn de l' laboristoj kaj fariĝu efektive veraj klasaj organizoj. Por tio-ĉi la komunistoj devas elbatali la subtenon de ĉiuj membroj, funkciuloj kaj organizoj entute.

La komunistoj devas defendi la sindikatojn kontraŭ ĉiuj provoj de l' burĝaro kaj faŝismo limigi iliajn rajtojn aŭ detrui ilin.

Se la reformistaj gvidantoj aplikos politikon de eksigoj de l' revoluciaj laboristoj aŭ tutaj organizoj el la sindikatoj aŭ represiojn de alia formo, la komunistoj devas mobilizi la tutan membroamason de

l' sindikatoj kontraŭ la skismiga agado de l' gvidantaro, samtempe organizante la kunligon de l' eksigitoj kun la membroamaso de l' sindikatoj kaj la kunan batalon por la reakcepto de ili, por la restarigo de l' rompita unueco de l' sindikato.

La ruĝaj sindikatoj kaj la Ruĝa Internacio de Sindikatoj devas ricevi ĉiurimedan helpon fare de l' komunistaj partioj en ilia aspiro starigi kunan batalon de l' sindikatoj de ĉiuj tendencoj kaj atingi la unuecon de l' sindikata movado sur nacia kaj sur internacia skalo, sur la bazo de l' klasbatalo kaj sindikata demokratio.

## IV. TASKOJ DE L' KOMUNISTOJ SUR APARTAJ TERENOJ DE L' ANTIFAŜISTA MOVADO.

1. La Kongreso direktas la plej seriozan atenton al la neceso de sistemeca ideologia batalo kontraŭ la faŝismo. Konsiderante ke la ĉefa, plej danĝera formo de faŝista ideologio estas la ŝovinismo, necesas malkovri al la amasoj, ke la faŝista burĝaro sub la preteksto pri defendo de l' tutnaciaj interesoj, realigas sian profiteman klasan politikon de subpremo kaj ekspluato de l' propra popolo, same de prirabo kaj sklavigo de l' aliaj popoloj. Necesas montri, ke la laborista klaso, batalante kontraŭ ĉiuspecaj servutigo kaj nacia subpremo, estas la unika vera batalanto por la nacia libero kaj la sendependeco de l' popolo. La komunistoj devas ĉiurimede batali kontraŭ la faŝista falsigo de la historio de l' popolo, farante ĉion por historie ĝuste kaj en vere lenin-stalineca spirito prilumi al la laborulaj amasoj la pasinton de ilia propra popolo, por kunligi sian nunan batalon kun la revoluciaj tradicioj de l' pasinto. La kongreso avertas kontraŭ ĉia malŝata rilato al la demando pri



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 169 von 188

nacia sendependeco kaj al la naciaj sentoj de l' vastaj popolaj amasoj, kio plifaciligas al la faŝismo la disvolvon de ĝiaj ŝovinistaj kampanjoj (Saario, germanaj regionoj en Ĉehoslovakio k.t.p.) kaj insistas pri ĝusta, konkreta apliko de l' lenin-stalinista nacia politiko.

Estante nepacigeblaj principaj kontraŭuloj de l' burĝa naciismo en ĉiuj ĝiaj varioj, — la komunistoj tute ne estas adeptoj de nacia nihilismo, malŝata rilato al la sorto de l' propra popolo.

2. La komunistoj devas eniri ĉiujn amasajn faŝistajn organizojn, havantaj la monopolon de legaleco en la konsiderata lando, utiligante eĉ la plej malgrandan legalan aŭ duonlegalan eblecon de laboro en ili por la kontraŭstarigo de l'interesoj de la amasoj aliĝintaj al tiuj-ĉi organizoj, al la politiko de l'faŝismo kaj por la diskomponigo de ĝia amasa bazo. Komencante de l'plej elementaj movadoj de protesto ĉirkaŭ la aktualaj bezonoj de l' laboruloj, la komunistoj devas per elasta taktiko klopodi pri la partoprenigo en la movado de ĉiam pli vastaj amasoj, precipe de l' laboristoj, sekvantaj pro nekonscieco la faŝistojn. Konforme al la plikresko de l' movado larĝen kaj profunden, necesas ŝanĝi la lozungojn de batalo, preparante la eksplodon de l' faŝista burĝa diktaturo kun la helpo de l' amasoj mem, kiuj troviĝas en la faŝistaj organizaj.

3. Defendante energie kaj konsekvenceme la interesojn kaj revendikojn de l' senlaboruloj, organizante ilin kaj kondukante ilin al la batalo por la ricevo de laboro, por sufiĉaj monhelpoj, asekuro k.t.p., — la komunistoj devas partoprenigi la senlaborulojn en la movado de l' unueca fronto, elpuŝante ĉiamaniere la influon de l' faŝismo el ilia medio. Krom tio necesas rigore konsideri la apartaj'ojn de diversaj kategorioj de senlaboruloj (kvalifikitaj



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 170 von 188

kaj nekvalifikitaj, organizitaj kaj neorganizitaj, viroj kaj virinoj, junularo k.t.p.).

4. La kongreso substrekas al ĉiuj komunistaj partioj de l' kapitalismaj landoj la gravegan rolon de l' junularo en la batalo kontraŭ la faŝismo. El la vicoj de l' junularo la faŝismo ĉefmaniere varbas siajn ŝturmtaĉmentojn. Batalante kontraŭ la subtakso de l' graveco de la amasa laboro meze de l' laborula junularo, entreprenante efikajn agojn por supervenki la enfermitecon de l' komjunulaj organizoj, la komunistaj partioj devas ĉiurimede akceli la unuigon de fortoj de ĉiuj nefaŝistai amasaj organizoj de l' junularo, inkluzive la junularaj organizoj de l'sindikatoj, de l' kooperacio k.t.p. sur la bazo de plej vasta unueca fronto, ĝis la kreo mem de diversspecaj komunaj organizoj kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la neaŭdita senrajteco kaj militarizo de l' junularo, por la ekonomiaj kaj kulturaj interesoj de l' juna generacio. Necesas elstarigi la taskon krei antifaŝistan asocion de l' komunistaj kaj socialistaj junular-unioj sur la platformo de klasa batalo. La komunistaj partioj devas ĉiurimede helpi al la disvolvo kaj plifortigo de l' komjunularo.

5. La viva neceso de l' partoprenigo en la popola unueca fronto de multmilionaj amasoj da laborulaj virinoj, unuavice laboristinoj kaj laborulaj kamparaninoj, sendepende de iliaj partiaj opinioj kaj religiaj konvinkoj, postulas de l' komunistoj intensan aktivecon en la celoj de disvolvo de amasa movado de l' laborulaj virinoj ĉirkaŭ la batalo pro iliaj aktualaj revendikoj kaj interesoj, precipe en la batalo kontraŭ la vivkareco, la neegalrajta situacio de la virino kaj la faŝista sklavigo de ŝi, kontraŭ la amasaj maldungoj, por la plialtigo de l' salajro sur la bazo de l' principo: „egala pago por egala la-



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

boro", kontraŭ la danĝero de milito. Necesas en ĉiu aparta lando, same kiel sur internacia skalo, elaste apliki la plej diversajn organizajn formojn por la starigo de kontakto kaj kuna laboro de l' revoluciaj, socialdemokrataj kaj progresemaj virinaj organizoj, ĉe la garantio pri libero de opinio kaj kritiko, ne haltante antaŭ la kreo tie, kie tio-ĉi estos necesa, ankaŭ de apartaj virinaj organizoj.

6. La komunistoj devas konduki batalon por la partoprenigo de l' kooperativaj organizoj en la vicoj de l' unueca fronto proletara kaj de l' antifaŝista popola fronto.

Fare de l' komunistoj devas esti havigita la plej aktiva helpo al la batalo de l' kooperacio por la aktualaj interesoj de ĝiaj membroj, precipe en la batalo kontraŭ la vivkareco, por kreditoj, kontraŭ la enkonduko de rabaj depagoj kaj novaj impostoj, kontraŭ limigo de l' agado kaj disbato de l' kooperacio fare de l' faŝistoj k. a.

7. La komunistoj devas preni sur sin la iniciaton en la afero de kreo el la eltenitaj, spertitaj elementoj de l' unuecfronta movado de amasa antifaŝista sindefendo kontraŭ la atakoj de l' faŝistaj bandoj.

## V. ANTIIMPERIALISMA POPOLA FRONTO EN LA KOLONIAJ LANDOJ.

En la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj la plej grava tasko de l' komunistoj estas en la laboro por kreo de antiimperialisma popola fronto. Por tio-ĉi estas necese partoprenigi la plej vastajn popolajn amasojn en la naci-liberiga movado kontraŭ la kreskanta imperialista ekspluato, kontraŭ la kruela sklavigo, por la elpelo de l' imperialistoj, por la sendependeco de la lando; aktive



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 172 von 188

partopreni en la amasaj antiimperialismaj movadoj, ĉefataj de la nacional-reformistoj, klopodi pri kunaj eklpaŝoj sur la bazo de konkreta antiimperialisma platformo kun la naci-revoluciaj kaj naci-reformistaj organizoj.

En Ĉinio estas necese kunigi la plivastigon de l' soveta movado kaj la plifortigon de l' batala potenco de l' Ruĝa Armeo kun la disvolvo de popola antiimperialisma movado en la tuta lando. Tiu ĉi movado devas esti kondukata sub la lozungo de naci-revolucia batalo de l' armita popolo kontraŭ la imperialistaj sklavigantoj kaj iliaj ĉinaj lakeoj. La sovetoj devas estiĝi la unuiga centro de l' tuta ĉina popolo en ĝia liberiga batalo.

La proletaro de l' imperialistaj landoj en la interesoj de sia liberiga batalo devas ĉiurimede subteni la liberigan batalon de koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj kontraŭ la imperialistaj uzurpuloj.

## VI. PLIFORTIGO DE L' KOMUNISTAJ PARTIOJ KAJ LA BATALO POR LA POLITIKA UNUECO DE LA LABORISTA KLASO.

La kongreso kun aparta insisto substrekas, ke nur la plua ĉiuflanka plifortigo de l'komunistaj partioj mem, la disvolvo de ilia iniciativo, ilia principeca marksist-leninista politiko kaj ĝusta elasta taktiko, konsideranta la konkretan cirkonstancaron kaj dislokiĝon de l' klasaj fortoj, povas certigi la mobilizon de l' plej vastaj amasoj de laboruloj por la unueca batalo kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la kapitalismo.

La efektiva realigo de l'unueca fronto postulas de l'komunistoj supervenki la memkontentan sektismon en siaj propraj vicoj, kiu nunmomente en vico da okazoj estas jam ne „infana malsano" de



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 173 von 188

l'komunista movado, sed enradikiĝinta malvirto. Supertaksante la gradon de revoluciiĝo de l'amasoj, kreante iluziojn, ke jam prosperis bari la vojon al la faŝismo, dum la faŝista movado daŭris plikreski, tiu-ĉi sektismo kultivis en realo pasivecon antaŭ la faŝismo. Substituante en praktiko la metodojn de gvidado je malvaste-partia grupo al la metodoj de gvidado je la amasoj, anstataŭigante amasan politikon per abstrakta propagando kaj maldekstruma doktrinado, rifuzante la laboron en la reformistaj sindikatoj kaj la faŝistaj amasaj organizoj, ŝablonigante la taktikon kaj la lozungojn por ĉiuj landoj, ne konsiderante la specifaj'ojn de la konkreta cirkonstancaro en ĉiu aparta lando, — tiu-ĉi sektismo en konsiderinda grado malrapidigis la kreskon de l'komunistaj partioj, malfaciligis la kondukadon de vera amasa politiko, malhelpis al la utiligo de l'malfaciloj de la klasa malamiko por la plifortigo de l'revolucia movado, malhelpis al la afero de l'batalakiro de la vastaj proletaraj amasoj al la flanko de l'komunistaj partioj.

Batalante plej energiamaniere por la elradikigo de ĉiuj restoj de sektismo, kiu estas en la nuna momento treege serioza malhelpo por la kondukado de vere amasa, bolŝevista politiko de l'komunistaj partioj, la komunistoj devas plifortigi sian viglatenton rilate al la danĝero de dekstruma oportunismo kaj konduki rezolutan batalon kontraŭ ĉiuj ĝiaj konkretaj elmontriĝoj, konsiderante ke ĉe la vasta apliko de l'taktiko de unueca fronto la dekstruma danĝero plikreskos. La batalo por la starigo de unueca fronto, unueco de agado de l'laborista klaso postulas la evidentigan konvinkadon de l'socialdemokrataj laboristoj pri la ĝusteco de l'komunista kaj malĝusteco de l'reformista politiko kaj devigas ĉiun komunistan partion al



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 174 von 188

la nepacigebla batalo kontraŭ ĉiuj tendencoj de ombrumado de l'diferenco inter komunismo kaj reformismo, malplifortigo de l'kritiko pri socialdemokratismo kiel ideologio kaj praktiko de klasa kunlaboro kun la burĝaro, kontraŭ la iluzioj, ke la efektivigo de socialismo estas ebla per paca, legala vojo, kontraŭ ĉia sinbazado je aŭtomatismo kaj spontaneco kiel en la afero de likvido de l'faŝismo, tiel ankaŭ en la efektivigo de l'unueca fronto, kontraŭ la malplialtigo de l'rolo de la partio kaj kontraŭ la plej malgrandaj ŝanceliĝoj en la momento de l'decida ago.

Konsiderante, ke la interesoj de l'klasa batalo de l'proletaro kaj la sukceso de l'proletara revolucio diktas la neceson de estiĝo en ĉiu lando de unueca amasa politika partio de l'laborista klaso, la kongreso starigas antaŭ la komunistaj partioj la taskon, sin apogante je la kreskanta emo de l'laboristoj al la unuiĝo de l'socialdemokrataj partioj aŭ apartaj organizoj kun la komunistaj partioj, preni en siajn manojn la iniciaton en la afero de ĉi-tiu unuiĝo. Al tio necesas nepre klarigi al la laboristoj ke tia unuiĝo estas ebla nur ĉe la ĉeesto de pluraj kondiĉoj: ĉe la kondiĉo de kompleta sendependeco je la burĝaro kaj kompleta disrompo de l'bloko de la socialdemokratio kun la burĝaro; ĉe la kondiĉo de l'agnosko de l'neceseco pri revolucia renverso de la dominado de l'burĝaro kaj starigo de diktaturo de l'proletaro en la formo de sovetoj; ĉe la kondiĉo de rifuzo subteni sian burĝaron en imperialista milito; ĉe la kondiĉo de konstruo de l'partio sur la bazo de demokratia centralismo, garantianta la unuecon de volo kaj ago, kaj elprovita per la sperto de l'rusaj bolŝevikoj.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 

Samtempe kun tio-ĉi necesas rezolute elpaŝi kontraŭ la provoj de „ma'dekstrumaj“ socialdemokrataj demagogoj utiligi la seniluziiĝon meze de l'socialdemokrataj laboristoj por la kreo de novaj socialistaj partioj kaj nova „internacio“, direktitaj kontraŭ la komunista movado kaj tiamaniere pliprofundigantaj la skismon en la laborista klaso.

La VII Kongreso de l'Komunista Internacio, opiniante ke la unueco de ago estas urĝa neceso kaj la plej ĝusta vojo al la kreo ankaŭ de politika unueco de l'proletaro, — je la nomo de ĉiuj sekcioj de l' Komunista Internacio deklaras pri ilia preteco komenci senprokraste intertraktojn kun la respektivaj partioj de l'II Internacio pri la starigo de unueco de ago de l'laborista klaso kontraŭ la ofensivo de l' kapitalo, la faŝismo kaj la minaco de imperialista milito, kaj same pri la preteco de l'Komunista Internacio pro tiuj-ĉi celoj enpaŝi intertraktojn kun la II Internacio.

## VII. POR SOVETA REĜIMO!

En la batalo por la defendo de l'burĝdemokratiaj liberoj kaj akiroj de l'laboruloj kontraŭ la faŝismo, en la batalo por la renverso de l'faŝista diktaturo, la revolucia proletaro preparas siajn fortojn, plifortigas la batalligojn kun siaj aliancanoj kaj direktas la bataion por la celoj de batalakiro de la vera demokratio de l'laboruloj: la soveta reĝimo.

La plua plifortigo de la Lando de Sovetoj, la kunigo de l'monda proletaro ĉirkaŭ ĝi, kaj la potenca kresko de l'internacia aŭtoritato de l'komunista partio de Sovet-Unio, la komenciĝinta ekturniĝo de l'laboristoj socialdemokrataj kaj organizataj en reformistaj sindikatoj en la direkton de la revolucia klasa batalo, la plikresko de l'amasa repuŝo al la faŝismo



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 176 von 188

kaj la kresko de l'revolucia movado en la kolonioj, la falo de l'II Internacio kaj la kresko de l'Komunista Internacio, — ĉio-ĉi plirapidigas la disvolvon de l'socialista mond-revolucio.

La kapitalisma mondo transiras en periodon de akraj kunpuŝiĝoj rezulte de l'pliakriĝo de la internaj kaj eksteraj kontradikcioj de l'kapitalismo.

Tenante la kurson al tiu-ĉi perspektivo de revolucia disvolviĝo, la VII Kongreso de l'Komunista Internacio alvokas la komunistajn partiojn al plej granda politika aktiveco kaj aŭdaco, al senlaca batalo por la starigo de unueco de agoj de l'laborista klaso. La starigo de unueca fronto de l'laborista klaso — estas la decida ĉenero de l'preparado de la laboruloj al la okazontaj grandaj bataloj de la dua turno de proletaraj revolucioj. Nur la kunigo de l'proletaro je unueca amasa politika armeo certigos ĝian triumfon en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj la regado de l'kapitalo, por la diktaturo de l'proletaro kaj regado de l'sovetoj. „La venko de la revolucio neniam venas mem. Oni devas ĝin antaŭprepari kaj batalakiri. Kaj antaŭprepari kaj batalakiri ĝin povas nur forta proletara revolucia partio". (Stalin).

---

## KLARIGOJ KAJ REFERENCOJ.

1 devanci — antaŭi, plifrui, antaŭepasi, antaŭeveni; superi.

2 agreso — atakemo; atakfaro.

3 revolto — armita leviĝo; aktiva indigniĝo.

4 represio — kontraŭago, reprem-ago, tiucela pun-ago.

5 devori — avide (aŭ sovaĝmaniere) formanĝi, forgluti, konsumi.

6 agrario — granda terposedanto, grandbienulo.

7 moratorio — (oficiala) prokrastigo de ŝuldopago.

8 defenzivo — „defendpolico", „sekurec-polico", sekreta politika polico.

9 LENIN: Verkaro, vol. XXV, pĝ. 236 (rusl. eldono, same kiel por aliaj verkoj referencitaj sube).

10 faŝizi — faŝistigi.

11 kruli — disfali, ruinfali.

12 Schutzbund — (Defendligo) — duonmilita organizo kreita de l' s.-d. partio aŭstria.

13 skoio — lernejo, en la plej vasta senco de l' vorto (D: Schule, E: school, F: école, I: scuola, R: ŝkola, S: escuela).

14 LENIN: „Brulema materialo en la mondpolitiko" (vol. XII, pĝ. 305).

15 Reichstag (pr.: rajĥstag) — germana parlamento.

16 rezoluta — firmecida (-iĝinta), decidema, kuraĝa en la plenumo de sia decido.



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 178 von 188

17 spano — malnova long-mezuro varilnta laŭ lando kaj regiono (Britio: span, Francio: main, Rusio: pjadj).

18 strebi — energie probatali, streĉi la fortojn por atingi iun celon.

19 revendiki — postuli ion, kio apartenas al ni, sed estas posedata (aŭ uzurpita) de iu; postuli iujn politikajn rajtojn aŭ ekonomiajn pliboniĝojn.

20 adheri — aliĝi, membriĝi; membri, enesti (en ligo, asocio, unio).

21 angle: profesia sindikato.

22 nominacii — oficiale (de-supre) delegi iun al ia gvidposteno.

23 prezervi — kontraŭŝirmi, evitigi.

24 emisii — eldoni bankbiletojn, ŝtatajn aktojn, dekretojn.

25 STALIN: „Problemoj de Leninismo".

26 unifi — unutipigi, samtipigi, unuecigi.

27 RGO — ruĝa sindikata opozicio funkciinta en Germanio.

28 apropoe — alokaze, bonokaze, ĝustokaze, ĝustmomente, oportunokaze (dirite).

29 eseroj (s-r·) — mallongigo per kiu oni nomis en Rusio la partion de socialistoj-revoluciuloj.

30 Prononcu: J'an d'Ark.

31 De la pasinta jarcento (t.e. inter 1870—1880).

32 LENIN: Verkaro, vol. XVIII, pĝ. 81

33 minorito — malplimulto.

34 dislokacio — dissituigo, -iĝo, dislokigo, -iĝo, dismeto, disstarigo.

35 Al kiu ĉio ŝajnas malgrava, facile farebla, pasebla; kiu ĉion malatentas.

36 LENIN: Verkaro, vol. XXV, pĝ. 202.

37 STALIN: „Pri la perspektivoj de KPG kaj pri bolŝevistigo" („Pravda", № 27, 3.2.1925).



https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 179 von 188

38 STALIN: „Problemoj de Leninismo", pĝ. 60 (rusl. eld.).

39 snipero — unuaranga, ĝuste, rapide kaj malproksimen trafanta pafisto.

41 LENIN: Verkaro, vol. XIX, pĝ. 38.

40 STALIN: „Problemoj de Leninismo" (10-a eld.), pĝ. 589-590.

42 Kadr-aktivularo, -laborantaro, -batalantaro.

43 aprezi — laŭvalore ŝati, konscii la valoron (diference de taksi — fiksi la valoron).

44 LENIN: „Kion fari?"

45 noci — malutili.

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 181 von 188

# ENHAVO

Pĝ.

La ofensivo de l' faŝismo kaj la taskoj de l' Komunista Internacio en la batalo por la unueco de l' laborista klaso kontraŭ la faŝismo.

Raporto de k-do G. Dimitrov al la VII-a Mond-Kongreso de l' Komunista Internacio . 5

Por unueco de l' laborista klaso kontraŭ la faŝismo.

Konkluda parolo de k-do G. Dimitrov . . . 103

Rezolucio laŭ la raporto de k-do Dimitrov . . 147

Klarigoj kaj referencoj . . . . . . . . . . 171

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B Seite 184 von 188

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B

BUCHBINDEREI
VRBA

https://data.onb.ac.at/rep/1131962B 